

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 20 [1996/2] – Marto-Aprilo 1996

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. 📠 kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono.)

e-poŝto: enkidu@perth.dialix.oz.au

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Korespondaj kursoj: D. Lukes & H. Green, PO Box 1814, Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3.5-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

P.O. Box 313, Sunnybank Qld 4109

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. 📠 09-270 3669

Sekretario: Brad McDonald, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. 📠 kaj faksoj: 09-579 4767

Kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Pri abon- kaj membro-kotizoj, vidu paĝon 27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

AEA/NZĜEA-Kongreso (Kep Enderby).....	3
Somerlernejo (Terry Manly).....	5
Aŭs. Instruistoj de Esperanto.....	9
Ĉvarcaj Analoj de 1995 (Diplodoko).....	10
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	13
UK 1997 (Margaret Furness).....	16
Kiu estas kiu: Kep Enderby.....	18
NZ-Fratulo: Brian Fox.....	19
Deziras Korespondi.....	19
Du kantoj el Kubo.....	20
La skriba formo de propraj nomoj (David Rockell).....	24
El la grupoj: Zamenhof-festoj.....	25
Reklamo: <i>Sorĉisto de Oz</i>	27

Recenzo:

La programo “Supersigno” (Alan Turvey)..... 7

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la maja numero: 20 aprilo.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet. Adreso:

<http://www.dialix.com.au/~peterb/esk/ind.ex.htm>

Komuna greso de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, en Aŭklando, 3-10 Januaro 1996



Plej malantaŭa vico: Uwe Lohse (kun barbo), Brian Fox, Ian Jones, Howard Gravatt, Ray Ross, John Abood, Robert Smith, Kep Enderby, Paul Desailly, Dorothy Enderby, Alan Bishop, Donald Broadribb (okulvitroj), Fred Adams, Ralph Harry (okulvitroj), Max Wearing, Erin McGifford, William Olsen.

Meza vico: Lydia Greig, Tomoko Yashinaga, Dave Dewar (okulvitroj), Snorre Benam, Eileen Olsen, Herb Sweney, Vera Payne, Olive Looman-Breeze, Jenny Bishop, S-ro Oba (antaŭ W. Olsen), Kay Dobson, Brad McDonald.

Antaŭa vico: David Rockell, Donald Rogers, Max Fliff, Frank Swift, Jackie Fox, Midori Ai, Joyce Hill, Irene Rae.

RAPORTO PRI LA AEA-NZEA KONGRESO EN NOV- ZELANDO

Raportas Kep Enderby

Kiel antaŭe aranĝite, okazis inter la 3a kaj la 10a de januaro en Aŭklando, Nov Zelando, la dua komuna jara kongreso de la Aŭstralia Esperanto Asocio kaj de la Nov-Zelanda Esperanto Asocio. La unua komuna Kongreso en la aktuala periodo de nia movado okazis en Richmond apud Sidnejo en 1992.

Mi traktos ĝin kiel unu Kongreson ĉar kvankam ambaŭ Asocioj havis siajn apartajn komitatajn kaj ĝeneralajn jar-kunsidojn, ĉiuj aliaj kongreseroj okazis komune.

Mi feliĉe povas raporti ke la tuta afero okazis glate kaj sukcese kaj ke, laŭ mia observo, ĉiuj partoprenintoj ege kontente foriris hejmen je la fino.

45 Esperantistoj ĉeestis; plejparte el Nov Zelando sed kun 11 el Aŭstralio, 9 el Japanio (inkluzive de unu familio), 1 el Danlando, 1 el Norvegio, kaj 1 el Meksiko. Estis tre agrable revidi John kaj Nadia Abood kun sia belega nova fileto Nesan, kiu preskaŭ certe denaskiĝis Esperantista. Jennifer Bishop laboris longhore instruante nian karan lingvon al du japanaj infanoj.

Eble estas maljuste al iuj, speciale menciitajn kiuj laŭ mia opinio meritas specialajn dankojn pro la sukceso, sed akceptante tian riskon mi laŭdus kaj donus specialajn dankojn al ĉiuj Nov Zelandanoj kiuj okazigis la kongreson, aparte al David Rockell, la prezidanto de la Nov-Zelanda Asocio, Bradley MacDonald, Fred Adams kaj Brian kaj Jackie Fox. Mi speciale menciis Jackie Fox ĉar ŝi laboris multege kvankam ŝi ne

estas Esperantistino. Inter la Aŭstralianoj, mi menciis speciale Donald Broadribb kaj Vera Payne, kiuj gvidis lingvajn kursojn, kaj Jennifer Bishop. Nia ĉieulo, Max Wearing, ankaŭ ĉeestis kaj ege meritas niajn dankojn pro siaj laboroj.

La programo estis plena de interesaj eroj:

Sap-skatolo; Donald Broadribb prelegis pri sonĝoj; oratora konkurso; Esperanta *Scrabble*; teama debato inter Nov Zelando kaj Aŭstralio pri "Ĉu Aŭstralio fariĝu la Okcidenta Insulo de Nov-Zelando?"; drama konkurso; kaj kompreneble la necesaj kunvenoj de la komitatoj kaj jar-kunvenoj de la du Asocioj. Feliĉe, Aŭstralio, dank' al Ray Ross, havis kvorumon, sed nur ĉar Ray kunportis sufiĉe da prokuroj por ebligi tion. Ne surprize, viglaj diskutadoj ankaŭ okazis pri la venonta UK en Adelajdo. Estis iom malkuraĝige aŭdi la opinion ke, verŝajne, ne pli ol 12 Nov-Zelandanoj ĉeestos en Adelajdo en 1997.

Fakkunvenoj de la Bahaanoj, SAT-anoj kaj aliaj ankaŭ okazis.

La bankedo estis granda sukceso kaj ĝuiga, speciale por mi kaj Donald Broadribb, ĉar ĉe ĝi ni ricevis la honoran ordenon "Fratulo de AEA". Pro siaj longatempaj kontribuoj al AEA, tri el niaj membroj kiuj ne povis ĉeesti la Kongreson, John Moore, Margaret Chaldecott kaj Owen Loneragan, iĝis dumvivaj membroj de AEA. Jennifer Bishop ricevis la Medalionon Torr pro siaj laboroj specife pri la projekto "Ek-

paroli”.

Rilate al publika informado dum la Kongreso: Bradley Macdonald sukcese aranĝis intervjuon por mi kun naciradio-programa intervjuisto, Wayne Mowett, en kiu ni pridiskutis Esperanton kaj la Kongreson. Brad informis min ke li preskaŭ tuj poste ricevis la unuan demandon de aŭskultinto pri kiel lerni Esperanton.

La Kongreso havis ekcitan, ege plezurigan finon:

Niaj NZEA-aj gastigantoj aranĝis viziton al Maoria *Marae* (Kunvenejo). Tie ni ricevis la tradician kaj timige defian *Wero* (ceremonia defio deklari ĉu ni venis pace aŭ atake) de Maoria batalisto. Post nia akceptiĝo kiel amikoj kaj ne malamikoj, sekvis elkora bonvenigo, kaj post tio, distra Maoria kantado-kaj-dancado. Dum nia restado, ni manĝis tradician en la tero kuiritan manĝaĵon kiu nomiĝas *Hangi*. Kiel ero de la dancado, Maoriaj batalistoj “minace” kaj vigle faris

la ceremonian *Hakan*. Je la fino, ili kantis angle kaj Maorie “Nun estas la Horo”, kaj ni responde kaj reciproke kantis ĝin Esperante.

Je la fina tago, post la fermiĝo de la Kongreso, pluraj postrestantoj vizitis la faman Aŭklandan Maorian Marmuzeon, kaj poste ĉiuj prame vojaĝis al la eksterhavena vulkana insulo Rangitoto. Per helpo de traktora trenvagonaro, ni supreniris al la supro de tiu unika vulkanroka insulo kaj rigardis la grandan belegan havenan vidaĵon.

Resume, plej sukcesa kongreso!

Postnoto: Dum la AEA-kunsido mi informis pri la iniciativo en Perto de Idyss Einihovici, kiu aranĝis kaj okazigis la instruadon de Esperanto en Montessori-lernejo ĉijare. Kaj mi ankaŭ oficiale anoncis mian ekziĝon el la Ekzamenkomitato (kaj konsekvence el la posteno de prezidanto de tiu komitato) pro personaj kialoj. —(E)



LA SOMERLERNEJO EN ADELAJDO JANUARO 1996

De Terry Manley

Dum la eskursantoj ĝuis sian rondiron de la belega Insulo Kanguruo, la aliaj partoprenintoj de la 12a Aŭstralia Esperanto-Somerlernejo pretigis siajn vojaĝojn hejmen. Post du semajnoj dum kiuj “oni enmetiĝis en konstantan fluon de parolado Esperanta” (Ron Gates), ni kun sento de kontento interbabilis pri la “tre amikeca etoso” (Regina Grzebowski), la “manko de krokodiluloj” (Dudley Parkinson), la “eblo interparoli kun

alilingvanoj” (Hazel Green) kaj “granda Aŭstralia aventuro inter tre afablaj homoj” (Katalin Smideliusz).

Sepdek unu personoj partoprenis la somerlernejon ĉijare. Kvindek naŭ lernantoj partoprenis kursojn. Tri eksterlandanoj partoprenis: Dano, Hungaro kaj Polo. Krom tiuj vizitis nin 4 Poloj kaj Koreano (filo de So Gilsu).

La lernantoj taksis la nivelon de la instruado tre alta kaj kontentiga. In-

struis Katalin Smideliusz en la 1a, 2a kaj 4a niveloj; Jenny Bishop en la 2a kaj 3a niveloj; kaj Marcel Leereveld en la 3a kaj 4a niveloj. Katalin instruis la komencantojn per preskaŭ pura Cseh-metodo, kiu estas rigardata de multaj el la altnivelaj kursanoj. En la 4a nivelo ŝi instruis pri la plej oftaj parol-eraroj de ni (la manko de akuzativoj kaj kien meti *ankaŭ*

kaj *nur* en frazoj, ktp). Per siaj famaj trompofrazoj ŝi trompis multajn el ni (ŝi kolektis de ni, kies denaska lingvo estas la Angla, malfacilaĵojn Esperantajn). Ni lernis pri la historio de la Cseh-metodo kaj ties uzado, kaj pri la nuntempa socia situacio en Hungario. Kaj ĉion ni lernis per klare prononcata Esperanto.



Katalin Smideliusz kaj Jennifer Bishop ĵus ricevis donacetojn de la dua-nivelaj klasanoj.

Fotis Margaret Furness

Jenny Bishop gvidis kaj instigis la 2- kaj 3-nivelajn kursanojn pri lokaj vidindaĵoj en Adelajdo. Ege interesa kaj praktika ekzerco celanta la 1997-UKon en Adelajdo. La kursanoj tradukis turistajn broŝurojn kaj studis la plej allogajn vidindaĵojn de la urbo. La 3a-nivela grupo gvidis ekskursetojn en la urbocentro. Alia prov-ekskurso okazis laŭ la Rivero Torrens per biciklo.

Marcel Leereveld plene saturis siajn studantojn en/per/sub gramatiko. Kiel partoprenanto de la post-tagmeza kurso instruita de Marcel (ne *far* aŭ *fare de*) mia gramatika kompreno multe progresis. Li donis al siaj studantoj fortan bazon pri la

Fundamento, por ke ili povu “ĝuste uzi Esperanton”.

Intertempe okazis ekskursoj: al Port Adelaide, al Claire Valley, kaj al Kangaroo Island.

Mi akompanis 19 aliajn Esperantistojn al Claire Valley kie ni vizitis grandan vinfarejon, gustumis vinon kaj piknikis. Poste ni vizitis imponan domegon Martindale Hall, konatan pro sia apero en la filmo *Picnic at Hanging Rock*.

Vesperaj programoj plenplenaj de diskutindaj, rigardindaj kaj laŭdindaj temoj: Kiel okazigi nacian vesperon ĉe la Kongreso; la laboro de gesinjoroj Bishop pri la projekto “Ekparoli”; Monda Turismo, de Sin-

lorino Grzebowska; la Korea geedziĝo de gesinoroj Turvey; la Varsovia Kongreso kaj ĝenerala programo de Universalaj Kongresoj; Esperantaj gazetoj; la sapskatolo kaj komuna kantado ĉe la trinkejo; rimoj, rakontoj kaj la memorinda teatraĵeto

de Profesoro Gates... kaj finfine la festmanĝo sekvita de dolĉasonaj voĉoj de la ĝoro, disdono de atestoj, dancado kaj piroteknika spektaklo! Ĉu nur hazarde okazis la spektaklo tiel akurate je la fino de nia sukcesplena afero?

Terry Manley kolektas pinnuksojn, okaze de la ekskurso al Claire Valley.



[Postnoto: dum la Somerlernejo Max Wearing montris vidbendon pri la jubilea Kongreso. Ĝi estas tre

instiga, kaj mi sugestis al Max ke eble ĉiu klubo vidu ĝin.—Margaret Furness



LA PROGRAMO SUPERSIGNO



Supersigno v2.1, Esperanto Utility for Windows de Mark Hayward kaj Jeff Hayward. Eldonis la Libroservo de AEA. IBM-kongrua disko HD (1.44 Mb) 3.5-cola. Prezo: \$3.00, de la Libroservo de AEA.

Por uzantoj de *Windows 3.1*, ĉi tiu programo definitive solvas la konatan problemon de manko de ĉiuj necesaj literoj por komposti dokumentojn en Esperanto. Aliaj devos aliloke trovi solvon. Bedaŭrinde, la sistemo ne rekte taŭgas por *Windows 95*.

La metodo uzata estas genia kaj simpla. Anstataŭ rekte distribui li-

tertempojn kiuj enhavas la mankantajn literojn por ĉiuj litertipoj en la mondo, la litertipoj jam troviĝantaj en la komputilo de la aparta uzanto estas kopiataj kaj modifataj, per sufiĉe simplaj algoritmoj, tiel ke la mankantaj literoj estas kreataj laŭ la modelo de la ekzistantaj, ne supersignitaj literoj. La novaj literoj anstataŭas aliajn malofte uzatajn signojn de la litertipo, laŭ la ISO-normo 8859/3 (*Latin-3*) aŭ laŭ la prefero de la uzanto mem. Mi forte rekomendas la uzadon de *Latin-3*, tiel ke ne necesos ke redaktoroj eksperimentu por eltrovi la individuajn preferojn de

ĉiu kontribuanto. En “nudaj” dokumentoj (tekstodosieroj) la supersignitaj signoj troviĝos en pozicioj kiuj respondas al signoj de la IBM-signaro neniel similaj al la literoj kiujn ili anstataŭas. Tio estas neevitebla; dum la komputila mondo restas dividita inter la sistemoj *IBM* kaj *Macintosh*, traduki ĝenerale eblas nur pere de tekst-dosieroj.

Por enmeti superskribitan literon en la tekston, oni premas “mortan klavon” kaj poste la ekvivalentan ne superskribitan literon, aŭ majusklan aŭ minusklan. Forigo de tiaj literoj okazas laŭ la normalaj manieroj, kaj ĉe ĉiuj aliaj operacioj ili kondukas tute same kiel normalaj literoj. Kiel mortklavoj povas esti uzataj la signoj ` , £ , ~ aŭ kombinaĵoj de ĉi tiuj. Por la IBM-klavaro la ` estas plej facile uzebla, ĉar ĝi staras en minuskla pozicio (ne necesas premi samtempe la majuskligan klavon).

Mi trovis la jenajn, ne tre gravajn mankojn:

1. La litertipo *Arial* montras du-punktojn anstataŭ cirkumfleksojn ĉe majusklaĵ C, G, S en grandeco 10 punktoj kaj ĉiuj stiloj. Sed, strange, ĉi tio ne montriĝas ĉe pli nek malpli da punktoj, kaj la tipo restas uzebla ĝis 8 punktoj.

2. La litertipoj *Script* kaj *Roman* montras nerekonoblajn signojn anstataŭ la superskribitajn literojn.

3. ĉe la litertipoj *Terminal* kaj *Times New Roman*, je malgrandaj punktoj, la ĉefaj partoj de la superskribitaj majuskloj estas malaltigitaj tiom ke ili estas distingeblaj de la minuskloj nur laŭ formo.

La instalprogramo estas rapida kaj preskaŭ memklariga. La instalitaj dosieroj (ekskluzive de la modifitaj

litertipoj) okupis 1.25 MB sur mia durdisko. Instrukcioj estas haveblaj en la Angla kaj en Esperanto laŭ elekto en la instalprogramo, same kiel en la instalita programo. Kaj ĉi tie mi trovis la ĉefan mankon de la programo: la tekstoj en Esperanto ofte ne estas tute facile kompreneblaj. Ĝenerale la stilo estas forte Angleca, tiom ke vortoj kiuj havas specialan teknikan signifon en Esperanto anstataŭas elementan vorton, ekzemple, “selekti” anstataŭ “elekti”¹. Sed la celkonscia neanglaparolanto sendube trabatos al si vojon por kompreni.

La instalprogramo provizas la eblecon fari novan kopion de la tuta programo mem, tiel ke ne necesas mendi novan ekzempleron de la Libroservo; sed se la komputilo uzata por fari la kopion aktuale enhavas viruson, do la kopio estos infektita. Mi opinias ke estus pli bone ne doni ĉi tiun eblecon, sed lasi la funkcion al la normalaj utilaj-programoj de DOS mem (ekzemple *Diskcopy*). □

¹ Por la speciala komputila signifo de “to select”. Pokrovskij en sia *Komputika Leksikono* proponas “apartig”, kio povas tamen esti miskompreniga. Temas pri permusa indiko de elemento (litero, signo, teksto) pri kiu la komputilo sciu ke tiu elemento estas pritraktenda—ekz. kursivigenda, forigenda, ks. Ĉu iu povas proponi taŭgan Esperantan formon?—(DB)

AŬSTRALIAJ INSTRUISTOJ DE ESPERANTO

Preparis Jennifer Bishop

Modern communications

During the 12th Australian Esperanto Summer School, discussions about the use of computers by Esperantists were often heard. The ability to access the Internet, the ease of using e-mail and the overseas connection were all talked about. More than 10 Australian Esperantists are already using e-mail addresses and the number is increasing gradually. Even without computer access, the use of telephones and fax machines means that information can be exchanged faster than ever before. For teaching purposes, being able to access information quickly and accurately must be a priority for all of us.—Jay Grant

Pri lingvolernado: koincido

Dum Aŭstraliaj Esperantistoj kongresis lastajare ĉe Southport School, okazis samtempe la Immersion Language Teachers' Association Conference. Kelkaj Esperantistoj ĉeestis tre interesajn prelegojn pri lingvo-instruado per tutmergado en la elektitan lingvon. La instruistoj instruas la lingvon mem, sed per la elektita lingvo instruas ankaŭ aliajn studentojn. Dum la konferenco redaktoro Michael Berthold lanĉis libron *Rising*

to the Bilingual Challenge. La antaŭparolon verkis Joseph Lo Bianco, direktoro de la National Languages and Literacy Institute of Australia. Michael Berthold, de la Universitato de Suda Kvinslando, gajnis siajn proprajn spertojn plejparte en Kanado.—Dianne Lukes.

Atentu Ĉiuj Instruemuloj!

Bonvenon al la unua numero de Aŭstralia fakinformilo pri instruado kaj lernado de Esperanto je ĉiu nivelo. La motoro estas Max Wearing, kiu kunvenigis interesatojn en la Somerlernejo de Esperanto ĉijanuare por esplori la eblon fondi Aŭstralian Ligon de Esperantistaj Instruistoj. Deko da partoprenintoj vigle subtenis la principon sed ne tuj povis sin dediĉi al ties administrado, do decidis esplori la eblecon de eldonado de informilo kvarfoje jare, enpoŝtigata kun *ESK*. Por komenci oni tuj donis monkontribuojn al la AEA helpkasisto Dianne Lukes. Se vin interesas kontribui kaj daŭre ricevadi nian informilon, bonvolu enskribi kaj sendi la ĉisuban slipeton al Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. □

Aŭstraliaj Instruistoj de Esperanto

ĉe Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122

Bonvolu taŭge plenskribi/forstreki

Mi/Ni (nomoj) _____ deziras ricevi la novan informilon.

Adreso _____

Mi/Ni interesiĝas / ne interesiĝas pri membriĝo en nova asocio ligota al ILEI.

Subskriboj _____

LA ŜVARCAJ ANALOJ DE 1995

De Diplodoko

La jaro 1995 estis, kiel kutime, periodo de sismoj, de naturaj kaj homfaritaj tertremoj.

En la lando de la leviĝanta suno kaj de krizاناتoj okazis en Kabe sismo kiu detruis multajn konstruaĵojn kaj ne malmulte da homoj. Ankaŭ en tiu ĉi jaro okazis en la ĉefurbo perturbaĵoj inter la politikistoj, kiuj reciproke akuzis unu la alian pri konduto ne taŭga por reprezentanto de la popolo.

Ĉar estis la 50-a datreveno de la fino de la Dua Mondmilito oni rememoris, i.a., la faligon de la unuaj atombomboj en Hidoŝimon kaj Naĝosakon. Logike oni insistis ke la Krizاناتemuloj petu pardonon pro sia agreso kontraŭ la Aglolandanoj kaj ne inverse.

En Aglolando estis grava eksplodo en registara konstruaĵo en Onklohejmo, en kiu pluraj senkulpaj homoj mortis. Neniu pretendis la gloron de tiu afero, sed oni supozis ke la kulpuloj estis anoj de unu aŭ alia neoficiala armeo kreita por insisti ke laŭ la federacia konstitucio ĉiu civitano havas la absolutan kaj eternan rajton porti armilojn.

En la ĉefurbo la konflikto inter la popolo elektita prezidento kaj la popolo elektita parlamento daŭris. La buĝeto kiun proponis la kongresanoj estis vetoita de la prezidento, kiu resendis ĝin kun mesaĝo klin-tone. Ĉar ne estis akordo pri la buĝeto, miloj da funkciuloj havis longan ferion, kaj la publiko suferis. Vizitontoj al Aglolando ne povis akiri

vizojn kaj la turisma industrio velkis.

En Ursolando la prezidento mem devis havi longan ferion, laŭ la konsilo de la kuracistoj. Dum li feriiis okazis balotado por la parlamento. La konservatuloj, kiuj deziras reiri al la bone konata sistemo de Marksisma-Leninisma socialismo, gajnis la plimulton en multaj distriktoj, kaj per la helpo de proporcia balotsistemo havus 20% de la seĝoj en la parlamento. Sed ĉar estas ĉielarko da partioj, Prezidento Jaltasino anoncis ke la politiko de la registaro estos tute neŝanĝita, kaj ke li estas tre memfida pri la rezultoj de la balotado por prezidento en 1996.

En la antaŭe Liliflora nun trikolora Respubliko okazis du sismoj:

(1) Oni decidis, kaj Prezidento Jakobo Ĉiratako anoncis, ke oni devas denove provi atomajn armilojn ne en la metropolo sed en la kompatinda pafeika atolo Muro Ora, spite al la protestoj de la kivioj kaj la kangurooj. Provo sekvis provon sen rigardo al la estonteco kiam la polua radiado verŝajne eskapos. Eĉ la batalantoj de Verda Paco ne konvinkis la Ranmanĝantojn, kaj perdis unu-du ŝipojn observantajn.

(2) Estis sismo ankaŭ en la metropolo kie miloj da homoj strikis pro la decido malpliigi la sociajn pagojn al homoj kiuj bezonas helpon. La subteraj trajnoj ĉesis funkciadi kaj oni devis veturi aŭtomobile aŭ bicikle aŭ transporti sin piede. Je la fino de la jaro tuta solvo ankoraŭ ne estis trovita.

En Brutio kaj la monarkio kaj la registaro ŝanceliĝis. La heredonta princino Diana, kiu loĝas sola en sia palaco sed vizitas gimnazion por sin ekzerci, anoncis ke ŝi iam amaris nereĝulon sed ke ŝi deziras resti princino kaj fariĝi korreĝino kaj ambasadorino de paco. Oni rigardis amase ŝian televidan intervjuon. La heredonta princo Karulo akceptis la konsilon de sia patrino, la reĝino, ke li eksedziĝu. Inter la tertremoj la popolo debatis ĉu divorcita princo rajtos reedziĝi en oficiala preĝejo en Brutio aŭ ĉu li devos iri al Kiltlando. Kelkaj landoj kiuj ankoraŭ havas tiun saman monarkon kiel ŝtatĉefon, demandis al si ĉu Kamomila aŭ Kamelia estus bona nomo por ilia reĝino!

En la Balkonoj estis dramecaj eventoj, eĉ armila konflikto. Oni denove praktikis la proceduron "Etna Purigado" kie la etnoj estis miksitaj. La Slavunio kaj la Kronatio evoluigis siajn sendependajn politikojn. La Kronatoj helpis siajn ismajn amikojn, la Boŝanojn, kontraŭ la Cerbuloj. La packonservaj trupoj de Unuiĝintaj Nazioj ne multe helpis ĉar ne ekzistis paco por konservi. Sed fine Aglolandanoj trovis solvon. Ili invitis la prezidentojn de Kronatio, Boŝo, kaj Cerbio al sia lando, al kunveno en Tagtono, en OH 10. Oni interkonsentis pri bazo de paco, kaj Aglolando sendis 20 000 soldatojn sub la Steloj kaj Strioj al la foraj Balkonoj. La alianculoj de la Trakto de Norda Atlanto ankaŭ helpis. Je la fino de la jaro la armistico baskule daŭris.

En Sudorienta Azenio la Indronacianoj havis kelkajn kverelojn kun Kangurulando pri la situacio en la

insulo Orienta Timo. Subtenantoj de sendependeco por Orienta Timinsulo invadis plurajn ambasadejojn en Jahurto petante azion. Ĉar la Portala Registaro argumentis en la Internacia Kortumo ke Orienta Timo ankoraŭ estas ĝia kolonio, oni aranĝis ke la aziserĉantoj iru al Lesbanino. La registaro de la najbara Kangurulando proponis ke povus esti en Timo malpli da armeanoj kaj pli da aŭtonomio. Tamen la armeoj de Kangurulando kaj Indronacio kune ludis militludojn kaj la du registaroj subskribis interkonsenton pri reciproka konsultado pri eventualaj minacoj al iliaj sekurecoj! La kangurua ĉefministro Paŭlo Kitino kaj la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Garuda-Garuda Evaneso, kandidato por la posteno de Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nazioj, vizitis Jahurton por akiri novajn batikĉemizojn.

En Kangurulando diskutado daŭris pri la ekefiko de la leĝo akceptita de la registaro de Nord-Teritorio pri eŭtanazio. Proponita simila leĝo en AĈteritorio malsukcesis. La kuracistoj, kiuj devus funkciigi la sistemon por doni al la mortontoj la rajton morti digne, timis la respondecon kaj kontraŭis. La serĉado al honesta policano kaj modesta politikisto daŭris. La konstruado de naĝejoj kaj stadionoj por la Olimpiaj Ludoj de la jaro 2000 okazis laŭ la planoj. Oni komencis preparan propagandon por federacia balotado frue en 1996.

Nur en Esperantio estis ne gravaj sed nur gravuraj tertremoj. La Esperanto-Movado majeste, se iom maljuniĝante, antaŭeniris. En la Universala Kongreso en Tamponejo, en julio, oni festis la 50-an datrevenon

de la starigo de Unuiĝintaj Nazioj. Dum la adultoj faris tuttagan ekskurson la junuloj partoprenis en modela Ĝenerala Asembleo pri la rajtoj de minoritatoj. Laŭ la modelo de UN ĝi ne sukcesis akcepti rezolucion, sed oni multe parolis, tre trafe. Oni petis pacon kun la sekvantantoj de Ivo Lapenna, la kontraŭkomunista Prezidanto de la 60-aj jaroj. Kaj la unuan fojon en la historio de la movado oni elektis korlandan prezidanton. Oni salutis unu la alian per la krio: “Ĝis Pago en 1996!” □

[Postnoto: ĉi tiu antikva teksto, trovita sur rompita argila tabeleta, verŝajne apartenas al la fino de la rakonto pri Reĝo Karoto en la Eposoj ugaritaj¹ de nia Reaktoro en 1995. Mi ne modernigis la antikvajn nomformojn transskribante ĝin. Ĉar multaj personoj demandos ĉu la teksto aperos felietone en nia gazeto, mi jam nun informas ke ĝi estas ne-serioza.—Odlo Bokserp.]

¹ *Ugari* = redakti tekston dum oni fumas cigaron.—OB.



Vidu paĝon 27

;

LINGVA ANGULO De Alan Towsey



LA UZO DE OL

La uzo de ol unuavide ŝajnas tute simpla: ĝi ja signifas *than*, ĉu ne? Do kial estas problemo?

Generale, ne estas problemo: *Li estas pli granda ol mi*. Sed en Esperanto eblas fari subtilan distingon, kiu ne ĉiam estas ebla en la Angla sen ia aldono al la frazo. Ekzemple: “I love her more than you” povas esti miskompreniga, se oni ne aldonas klarigajn vortojn:

1. I love her more than you *do*.
2. I love her more than *I love* you.

En Esperanto:

1. Mi amas ŝin pli ol vi (amas ŝin).
2. Mi amas ŝin pli ol (mi amas) vin.

Notu ankaŭ: *Li romp*is la hufferon pli facile ol infano kringon. (He broke the horse-shoe more easily than a child *breaks* a bagel)

La en la Angla aldonitaj vortoj ne necesas en Esperanto; la ĝusta uzo de la akuzativa finaĵo *-n* faras la sencon tute klara. Komparu:

1. Unu kanibalo povas manĝi pli ol du blankuloj.
2. Unu kanibalo povas manĝi pli ol du blankulojn!

Laŭ *PIV*—kaj ĉi tie mi tradukas ties iom kompleksan regulon, por ke ĉiu bone komprenu—“If the two things being compared do not belong to the same grammatical category (e.g., noun/adjective v. verb, etc.), and the second consists of a complete clause, that clause is introduced by: ol ke, ol kiam, ol kiel, ol kiom, ol se,

etc., according to the sense.” *PIV* tiam donas la jenajn ekzemplojn:

1. Estas por mi nenio pli bona, ol ke mi forkuru.^z
2. Pli bone estas, ke la komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon^z... (It is better for the committee to do too little than for it to airily take some step...).
3. Liaj instrukcioj estas tro konfuzaj, ol ke mi povus ilin ripeti. (... too confusing for me to be able to repeat them).
4. Ne elspezu monon pli frue, ol kiam vi posedas ĝin.
5. Mi havas pli bonajn okulojn, ol kiel oni pensas.^z
6. Pli granda estas mia puno, ol kiom mi povos elporti.^z
7. La signaloj estas miloble pli fortaj, ol kiom montras la teorio.
8. Pli bone estas iri seninfana en la ĉielon, ol se ambaŭ, la patro kaj la filo, iras en la inferon.^z

Nu, ni ekzameni ĉi tiujn ekzemplojn.

1. La *por mi* ne necesas; sed se ni konservas ĝin, ni povus pli simple diri: “Estas por mi nenio pli bona ol forkuri.”

2. Ĝusta.

3. Pli kutima estas: “... tro konfuzaj, por ke mi povu...”

4. Pli simpla estas: “Ne elspezu monon antaŭ ol vi posedos ĝin.” (Vidu “Lingva Angulo” en *ESK* Jan.-Feb. 1996)

5/6/7. Laŭ la principo de neceso kaj sufiĉo, *kiel* kaj *kiom* ne ŝajnas al mi necesaj -- la frazoj estas tute klaraj sen ili. Efektive, *PIV* rimarkigas “En siaj unuaj verkoj *Z* uzas la simplan *ol* kun la senco de *ol kiom*: ‘Ekzistas en Ĉiel’ k sur la tero pli da aferoj, ol en la lernejoj instruas filozofoj.” Tion konfirmas *PAG* 262, Rim. V): “Tiujn [rilativojn] oni nun ĝenerale ellasas, ĉar la uzo de nura *ol* neniam estigas konfuzon.”

8. Mi preferas la uzadon de (2): “... *ol* ke ambaŭ ... iru en la inferon.” (than that both ... should go to hell).

Notu ankaŭ la uzon de *ol* en la jenaj ekzemploj:

Mi preferas mem morti, ol mortigi senkulpulon. (I would rather die myself than kill an innocent person)

Ili eble elektos alian solvon, ol ni elektis.^z

Ĉi estis tute alia, ol kiel li ŝin imagis al si.^z (Oni povus eksterlasi *kiel* sen ia malklarigo)

Li havas malsaman karakteron ol lia patro.^{PIV}

DA

Ie mi notis: “La nombro da ili estas ne tre granda.”

Da ne povas esti uzata kun la personaj pronomoj *ni*, *vi*, *ili*. (Vidu “Lingva Angulo”, *The Australian Esperantist*, Jan.-Feb. 1992). Pli bona estas: Ilia nombro ne estas tre granda, aŭ, eĉ pli simple: Ili ne estas multaj.

“GRASS ROOTS”

En *ESK* de Nov.-Dec. 1995, nia redaktoro komentis pri “grasradika”, per kiu oni evidente intencis traduki

la Anglan “grass roots”, kaj rimarkigis, ke “*gras* en Esperanto havas tute alian signifon!” (= fat!)

Kiel do traduki la vorton? La vortaro de Benson donas “popolbaza”. Mi proponas ankaŭ “popolnivela”. Ambaŭ konformiĝas al la difinoj en diversaj Anglaj, Francaj, Germanaj kaj Nederlandaj vortaroj.

TERMINAL

En sia interesege rakonto “Falsa Pasporto” (*ESK* Jan.-Feb. 1996) (pensigas pri la *X-Arkivoj!*), nia estimata redaktoro skribis (p. 6): “Antaŭ ol ni atingis la ĉefpordon de la *flugterminalo* ...”

Tiu *flugterminalo* interesis min, ĉar antaŭnelonge mi diskutis kun Prof. Ron Gates konvenan tradukon por *air terminal*. Laŭ la plej nova *Shorter Oxford English Dictionary*, *terminal*, en ĉi tiu senco, estas difinita per: “departure and arrival building for passengers at an airport.” Por tio do Ron proponis “pasaĝerejo”, kiu ja taŭgus, kvankam por mi tiu vorto ankaŭ sugestas “passenger area”, kaj mi rimarkigis al li ke en la Angla oni ofte iom neprecize uzas *international/domestic terminal* en la senco de simpla *airport* (flughaveno). La plej multaj flughavenoj certe ne estas “finstacioj”, ĉar aviadiloj alvenas kaj poste flugas pluen al aliaj flughavenoj. Se oni volas esti pli preciza, eble oni povus uzi “flughavena konstruaĵo / pasaĝerkonstruaĵo”.

Laŭ *PIV* (*Suplemento*), *terminalo* estas “aparato por daten-enigo¹ k/aŭ daten-eligo, konektenda al reganta procesoro.”

¹ = entering data (into computer). —[d]

Ĉu iu povas proponi pli precizan tradukon?

Rikolto de strangaj vortoj (Jan.-Feb. 96)

besedoj: Vera Payne pravas; ĝi estas slavismo. Laŭ mia Rusa vortaro, *bjesjeda* = conversation, discourse, colloquy, dialogue; company, assembly, kaj laŭ mia Ĉeĉa vortaro, *beseda* [informal] = gathering, party; open forum, discussion group. Do, nenecesa vorto. Sed kial *Hispano* uzis ĝin?!

multimedia: Kiel traduki? “plur-komunikila”?

telematike: Franca *télématique*, Itala/Hispana *telematica* = telematics = (laŭ *OED*) “(the branch of information technology which deals with) the long-distance transmission of computerised information.” Do, “via the Internet”!

pasumaĝis: Mi povas trovi neniun similan vorton en vortaroj de pli ol 15 Eŭropaj lingvoj, inkluzive de la Estona (parenca al la Finna). Finna amikino mia, kiu ankoraŭ bone scipovas sian lingvon, ne rekonas ĝin.

PARTICIPADO

Mi esperas ke mia kolego Marcel Leereveld permesos al mi komenti pri lia bonega klarigo de la participoj en *ESK* Jan.-Feb. 1996.

Por mi, *fermatas* / *fermatis* havas la saman signifon kiel *estas* / *estis* *fermata* (= is/was being closed). “The door gets closed” mi prefere tradukus per “La pordo fermiĝas”, kiu egalas ankaŭ “The door closes” (kie la *kaŭzo* de la fermado ne estas sciata). “La pordo estas fermita” = The door has been closed / The door is (already)

shut.

Memoru ke oni ne uzas *de* post -iĝi-verboj, nur post la vera pasivo: La pordo estas fermata de mi.

LOGIKO (kaj “far”) Fine, mi aludas al la komentoj de nia estimata redaktoro pri la eseo de Ron Gates “Pri la mortigo de Esperanto” (*ESK* Jan.-Feb. 1996, p. 12).

Donald pravas dirante ke “Logiko...tre malfacile aplikiĝas al lingvo-uzo.” La naturaj lingvoj evoluis en tempo kiam la homaro ne komprenis la mondon ĉirkaŭ ni tiel science kiel ni nun. Sed Esperanto estis kreita antaŭ nur iom pli ol cent jaroj, kaj estis konstruita—post longa sperto de la nekonsekvenco de la “naturaj” lingvoj—sur pli (sed ne perfekte) logika bazo. Tamen, eĉ en Esperanton, eble pro la influo de la “naturaj” lingvoj, enŝteliĝis pluraj nelogikaĵoj.

Mia nuna sinteno pri lingvaj problemoj en Esperanto estas ĉi tiu: se la uzado ĝenerale favoras iun solvon, mi akceptas ĝin; sed kiam la uzado ankoraŭ hezitas inter tiu aŭ alia, mi preferas la plej logikan solvon.

Kaj mi ne samopinias kun Donald ke “logiko...estas nur inventaĵo de Aristotelo.” Aristotelo ja la unua kolektis kaj sistemigis la regulojn, kiuj laŭ lia tiam pli limigita observado kondukis al ĝustaj konkludoj. Lian sistemon tamen poste modifis David Hume, John Stuart Mill kaj aliaj filozofoj, kaj tiu modifita sistemo estas la bazo de nia tuta moderna scienca kaj teknologia progreso. Nei la validecon de la logiko estus ne nur paradokso—oni

eĉ ne povas argumenti sen ĝi!—sed ankaŭ reduktus nin al la pensnivelo de la Novepokuloj. Kiu malatentas la logikon sidas baldaŭ en la kaĉo!

Fine, mi kontraŭas *far* nur pro tio ke ĝi tute ne estas necesa. La 6a Regulo de la “Fundamenta Gramatiko” diras tute klare: “La prepozicio *eĉ* la pasivo estas *de*.” Kiel rimark-

igas la Akademio de Esperanto en sia decido de 1987 (*Aktoj III*), se la senco de *de* ne estas klara, oni ĝenerale simple enmetas *fare* antaŭ ĝi tie kie necesas: “la traduko de Hamleto fare de Zamenhof”, kio estas miaopinie multe pli glata kaj belsona ol “far Zamenhof”. □

UNIVERSALA KONGRESO EN ADELAJDO, 1997

Notoj de Margaret Furness

La Centra Oficejo de UEA en Roterdamo havas la rajton regi ĉion presitan pri la kongreso. La LKK demandos ĉu ankaŭ validas tio por informoj per la Internet.

Verkaĵoj

Gaye Phillips faris ĉarman tradukon de libreto *Bib la Koalido* por infanoj—rime, do ĝi estas pli bona ol la originalo.

Ralph Harry verkis kelkajn malnetaĵojn de la *Unua Bulteno*.

Margaret Furness tradukis la enirkaj forir-kartojn de Aŭstralio, kaj la kvaranten-demandaron. Ĉi verkis liston de konsiloj pri longaj flugvojaĝoj, Aŭstraliaj kutimoj, kaj informojn pri Aŭstralio (bankoj, mono, poŝto, elektro) kaj vizitindaĵoj en Adelajdo. Ankaŭ afiŝojn pri domstiloj en Adelajdo, kaj pri eŭkaliptarboj. Ĉi provas fari mallongan vidbendon pri Sud-Aŭstralio, sed rapide trovas ke ne estas tiel facile kiel foti...

Barbara Bruer prilaboras la Infanan Kongreseton, kaj tradukas informfoliojn pri turistaj lokoj ĉirkaŭ Adelajdo.

Marjorie Ellyard kaj filo ŝia verkos priskribon de la suda stelaro.

Ralph Harry verkos aŭ prelegos pri la Angla lingvo en Aŭstralio.

Dum la Somerlernejo kursanoj komencis traduki informfoliojn pri pluraj lokoj ĉirkaŭ Adelajdo.

Jay Grant preparos Esperantolingan mapon de Adelajdo, pere de komputilo.

Ni invitas volontulojn verki artikoloj(et)ojn pri:

La evoluo de pentrarto en Aŭstralio

Australian Rules futbalo

Trafik-regularo; veturado en la forforejo

...kaj kio ajn instigas vin!

La LKK jam decidis ke ĉio presita por la UK devas esti kontrolita pri gramatiko, de du spertuloj; aŭ se verkita de spertulo, kontrolita pri preseraroj de almenaŭ unu alia LKKano. Katalin Smideliusz krome proponis plian kontroladon fare de iu kies denaska lingvo ne estas la Angla. Ĉi volonte faros tion (sed ni prefere ne trolaborigu ŝin!)

Ni ankoraŭ atendas decidon de UEA pri kongresosimbolo. Jay Grant desegnis novajn proponojn, por transsendo al UEA cele aprobon.

Ekskursoj

Ni uzos profesian kompanion por aranĝi la loĝadon kaj ekskursojn, senpage.

Ni invitas **volontulojn por ĉiĉeronado** de la postkongresaj ekskursoj (kaj eventuale por la tuttagaj kaj tranoktaj ekskursoj). La UK pagos la ekskursokoston de la ĉiĉerono, plus malgrandan sumon, sed ne la flugkoston (escepte de la ekskurso al Kanguru-Insulo). Ĝenerale, la grupoj ne havos pli ol po 30 personojn. Ĉiu ekskurso estos profesie organizita; la ĉiĉerono nur tradukos. Ralph Harry proponis ke estos eble antaŭe traduki kaj surbendigi grandan parton de la komentario.

Provizore:

Komenciĝos sabate, posttagmeze, postkongrese:

Malatekosta ekskurso al Kanguru-Insulo, 2 tagojn, per pramo. (Ne taŭgos al tiuj kiuj emas al vojaĝmalsano. La tuttagaj ekskursoj al KI je la merkredo de la UK, kaj eble la antaŭan sabaton, iros per aviadilo.) + Eble, simila ekskurso por rulseĝuloj, se kelkaj venus.

Komenciĝos dimanĉe, postkongrese:

3-taga busvojaĝo Coorong/Naracoorte / Great Ocean Rd / Melbourne

5-taga perbusa geologia ekskurso al la Montaro Flinders

Uluru-Kata Tjuta 2-3 tagoj (fluge)

Ni ankaŭ bezonos eble 2 personojn por gvidi turistojn en Sidnejo dum 2 tagoj post la kongreso (kaj 2 personojn dum 2 tagoj antaŭekongrese).

Komenciĝos marde aŭ merkrede, depende de la flugoj post Uluru:

Cairns/Reef/Daintree, 5 tagoj. Se iu kuraĝos, ni povus proponi duan tian ekskurson, enhavantan unu tagon da "white-water rafting".

Darwin/Kakadu, 4-5 tagoj

Brisbane/Insulo Fraser, 5 tagoj

Perth: eble Æ Shark Bay kaj Coral Bay. Se tio estus tro multekosta, oni pripensas anstataŭigi per pribirda ekskurso en la sud-okcidenta regiono—5 tagoj.

Ĝangaloj kaj ŝtatparkaj plaĝoj de norda NSK—4 aŭ 5 tagoj

...plus viaj sugestoj—precipe tiuj por kiuj vi volonte ĉiĉeronos!

Oni planas starigi la ILEI-kongreson en Melburno post la UK. Tio ankaŭ donos eblecojn por ĉiĉeronado.

Poŝto:

Bedaŭrinde, Australia Post findecidis aranĝi por ni nenian filatelaĵon escepte de stampo (*cancellation stamp*). Dum la kongreso ni vendos diversajn poŝtkartojn de Australia Post, kies prezo de \$1.00 inkluzivas aerpoŝton ĉien ajn. Ili estas filatelaĵoj (*maximum cards*). Neniu alia poŝtkarto kapablas konkurenci kontraŭ tiu prezo.

Kontaktu:

Margaret Furness

PO Box 2605

Kent Town SA 5071

Telefono kaj faksoj: 08 363 0436

e-poŝto: furnessm@wch.sa.gov.au □

KIU ESTAS KIU EN LA AŬSTRALIA ESPERANTO-MOVADO?

44. Kep Enderby

Verkis Ralph Harry



Keppel Enderby estis konata en la tuta Aŭstralio kaj eksterlande antaŭ ol fariĝi Esperantisto.

Li estis Ministro pri Justico kaj Konsilisto pri Juro en la registaro de Gough Whitlam en la 70-aj jaroj, kaj ankaŭ Ministro pri Industrio kaj la Aferoj de la Nacia Ĉefurbo de Aŭstralio.

Kep informiĝis pri Esperanto kiam li estis junulo, sed li ne studis ĝin kaj ne havis kontakton tiam kun la movado. Mallonge antaŭ la fino de 1986 mi menciis al li telefone ke mi deziras persvadi la antaŭan Ĉefministron patroni la 100-jaran jubileon de Esperanto. Kep interesiĝis kaj enketis ĉe la Esperanto-Federacio de NSW pri la stato de la lingvo. Li aĉetis lernolibron kaj komencis la grandan aventuron.

Kep kun Doroteo partoprenis en multaj Esperantaj kunvenoj en Aŭstralio—ekzemple, la Somerlernejo en Armidale kaj la Pacifika Kongreso en Brisbano. Li fariĝis vicprezidanto de AEA.

En 1990 Kep kaj Doroteo partoprenis sian unuan Universalan Kongreson en Havano, neforgesebla sperto. Sekvis Oslo, Vieno, Valencio, Seulo, kaj Tampereo.

En 1992 Kep fariĝis prezidanto de AEA. De tiam Kep aktive kaj efike reprezentas la Asocion en registaraj, administraj kaj komercaj rondoj. Li

estas konata kaj admirata ne nur kiel politikisto sed kiel sportisto kaj juĝisto.

Li estis akceptita, kiel amatora ĉampiono de NSW, por ludi en la monde konata British Open (Profesi-amatora Brita Golf-Konkurso), kaj ludis tiun internacian ludon ĝis ribelo de genuo malebligis ĝin.

Kiel juĝisto li estis konata en Sidnejo kiel bona juristo kaj praktika kaj humana arbitraciisto. En sia lasta formala juĝo li enmetis Esperantajn tradukojn de la Latinaj frazoj ŝatataj de Anglaj kaj aliaj juristoj.

Kep daŭre servas la movadon kiel Prezidanto de AEA. Tre grave, li estas prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) por la Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo en 1997.

Samtempe, li elektiĝis en Tampereo por fariĝi prezidanto de la Internacia Asocio de Esperantistaj Juristoj.

Do internacie, same kiel en Aŭstralio, Kep Enderby faris kaj faras gravajn servojn al la Esperantomovado.

Dum la bankedo de la AEA-NZEA Kongreso en Aŭklando, januaro 1996, li proklamiĝis Fratulo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

[La lasta biografieto en ĉi tiu serio, pri Don Pescod, aperis en *The Australian Esperantist*, majo-junio 1988.] □

NOVA NOV-ZELANDA FRATULO: BRIAN FOX

Verkis David Rockell

Dum la komuna AEA-NZEA kongreso en Aŭklando mi anoncis ke Brian Fox DBEA estas nun Fratulo de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Mi prezentis al li la atestilon dum la bankedo.

Brian unue studis Esperanton en Sud-Afriko en 1945. Poste li estis membro de la Sidneja klubo, kaj nun de la Aŭklanda klubo. Ekde 1948 li havas korespondanton en Rusio, kun kiu li plu korespondas.

Li pasigis du jarojn en Ĉinio, kie li instruis la Anglan. Dum tiu tempo li uzis Esperanton kiel la ĉefan komunikilon kun unu el siaj kolegoj ali-

lingvanaj.

Reveninte al Nov-Zelando, li instruis Esperanton al la lernantoj en la Lernejo Northcote Intermediate en 1979, kaj en Rangeview Intermediate inter 1982 kaj 1989. Ĉajnas ke kvarono de la lernejo studis Esperanton.

Eble ni nun memoru lian laboron por NZEA. Li kondukas la Korespondajn Kursojn ekde 1988. En tiu sama jaro li fariĝis vicprezidanto, kaj li tenis tiun oficon ĝis 1991 kiam li akceptis la oficon de prezidanton. Ĉi tiun oficon li tenis ĝis 1995.

Mi estas certa ke vi konsentas ke Brian Fox meritas esti Fratulo. □

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA:

Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428

Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.



- Moacir AVELAR, Av. Tocantins, Anicuns-Go, CEP: 76.170.000, Brazilo. Ĉatas literaturon kaj sciencon. Sendis bildkarton de sia urbo, kaj mem satas la kamparon.
- Ntoto ZOLA, B.P. 86, Meanza Ngungu, Bas-Zaire, Zairo. 21-jara. Deziras monhelpon por studadi ie en la mondo. Ankaŭ deziras Esperanto-revuojn kaj librojn.
- Yolaine Lavanino RODRÍGUEZ, Edificio Apartamento 3, Bloĉue 2, Rajayoga 9 (Reparto), Santiago de Cuba C.P. 30100. 20-jara virino, loĝas kun sia familio, lernanto en la dua nivelo. Ĉatas gazetojn.
- Palmira Sara CUNHA, Avenida João Sedenho no. 283, 14806-075 Araraĉuara, Estado de São Paulo, Brazilo. 49-jara, edzino, dommastrino, lernanto. Ĉatas homojn, vivon, bestojn.
- Mara TIMERMANE, Kr. Valdemara 145/1-32, Riga, LV-1013, Latvio. 35-jara virino, profesia biologo, interesiĝas pri turismo, natura kuracado. Deziras informiĝi pri etnografio kaj kulturo en via lando, kaj pri naturo; interŝanĝi opiniojn pri komerca sendependa disvastigado de nutraĵproduktoj kaj kosmetiko.
- Una TIMERMANE, Kr. Valdemara 145/1-32, Riga, LV-1013, Latvio. 14-jara knabino, komencantino. Interesiĝas pri kosmetiko, moderna muziko, vojaĝoj.
- Aleksandro PESTI, Tó U. 20, H-6723 Szeged, Hungario. Volonte kontaktus Esperantistan skolt(in)on, interŝanĝi ĉefe skoltaĵojn (bildkartojn, poŝtmarkojn, memorstampitajn kartojn, leterojn, insignojn, glumarkojn, ktp.) □

DU KANTOJ EL KUBO

Ni ricevis la ĉisekvan leteron de Frank Swift:

“Antaŭ ĉirkaŭ du jaroj mi ricevis leteron de María de los Ángeles Caraballa Mauriz, kiu tiam, laŭ sia letero, estis dekkvinjara knabino loĝanta en Kubo. Ĉi volis ke mi, aŭ iu alia Nov-Zelandano, korespondu kun ŝi pri ĉiaj temoj kaj interŝanĝu poŝtmarkojn kun ŝi. Mi respondis ke mi estas multe tro maljuna por fariĝi ŝia plumamiko, kaj ke mi ne sukcesis trovi alian personon en mia urbo kiu volas korespondi kun ŝi, sed ke mi sendos ŝiajn nomon kaj adreson al la loka Esperanto-gazeto, esperante trovi taŭgan plumamikon por ŝi. Mi kunsendis aron da ĉ. 40 diversaj uzitaj poŝtmarkoj. María skribis al mi dufoje pli, ŝia fina letero alvenis antaŭ ĉ. ok monatoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis leteron de ŝia patrino. En sia letero la patrino de María informis min ke ŝia filino mortis pro kancero. Mi fotokopiigis la leteron. Vi vidos en la fotokopio ke ŝi petas ke mi transdonu la kantojn por publikigo. Mi ne estas muzikisto kaj ne scias ĉu la kantoj taŭgas por publikigo, sed ĉar la mortinta juna komponinto ŝajne estis fervora Esperantisto, eble vi volos eldoni almenaŭ unu el la kantoj en *Esperanto sub la Suda Kruco*...”

Jen la letero de la patrino de María, teskto ne redaktita nek korektita:

“Habana 30-11-1995

Pardonu mian leteron, mi konas tre malmulte Esperanton. Vi estis amiko tre bona de mia kara Filino, Maria de los Angeles Caraballo Mauriz. Ĉi estis malsana de kancero kaj nun estas en la ĉielo; mi estas tre malgaja. Ĉi estis tre bona, ni ŝin amis multe kaj preĝas al Dio por ŝi.

Mia kara filino estis tre bona studanto; ŝi ankaŭ faris kanzonojn de infano (teksto kaj muziko) pri temoj malsamaj, de amo, de Kristnasko, infanoj, sociaj kaj aliaj. Ĉi petis sendi la kanzonojn al siaj amikoj kaj ankaŭ al multaj personoj, kiel ŝian rememorigilon.

Nun mi sendas “La brila luno” (kanzono por infanoj); mi tre dankos se vi povos kopii ĝin kaj sendi al viaj amikoj en malsamaj urbetoj kaj ankaŭ vi povos doni por publikigo en “La Aŭstralia Esperantisto”; kaj la kanzonon de amo “Aŭtuno en la maro”. Mi petas vin korekti la erarojn en la tekstoj pro mia malbona Esperanto; mi tre dankas.

Mi povas sendi aliajn kanzonojn de mia kara filino, nur diru la temojn, se vi deziras.”

María C. Mauriz Bayolo
Carmelina 32. ŬŬ Jacinto Roig y
Albacete

V. Linda Arroyo Naranjo C.P.

11900

C. Habana
Kubo

.....

Sekvas fotokopioj de la originalaj kantoj hispanlingvaj, kun muziko—

Marto-Aprilo 1996

o LA BRILLANTE LUNA

AUTOR: MARIA DE LOS ANGELES CARABALLA
Cubana MAURIZ

The musical score is written on a grand staff with a treble clef and a 4/4 time signature. It consists of five systems of music. Each system includes a vocal line with lyrics in Spanish and Chontal, and a guitar accompaniment line with chord symbols. The lyrics are: 'En lo al-to de la co-li-na la lu-na o-cul-ta-és-ta tan bo ni-to y tan bri-llan-te tras la lo-ma se pier-de ya con su ca-ra de mar-til y su son-ri-sa in-fan-til que a to-dos ha-ce re-ir y can-ta a-sí lu-na bo-ni-to lu-na de pla-ta bri-llos pre-cio-sa-á! z-no-che lu-na bo-ni-to lu-na de pla-ta bri-llos pre-cio-sa-á! a ma-che-ces'.

La brillante luna

En lo alto de la colina
la luna oculta está,
tan bonita y tan brillante,
tras la loma
se pierde ya,
con su cara de martil

En la alto de la monteto
la luno kašita estas
tiel beleta kaj tiel brila
post la longmonteto
ĝi perdiĝas jam
kun sia vizaĝo de eburo

Esperanto sub la Suda Kruco

y su sonrisa infantil
 Que todos hace reir
 y cantar así:
 Luna bonita
 luna de plata
 brillas preciosa
 al anochecer.
 Luna bonita
 luna de plata
 brillas preciosa
 al anochecer.

kaj sia rideto de infano
 kiu ĉiujn instigas ridi
 kaj kanti tiel;
 Luno beleta
 luno de arĝento
 vi brilas bele
 je noktiĝo.
 Luno beleta
 luno de arĝento
 vi brilas bele
 je noktiĝo.

[Hispana kaj Esperanta teksto laŭ krajone skribitaj folioj de la aŭtoro.]

• OTOÑO EN EL MAR • autor: Mario de los Angeles Cavaballo Mau.

1- Can-tan-do siem-pre que coe-an-dar bus-car de nue-vo tuá mis-
 2- Yo se fue to-do ve-a pa-sar que con el tiem-po ha de cam-

Am Am7 D G
 tod que se be-ber de pue-des-tar tal vez no la pue-da ha-lar
 har mas yo no pue-do ol-vi-dar 2- quel o-to-ño jun-to al mar

G Am
 e-vo miá mi-gu mi-lu-sin el que se-ño lo que es 2- mor

D
 2 es-te po-ble co-re-ñón que i-ba bas-can-dos por-to de co-

G G

Marto-Aprilo 1996

Otoño en el mar

Cantando siempre

Quiero andar,
buscar de nuevo
tu amistad.

Quién sabe donde
puede estar;
tal vez no la puede hallar.

Yo se que todo
va a pasar,

que con el tiempo
ha de cambiar.

Mas yo no puedo olvidar
aquel otoño junto al mar.

Eres mi amigo, mi ilusión,
el que enseñó lo que es amor
a este pobre corazón

que iba buscando
un poco de calor.

[La tekstoj Hispana kaj Esperanta estas laŭ la manskribo de la aŭtoro. La Esperanta estas iomete korektita.]

Kantante ĉiam
mi deziras paŝadi
serĉi denove
vian amikecon.

Kiu scias kie
ĝi povas esti;
eble ĝi ne troveblas.

Mi scias ke ĉio
forpasos.

ke kun la tempo
ĝi devas ŝanĝiĝi.

Sed mi ne povas forgesi
tiun aŭtunon apud la maro.

Vi estas mia amiko, mia idealo,
tiu kiu instruis kio estas amo
al ĉi tiu povra koro

kiu serĉadis
iom da varmo.

KONKURSO

Ni petas interesatojn verki taŭgan Esperantolingvan tekston por la ĉisupraj kantoj. La teksto donita en la dekstra kolumno, supre, estas pli-malpli laŭvorta traduko. Bonvolu sendi viajn kantotradukojn ĝis la 20a de aprilo, 1996. La plej bona, publikigota, ricevos valoran libropremion. □



LA SKRIBA FORMO DE PROPRAJ NOMOJ

De David Rockell

En ĉi tiu artikolo mi deziras tuŝi nur unu flankon de tiu temo; plejparte, mi donas klarigon pri mia sinteno rilate personajn nomojn, kaj klarigon pri mia uzo de Esperantigita formo de mia nomo, Davido Rokel (sur mia naskiĝo-atestilo David Rockell).

Do mi nun diras kial mi kredas ke kiam eble oni Esperantigu la personan nomon (en mia kazo, ĉar mi tiom dediĉis mian vivon al la movado, kaj ĉar mia nomo estas facile Esperantigebla bonŝance, mi asimiligas kaj la personan kaj la familian nomojn.)

Unue, kiel ĉiu bona Esperantisto koncerne lingvajn aferojn, mi konsideras la intencojn de D-ro Zamenhof. Ĉajnas al mi ke li montris tion al ni trimaniere:

(1) Li donis sian nomon Lazaro Ludoviko Zamenhof (mi povas garantiĝi ke ĝi ne tiel aperis sur lia naskiĝo-atestilo).

(2) Li uzis Esperantigitajn formojn en siaj verkoj (ekz. la formo Paŭlo estas Fundamenta, la formo Roberto aperas aliloke en liaj verkoj—rigardu en *PIV*).

(3) Li vortigis tiun intencon en *Lingvaj Respondoj*:

“ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn”.

Due, mi konsideras la naturan tendencan de la homaro. Oni kutime uzas nomon en formo kongrua al la

lingvo parolata. Mi sugestas ke vi pripensu la alilingvanajn enmigrintojn kiujn vi konas. Mi donos al vi du ekzemplojn. Esplorante ĉi tiun temon mi demandis al du novaj Polineziaj amikoj. Unu donis al mi sian nomon “Peter”, sed kiam mi kontrolis mi trovis ke li literumas ĝin Sameo, “Pita”. La alia donis al mi sian nomon “Bill” (Vilĉjo), sed post kontrolo mi trovis ke efektive li havas tute alian nomon Tongan. Inverse, se oni alparolas min Maorie, oni nomas min “Rawiri”.

Trie, mi celas pli fluant Esperanton. Por montri la efikon de naciformaj nomoj, mi donas nun ekzemplon kiu troviĝas en *Plena Analiza Gramatiko*. “la antaŭa linio kunigis Villacoublay al Istanbul tra Brno kaj Rákosszentmihály”.

Eble vi diras ke ĉi tiu frazero estas malfacile prononcebla nur pro tio ke ni ne alkutimiĝis al la sonoj de tiuj lingvoj. Sed mi petas ke vi memoru ke la alilingvanoj ne nepre alkutimiĝis al la sonoj de nia nacia lingvo.

Krom la prononca malfacilo, ofte nur Esperantigita nomo permesas la montron de la akuzativo kiam necese. Eble tio ne multe gravas al ni, sed kelkaj homoj tra la mondo ja sentas la mankon de akuzativo en frazo.

Kaj mi devas fari finan averton. Persona nomo ja estas persona afero, kaj neniu rajtas trudi nedeziratan formon al iu alia. Mi mem preferas “Davido” en la Esperanta mondo, sed ĉiu ja devas individue decidi pri ĉi tio. Mi nur kuraĝigas vin konformigi la formon de via nomo. □

EL LA GRUPOJ ZAMENHOF-FESTOJ

Sidnejo: Je la 16a de decembro 1995, ĉ. 40 esperantistoj grupiĝis en la Sidneja klubo por festi la naskiĝtagon de Zamenhof. Ellen Meadem tre kompetente faris por ni la festo-paroladon. Poste Dennis Murphy distris kaj ridigis nin per sia ege lerta pupteatra prezentaĵo *Big*

Mama's Cabaret. Ni tre dankas al Eunice Graham pro ŝia preparlaboro.

Kep Enderby invitas nin ĉiujn je la 25a de februaro 1996 al barbekuo ĉe sia domo en Balmain. Espereble intervjuo por la televidprogramo *11am* okazos.—Raportis Terry Manley.

Melburno: *Zamenhof-Festo kun diferenco*. La 9an de decembro la Esperanto-Federacio de Victoria festis la 108-an datrevenon de la naskiĝo de la iniciatinto de Esperanto. Jam duan fojon ĝi festiĝis per diversaj programeroj kaj amuzaj kaj seriozaj.

Marcel Leereveld tre fervore kaj bonege paraoladis dum duona horo, avertante la ĉ. 30 ĉeestantojn pri la danĝero de la ekdukado de neologismoj en Esperanton. —Jennifer Bishop.

Du fotoj el la festo:



Vizaĝoj videblaj: Sook Wai (Malajzio), Svetislav Kanački (Radio 3ZZZ), Margaret Young (Oakleigh-grupo)



Vizaĝoj videblaj: Antaŭe—Bernie Heinze (informisto), Marcel Leereveld (instruisto), Kam Lee, Jack Fallu; malantaŭe—Peter Inglis, Lian Pitney, Suzanne Holton, Trevor Holton, Jack Young, Stanislav Kanaĉki, Harry Beechey (prezidanto).



Perto: Grupo de Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto kunvenis denove en la Universitata Domo de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio por festi la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Estis ĝojige renkonti malnovajn amikojn.

La prezidanto bonvenigis la gastojn, anoncis ke ekde nun Bill kaj Val Graham estas honoraj anoj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio pro siaj klopodoj dum multaj jaroj, kaj emfazis ke estas malfacile sekvi en la spuroj de la lasta prezidanto, Shirley Landquist kiu feliĉige estos kaj restos komitatano.

D-ro Donald Broadribb verve kaj trafe agis kiel Estro de la Festeno

kun sia speciala humuro.

D-ro Rosalie Schultz deklamis la Zamenhofparoladon. Ĉi retrorigardis la disvolviĝon de la ideoj de Zamenhof kiu, pro la mizera situacio dum sia juneco, ensorbis en la lingvon la Internan Ideon kiu diferencigas Esperanton de aliaj lingvoj, kaj tiu Interna Ideo povos finfine konduki nin al pli bona mondo.

La kutimaj loterio kaj divenkonkurso (venkis Bernice Thomas) plenigis la vesperon. La muzikon prizorgis Len Eddington.

Post la naŭa kaj duono ni havis horon por interbabilado. Ĉajnas al mi ke ĉiuj ĝuis la vesperon en bona etoso.—René Smeets □



La Mirinda Sorĉisto de Oz

de L. Frank Baum



tr. Donald Broadribb

185 grandformataj paĝoj. 124 ilustraĵoj. Grandaj literoj.

Prezo: bindita — \$35.00 inkl. poŝtsendon

broŝurita — \$30.00 inkl. poŝtsendon.

Ĉi tiu libro ne estas vendata de la Libroservo de AEA nek de UEA.

Mendu de: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304.

∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞

∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞ ∞

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA

ESPERANTO-ASOCIOJ

Kotizoj: Aŭstralia Esperanto-Asocio: Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: \$NZ \$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, Aŭ\$3.00 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30.00, mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1996 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita kaj enpaĝigita de Donald Broadribb per Macintosh LC III, la kompostoprogramo estis Claris Works Office. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt; kaj Orion Esperanto 16pkt (diponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Business Network, 5/25a Oxford Street, Bondi Junction NSW 2022.

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 21 [1996/3] — Majo-Junio 1996

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ✉ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono.)

e-poŝto: enkidu@perth.DIALix.oz.au

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Korespondaj kursoj: D. Lukes & H. Green, PO Box 1814, Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3.5-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield

Drive, Mt Waverley Vic 3149.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ✉ 09-270 3669.

Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ✉ kaj faksoj: 09-579 4767.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Pri abon- kaj membro-kotizoj, vidu paĝon 26-27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Memoroj pri Novzelando (Bishop).....	8
Skribas la legantoj	10
Deziras korespondi.....	11
Respondas Marcel Leereveld.....	12
Pseŭdonimoj (Ralph Harry).....	15
Odlo en Antarktiko!	16
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	17
Kiu estas kiu? 55 Donald Broadribb (Ralph Harry).....	20
Nia konkurso" La kantoj el Kubo.....	22
Lokaj informoj	24

Recenzoj:

<i>La Mirinda Sorĉisto de Oz</i>	3
<i>Survoje al Universala Civilizacio</i>	5

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la julia numero:
21 junio.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet. Adreso:
<http://www.emedia.com.au/users/perterb/esk/>

LA MIRINDA SORĈISTO DE OZ

Recenzas Vera Payne

La Mirinda Sorĉisto de Oz, de L. Frank Baum. Tradukis Donald Broadribb. Beverley, WA (Aŭstralio): Bookleaf Publishing, 1996. 185 grandformataj paĝoj. \$30 (Broŝ.), \$35 (Bind.), mendebla nur rekte de Donald Broadribb.

Ja plezure estas teni belaspektan, facile legeblan, enhavoriĉan libron. Jen universale ŝatebla klasikaĵo en formato plaĉega. Infanlibro— grandajn literojn akompanas la tutĉarmaj originalaj ilustraĵoj de W.W. Denslow. Kvankam mankas koloro, la nigraj nuancoj sur bonkvalita, brile blanka papero A4-granda, bele riĉigas la verkon de L. Frank Baum. Ili spegulas la helecon kaj ĝojon de la magia lando de la romaneto. Kiu ne tute malsimilas al *Alico en Mirlando*.

La originala versio kaptis la korojn de siaj legantoj pro la "Usoneco" kaj ordinareco kiu mankis en la ĝistiamaj, tamen amataj, Eŭropaj ferakontoj. La heroino, Doroteo, volas hejmeniri al sia onjo Em. Akompanas ŝin maizkampa birdotimigilo kaj du aliaj kunuloj. Konfesendas ke leonoj, kuraĝaj aŭ mal, ne oftas en Kansas, kvankam, ekzemple, uraganoj ja. Eta Toto la hundo de Doroteo, kondutas tre hundetece. Li svingas la voston por montri ke li komprenas; li ĝemetas kompatige se necesas; li bojas laŭte post kiam ia dianĝero jam iomete forvaporigis.

Mi trovis la rakonton neformetebla. Ĝojigas la koron eltrovi ke oni ankoraŭ kapablas eskapi al dimensio en kiu estaĵoj prizorgas unu la alian, en kiu



iliaj kapabloj estas komunigitaj por superi la vivajn sortoŝanĝojn kaj batojn, en kiuj la potenco de bono superas tiun de malbono. En ferakonto, ĉio eblas. La aŭtoro celis plezurigi sen timigi la infanojn de 1899. Nu, perdi siajn korpompartojn per ensorĉita hakilo laŭ mi sufiĉe koŝmarigas. Sed infanoj verŝajne kapablas apartigi la hororojn kaj magion en ferakontoj kaj mitoj disde la similaj hororoj en la reala vivo. S-ro Baum ankaŭ celis instrueti. Profunde en ni kuŝas niaj propraj plej dezirataj trajtoj. Malpeze, eĉ legere, la rakonto instruas pri virtoj kiaj malegoismo, kuraĝo, eĉ la bona kutimo sin lavi ĉiutage! Do, jen pajla birdotimigilo sencerba, kiu tamen pensas tre saĝe; jen malkuraĝa leono kiu tamen agas tiel ke liaj kunuloj estu en malplia

danĝero ol li mem; kaj jen koromanka stana lignohakisto kiu, kiel repago por bona ago, petas helpon savi sian amikon.

Laŭ mi la milde enkondukitaj filozofieroj taŭgas eble eĉ pli hodiaŭ, ĉe la fino de nia jarcento, kiam spirite kaj fizike la mondo malsanas, ol ĉe la komenco kiam la libro unue eldoniĝis. Lecionetoj por infanoj (ĉiuaĝaj) abundas. Jen unu: "La leono preferus liton el sekaj folioj en la arbaro, kaj al li ne plaĉis esti fermita en ĉambro; sed lia saĝeco ne permesis ke tio ĝenu lin." Jen alia:

"Mi estas Oz, la Potenco, la Terura ..."

"Mi estas Doroteo, la malgranda, kaj humila..."

Delicaj estas la lang'en-vang'ajoj. Ekzemple, "Oni diras ke ĉiuj damoj estas bonkoraj" kaj "Ĉiu amis ŝin sed ŝin plej malĝojigis ke ŝi ne povis trovi amaton ĉar la viroj estis ĉiuj tro stultaj kaj malbelaj kaj ne taŭgis por esti edzo de tiom bela kaj saĝa persono". Ĉu vi ne akordas kun "Kaj se ili ne eraris, ili pravis"?

Krom verkisto, S-ro Baum estis aktoro kaj ankaŭ veturanta vendisto. Ofte for, li skribis pri la amo al sia propra hejmo kaj lando, eĉ se tiuj malbelas kompare kun aliaj. Oni sopiras al sia forlasita naskiĝlando, negrave kiel malfacilis la vivo tie. Doroteo sopiris al Kansas, malgraŭ la nove

spertitaj mirindaĵoj kia la Smeralda Urbo.

La romaneto sukcesis tiom bone, ke preskaŭ 40 jarojn poste Hollywood, MGM kaj Judy Garland pli famigis la rakonton per muzika filmo.

Refoje gratulindas D-ro Donald Broadribb, ne nur pro la eldono de ĉi tiu gemo, sed pro la bele simpla kaj ege lerta traduko. Vidu kion Don faris kun la Munchkins, Quadlings kaj Winkies. La samaj zorgo kaj brileco kun kiu li tradukis *La Respubliko* montriĝas ankaŭ ĉe *Oz*.



Ĉu vi jam infanaĝe frandis *The Wizard of Oz*, aŭ eble ĝin legis al viaj propraj infanoj, aŭ ĉu mankis al vi tiu ĝojo, feliĉigu vin nun per *La Mirinda Sorĉisto de Oz*. Aĉetu por via onta/ anta/inta denaskulo, sed unue vi mem dancu laŭ la flavbrika vojo.

Kvar romanoj el la originala 14-voluma Oz-serio de L.Frank Baum nun haveblas en Esperanto, tradukitaj de Donald Broadribb: La Mirinda Sorĉisto de Oz, La Eksterordinara Lando Oz, Ozma de Oz, kaj Doroteo kaj la Sorĉisto en Oz. Ili estas haveblaj nur de Donald Broadribb, 59b Lukin St, Beverley WA 6304. Prezo de ĉiu: \$30 broŝurita, \$35 fortike bindita. La prezoj inkluzivas poŝtsendon. (Ekster Aŭstralazio: US\$30 kaj US\$35). Neniu rabato eblas. □

SURVOJE AL UNIVERSALA CIVILIZACIO

Recenzas Kep Enderby



Igorj Sitnikov

urvoje al Universala Civilizacio de Gjordano Moya Escayola. Eld Barcelona Esperanto-Centro, Hispanio, 1995. 200p., broŝ. Tiu ĉi libro gravas sed

bedaŭrinde ne ĉiam sukcese atingas sian celon plenumi la esperojn de tiuj kiuj, same kiel via recenzanto, longatempe interesiĝas pri temoj tiaj.

La temo gravas, speciale por Esperantistoj kiuj sopiras novan mondordon en kiu la homaro pace kunvivos helpate de la uzo de Esperanto.

Multaj aliuloj malsammaniere kaj malsamaspekte estas alogitaj al la temo, kaj oni tentas kompari ĝin kun klasikaj malnovaj Anglalingvaj verkoj, ekzemple *La Homo Faras Sin* kaj *Kio Okazis en la Historio* de Gordon Childe, kaj kelkaj lastatempaj provoj ekzemple—*Tutmonda Ŝanĝo* de Keith Suter, *Nia Tutmonda Najbarejo*, raporto de la Komisiono pri Tutmonda Registareco, *Morala Besto* de Robert Wright kaj kelkaj el la verkoj de Noam Chomsky.

La verko *La Nova Realismo* de Bruno Vogelmann ankaŭ simile traktas teme, kvankam alimaniere kaj oni pensas iom pri *La Avara Geno* de Richard Dawkins kaj eĉ *La Mistika Ĥoro* de nia propra Donald Broadribb.

La aŭtoro estas Hispano, kaj mem-identifiĝas ke li estas klerulo erudita pri ĉio pri kio li skribas. Domaĝe, tamen, ni ne estas informitaj pri kiu li estas kaj ni ne scias ĉu li estas

profesiulo aŭ nur bone informita amatoro. Mi suspektas ĉi lastan, ĉar la teksto indikas mankon de disciplino en la verkado. Ripetado ofte okazas kaj preseraroj preskaŭ ĉiupaŝe pestas. Severa redaktado multe helpus plibonigi ĝin.

Malgraŭ ĉio ĉi, tamen, la enhavo de la libro ege interesas, kaj se ni akceptas tiujn menciitajn ĝenaĵojn, la kvalito de la Esperanto estas bona, facile kaj alloge legebla.

Teme pri la enhavo: la legantoj gvidiĝas tra la tuta historio de la vivo sur nia planedo, ne nur tiu de la homaro sed ankaŭ de antaŭhomaj vivformoj ekde la komenco de vivo en bazaj karbonaj elementoj en ia prapropo, tra la etapo de fruaj mikrobaj formoj de vivo, ĝis la nuntempo, serĉante kio estas ene de ni kiuj produktas civilizon.

Ne ĉiuj konsentos pri la analizoj, konkludoj, kaj konstatoj de la aŭtoro. Ili ĝenerale estas prezentitaj por prepari nin akcepti ke, helpe de mutacioj, ni la homoj evoluis el unuĉeluloj; kun instinktoj sed sen iu ajn formo de konscio, ĝis la grupo de komplikaĵoj el kiu ni konsistas hodiaŭ. Ni estas unikaj inter la bestoj ĉar ni havas konscion kaj mem kapablas ŝanĝi nian kulturon kaj konsekvence nian sorton.

Kerne en tiu tezo estas la konstato ke la historio pravas ke la nuntempa homaro havas la kapablon, kiel kolektivo, konscie plani kaj konstrui ian estontecon, ĉiam ĉu por bono ĉu

por malbono, kaj grandparte superregias hereditajn biologiajn instinktojn.

La leganto estas regalita per mallongaj kaj ne ĉiam unuanime akceptataj analizoj pri multaj pasintaĵoj por ilustrati la disvolviĝon de tiu historio, kiu, laŭ la aŭtoro, kontribuis al nia aktuala stato de civilizacio. Estas klare ke la influoj de Charles Darvino ludas gravan rolon en lia pensado.

Por doni ideon pri la amplekso de la temo: traktataj estas abstraktaĵoj kiaj la civilizacio mem, la naturo de naturo, de vivo, de progreso, konscio, libera volo, determinismo, moralo, etiko, altruismo, anarkiismo, Marksismo, Humanismo, Raciismo, klerismo, la historia rolo de hazardaj eventoj, socia klaso, lojaleco, kapitalismo, socialismo, komunismo, faŝismo, scienco (eĉ $E=Mc^2$), rajtoj kaj devoj, la rolo de religio, Budhismo, Kristanismo, Konfuceanismo kaj multaj aliaj.

Kiel konkretaj ilustraĵoj de tiuj eroj, la rakonto veturigas nin tra la historio de antikva Ŝumero, Egiptio, Grekio kaj la Romia Imperio, la Araboj kaj Muĥamado, Feŭdismo, la Renesanco, la Reformacio, la vekigo de Eŭropo, la "kovado de la Franca Revolucio" kun siaj restantaj Jakobinaj influoj, la rolo de la Juda popolo, Mondmilito 1, la Rusa Revolucio, la Germanio de Hitlero, la Intercivitana Milito en Hispanio, Mondmilito 2, la Malvarma Milito, la Korea Milito, kastoj en Hindio, la luktoj en Irlando, Unuigintaj Nacioj, ekologiaj problemoj kaj la disfalo de Soveta Unio. Ĉu sufiĉas?

Inter la sociaj heroaj figuroj kaj ties ideoj pritraktitaj estas Erasmo, Kar-

tezio, Voltero, Rousseau, Locke, Neŭtono, Napoleono, Markso, Kropotkin, kaj "Ejnstejn" [Einstein]. (Estas interese rimarki ke ne ĉiuj propraj nomoj estas esperantigitaj.)

Se emfazo estas donita al iu aparta socia aspekto de historio, tio estas la ĝis nun daŭranta graveco de milito kiel atesto de la multifaceteco de la homa naturo. Tiu estas donita kiel ilustrato de la natura Darvina lukto aŭ dialektiko en la naturo.

Ĉerpinte el ĉiuj tiuj fontoj siajn konkludojn, S-ro Moya pledas por nova pensmaniero kiu helpos nin krei pli bonan tipon de civilizacio sojle de la dudekunua jarcento. Kontraŭe, tamen, estas rimarkinde ke antaŭe, parolante pri anarkiismo, li, iomete sarkasme, diris ke "Ankoraŭ ne ekzistas iu Internacio de la Bonuloj, kaj ĝia ekzisto ŝajnas malfacila."

Malgraŭ tio, laŭ li, ni bezonas krei novan socian etikon, kio memorigas min pri la instruadoj de Profesoro Peter Singer en Melburno.

Laŭ li, la ilo por tion fari estas edukado, ĉar necesas strebi plifortigi kaj plialtigi la socian konscion pri la malbonoj de milito kaj la graveco de paco, kune kun la klereco kompreni ke ĉiuj devas strebi plialtigi la ĝeneralan socian kulturon por atingi akceptadon de la dezirindeco de mondunuiĝo kaj homarunuiĝo. La konscio pri kiu li traktas devas esti formo de politika kaj kultura konscio, plivastasence.

Proksimiĝante la finon, malforteco aperas en la argumento. La libro tro facile kaj tro senprobleme transsaltas de siaj priskribo kaj analizo pri la

pasinteco, kaj ĝiaj signifoj kaj lecionoj, al la de la aŭtoro dezirata celata plibonigita mondosocio, negrave kiom laŭdinda tio ĉi estas. La facileco de la klare dezirata konkludo, la "konstatindaĵo", venas abrupte kaj logike ne estas decidiga.

Estas kvazaŭ la aŭtoro finis donante la bazajn premisojn de sia silogismo kaj tiam trovis ke lia dezirata konkludo ne necese sekvis tiujn ĉi, sed decidis doni ĝin malgraŭe.

La saltanta konkludo eliĝas pravigite de malmulte pli ol la fakto ke ĝi estas la dezirindaĵo kiun ni ĉiuj volas havi. Efektive, la konkludo estas pledo.

Oni ne bezonas esti pesimisto por rekoni la fortecon de la influoj en la reala mondo, kiuj kontraŭas la esperojn kaj revojn de la aŭtoro. Krom ordinara homa inerto, ekzistas la malhelpaj, politikaj instancoj en la mondokolekto de ĉirkaŭ 183 naciaj ŝtatemembroj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj burokrataroj. Ŝtatsuvereneco mondscale ne estos tiel facile superregata aŭ forlasata.

Multaj konsentus ke tiu ĉi celo tiel laŭde serĉata nepre estos atingita, eĉ se nur post longa tempo kaj longa luktado. Tamen estas utopie aserti ke la homa edukado en si mem havas tian kabablon sole pere de plialtigo de la homa konscio kaj kulturo; ke ĝi povos memvole antaŭenmovi la homaron al nova pli alta nivelo de kulturo kaj konscio, tiel ke unuhomariĝo estos enkondukita sen helpo de aliaj kontribuantaj intervenantaj helprimedoj.

Tiurigarde, iuj ekonomiaj politikaj kaj sociaj realaĵoj estas ignorataj. La

aŭtoro, ekzemple (p.199), citas problemon aŭ barilon al sia konkludo, dirante ke ĉiuj socioj dividiĝas laŭ klasbatalaj linioj "kiuj interne rongoas [?] la socion." Tiu estas ekonomia kaj socia afero, sed estas naive menciigi ĝin kaj post tio simple antaŭeniri al onia preferata konkludo, kaj proponi nenian klarigon kiamaniere bonvolo, aŭ plialta konscia aŭ kultura nivelo, povas tion solvi aŭ superregi.

Je la fino estas pledo por reformita UN, kiu poste gvidos al formo de mon dofederalismo, kaj ni legas ke:

"...malgraŭ la ekzisto de sferoj de agado lokaj, regionaj kaj tutmondaj, oni devas rigardi la homojn kiel civitanojn de la diversaj teritorioj sen etikedoj rasaj, gentaj aŭ etnaj. Necesas mondo sen ŝtatlimoj...En unuigita homaro, la socio devas esti plureca, kaj ĉiuj devas esti samrajtaj civitanoj de la propra lando kaj moncivitanoj."

Multaj konsentus; sed kiel? La respondo, laŭ S-ro Moja estas "...ŝanĝi la pasintajn konceptojn pri civilizacio, kulturo kaj pensado...ŝanĝi la bazajn valorojn pri la homaro, ĉar ĝis nun oni trovis sin ligita al nacieco kaj eĉ al senŝtata etno, sed ne al la homaro."

Estas tiam, antaŭlasta paĝo, unuafoje enkondukita la lingva problemo. S-ro Moja diras ke kultura movado tia jam ekzistas kaj ke tiu estas "esperantismo kun sia supernacia lingvo kaj ties ideologio la homaranismo." Tion ni aplaŭdu!

Entute, malgraŭ difektoj, valora kaj interesa libro, meritanta reviziitan duan eldonon. □

MEMOROJ PRI NOVZELANDO

De Alan kaj Jenny Bishop

Konatigi kun la lando kaj la tuta regiono estis unu el niaj revoj de kiam ni migris en Aŭstralion. Alia deziro estis partopreni Esperanto-kuniĝojn por konatigi ankaŭ kun Esperantistoj de la regiono. Oportuna koincido de kombinita NZEA / AEA Esperanto-Kongreso en Aŭklando kaj studfor-esta periodo por Alan devigis nin viziti Nov-Zelandon, laŭraporte ekzotika, indiĝenkultura sed samtempe tre Brit-spekta lando.

Je kristnasko mem ni bonŝance flugis rekten el Melburno, ĝuante survoje luksan festomanĝon. La lastajn gutojn de portvino ni gustumis, rigardante dum alteriĝo la frapantajn blankajn strandojn kaj la helverdajn herbejojn. Niaj unuaj impresoj de sukoplana, mistera lando dum la venontaj du semajnoj tute realiĝis. Ni rakontas unuope:

Alan:

Ĉiam mi memoros du apartajn eventojn de nia vizito al Nov-Zelando. Ambaŭ concernis Maoriojn kaj matematikon.

La unua okazis en Waitomo, konata pro la vidindaj kalkoŝtonaj kavernoj kun enloĝantaj lampiroj. Ni vizitis Ohaki-n, Maorian kulturcentron, kie ni renkontis Diggeress Te Kanawa, mond fama teksistino kies nevino Kiri Te Kanawa estas eble eĉ pli fama. Diggeress montris al ni mirindan por unu el ŝiaj dekdu infanoj teksitan mantelon. Ankaŭ la filino montris siajn modernajn artaĵojn. Ambaŭ interesiĝis pri mia okulvitrujo, farita en

Mozambiko el akvoherbo per la samaj teknikoj kiel la Maoriaj teksaĵoj. Kun ĝojo mi klarigis la matematikajn principojn de la desegnaĵoj!

La dua okazis dum la Kongreso. Mia kolego Bill Barton de Universitato de Aŭklando veturigis min al stranga tamen ĉarma kunveno. En Tolega Bay, apud Gisborne (9 horojn for de Aŭklando) kuniĝis preskaŭ dudek famaj matematikistoj. La plej fama estis la organizanto, Vaughan Jones, maljuna profesoro, naskita en Nov-Zelando, daŭre surfamanto, kiu en 1994 gajnis la Medalon Fields. Tiu ĉi medalo por matematikistoj havas la gravon de Premio Nobel. Alia membro de la grupo estis Profesoro Ruth Lawrence de Anglio, kiu eniris Universitaton de Oxford kiam ŝi estis nur dekdu-jaraĝa.

Dum la semajnfino ni kuniĝis kun lokaj Maorioj ĉe ilia Marae, kunvenejo uzata por diskuti diversajn gravaĵojn. Antaŭ ol eniri la Maraeon, vizitantoj devas partopreni apartan ceremonion. Tio estas formala bonvenigo sed ankaŭ defio por kontroli ĉu la fremduloj estas amikoj aŭ malamikoj. Ni devis elekti reprezentantojn de nia grupo kiuj devos fari prezentparoladojn. Post ĉiu parolo okazis kanto! Finfine kiam la Maorioj estis kontentaj ke ni estas amikaj, ĉiu fremdulo salutis ĉiun Maorion per naz'-al-naztuŝo (tuŝo, ne froto!). Tiam ili permesis nin eniri ilian grandan lignodomon, multornamitan per desegnaĵoj kaj skulptaĵoj. Post la ceremonio, Maoria pentristo kaj skulptisto klarigis la diversajn desegnaĵojn kaj invitis la matematikistojn prov-

desegni kaj analizi aliajn formojn. Imagu maljunan Maorian virinon kaj Fields la medalgajninton, kiuj diskutis la matematikan signifon de la malnovaj desegnaĵoj!

Estis mirinda travivaĵo vidi grupon de Maorioj, posteuloj de ege malnova kulturo, partopreni kun grupo de modernecaj kaj antaŭenpensantaj matematikistoj.

Jenny:

Malfrue decidinte vojaĝi al Nov-Zelando por partopreni la NZEA/AEA-kongreson, mi ricevis de mia patrino adreson de antaŭa Esperanto-korespondantino ŝia. Mi ankoraŭ gardas tre bonajn memorojn pri miaj unuaj paŝoj en Esperantion, kaj efektive memoris F-inon Olive Breeze, pri kiu mi ofte aŭdis de mia patrino dum miaj tre impresfaraj junulaj jaroj. Ŝi eĉ vizitis nian hejmon en Twickenham, apud Londono, antaŭ proksimume 40 jaroj, kiam ŝi estis vojaĝema junulino dudekjara. La franca korespondanto de Olive tiutempe estis S-ro Jean Asqueri de la Esperanto-klubo La Bona Stelo en Romans sur Isère, malgranda urbo en Suda Francio, korespondanto ankaŭ de mia patro. Estis tuj post la dua mondmilito, vintre 1947, kiam miaj gepatroj gastigis kaj Jean kaj lian amikinin, Marcelle; mi ankoraŭ memoras la ĝuigan neĝon de tiu vintro!

Baldaŭ estis vico de mi kaj miaj gepatroj viziti Francion, kaj raviĝi pro la sindonema, grandanima gastamikeco de la familio Asqueri ĉe ilia vinberejo apud la belega montaro Vercors. Ĝis tiam mi estis protektata kontraŭ la teruraĵoj de militado, mi estis infano, mi konis nur feliĉon, amikecon

kaj grandanimecon de kaj Italaj mal-liberaj soldatoj kaj kelkaj Usonaj flugsoldatoj. Sed en Francio mi sciigis pri la malamikeco kaj interhomaj abomenaĵoj. Mi ĉiam dankegas pro mia bonŝanca infanaĝo sur insulo kaj gardas tre vivajn memorojn.

Nun mi tre ĝojas pro mia nova renkontiĝo kun Olive Looman, kies Esperanto-vojaĝon al Ĉinio, rakontitan per letero al mia patrino, mi ofte citas por propagandi Esperanton. Strange estas ke dum multaj jaroj Olive ne korespondis kun La Bona Stelo (bedaŭrinde Jean Asqueri mortis intertempe), sed dum la lasta jaro ŝi ricevis de tie poŝtaĵojn. Mia telefonvoko estis la tria okazaĵo, al kiu ŝi telefone ekrespondis, "Mi preskaŭ mortas!" Ĉe la kongreso ni sendis poŝtkarton al La Bona Stelo, Romans-sur Isère, kaj al mia patrino, feliĉe memorante miajn bonajn kunligantajn travivaĵojn.

Kompreneble Olive kaj mi daŭrigis nian rekonatiĝon kaj ĉe ŝia bela hejmo kaj en la kongreso en Aŭklando.

Ni nun serĉas bonan pretekston por viziti la spektaklan sudan insulon de bela, amika Nov-Zelando. □



Forigu la malnovajn Esperanto-librojn sur viaj bretoj, tiujn librojn kiujn vi ne emas relegi, kaj anstataŭigu ilin per kelkaj el la tre belaj kaj bonaj kiuj lastatempe eldoniĝis. *La Mirinda Sorĉisto de Oz* nepre estu unu.

Vera Payne



Skribas la Legantoj



Gonçalo Neves:

Kara kolego,

En via artikolo en *Esperanto sub la Suda Kruco* (nov.-dec., p. 25-28), vi demandas sur p. 28, pri la vorto "gvidoro": Nu, en sia esearo *La Interna Vivo de Esperanto*, aperinta ĉe Ilitis en 1995, Karolo Piĉ enkondukas kaj uzetas la sufikson -or, kun jena signifo (p.317): "Sufikso signifanta: (1) meĥanikan ilon, maŝinon, aparaton. (2) homan aganton, iston. Transformoro, nubskraporo, asfaltero, imperoro, imperadoro." La novan sufikson (kiun cetere mi opinias necesa) Piĉ uzas en jenaj okazoj:

1. Kiel ekvivalenton de -ul, kiam temas pri senvivuloj, pri objektoj: "nubskraporo". Tiucele tamen li pli ofte uzas la sufikson -ul.

2. Alternative al -il aŭ -maŝino: "asfaltero", "transformoro".


3. Alternative al -ist, -ant, -int aŭ -ont, kiam neniu el ili taŭgas, aŭ kiam li volas kunigi ĉiujn iliajn sencojn, aŭ prezenti neŭtralan formon, kiu ne nepre estu -ist, -ant, -int aŭ -ont, sed kiu ajnmomente povu esti aŭ -ist, aŭ -ant, aŭ -int aŭ -ont: "imperoro" (el la verbo "imperi", ankaŭ kreita de li). Tiucele tamen li pli ofte uzas la sufikson -ent.


"Gvidoro" do signifus ulo kiu gvidas, ne nepre iste, ne nepre ante, ne nepre inte kaj ne nepre onte. Precioza vorto, laŭ mi. En la kunteksto sufiĉus diri "gvidanto". Tamen mi miras ke la vorto "gvidoro" uziĝis antaŭ ol aperis *La Interna Vivo de Esperanto*. Tio signifas ke oni uzis ĝin kaprice, aŭ sub influo

de nacia lingvo, aŭ ke iu alia antaŭ Piĉ ie enkondukis tiun sufikson.

Kore salutas,

Gonçalo

[*"Ist" jam de la komenco havas ĝeneralan sencon de persono (ulo, metafore aĵo) kiu sin okupas per, sin dediĉas al. En la Universala Vortaro de la Fundamento troviĝas ĉe la difino de "ist" la Anglalingva kaj Germana klarigoj "person occupied with" kaj "sich mit etwas beschäftigend", apud la Franclingva klarigo "marque la profession"; la Angla kaj Germana klarigoj indikas ke celata estas sencopli larĝa ol simpla sencopli de "profesiulo" (mi ne konas la Polan kaj Rusan lingvojn). Do ŝajnas ke Piĉ volas reinventi jam ekzistantan esprimilon.* —]



Katalin Smideliusz:

Karaj,

Post aventurplena semajno kun Max kaj post ŝajne multe pli longa flugado hejmen mi bonorde alvenis al Hungario. Matene je la 4.30 la temperaturo en Vieno estis ĉ. 12 gradoj sub nulo. Bonŝance la varma akceptado de miaj familianoj degeligis la froston.

Daŭre neĝas kaj en la eta ĝardeno de nia domo du metrojn alta neĝpingveno salutis min. Unue la gefiloj deziris fari kanguruon, sed poste pro manko de bonaj imagoj pri ĝi la tuto fariĝis pingveno.

Hodiaŭ mi jam laboras, ekde morgaŭ mi laboregos.

Mi denove deziras danki al vi la gastigadon kaj la neforgeseblajn tagojn ĉe vi.

Elkore salutas vin

Katalin.

Nova hejma adreso:

H-9700 Szombathely

Kós Károly u. 29.

Hungario

Tel.: +36-94-320-313



DEZIRAS KORESPONDI

Josef Poružnik, Beručov 632, 386 01 Strakonice, Ĉeĥa Respubliko. 42-jara, laboras en teksa fabriko. Edzino, ankaŭ Esperantisto, interesiĝas pri natura manĝaĵo, saniga vivo. Edzo interesiĝas pri ŝaŭmvino, gitarludo, moderna muziko, turismo.

Fasio Brandt de Souza, Rua João Leicio Maxques 90, BR-91755110 Hipica Porto Alegre/RS, Brazilo. 26-jara farmaciisto, interesiĝas pri muziko, Esperanto, aliaj popoloj, kostumoj, amikeco. Urbo en suda Brazilo.

Luciana Martins Pomponet, Rua Albavaldez, Campo Grande Rio de Janeiro RJ, Brazilo 23075-130. 26-jara. Ŝatas legi, muzikon, ludi ŝakon.



Igorj Sitnikov

RESPONDAS MARCEL LEEREVELD AL LA ARTIKOLOJ DE RON GATES KAJ DONALD BROADRIBB EN LA JANUAR-FEBRUARA NUMERO

Pri tre multaj aspektoj de la lingvismaj rezonoj de Ronald Gates kaj de Donald Broadribb mi nature samopinias. En pluraj niaj reciprokaj kontraŭoj estas nur diferencoj pro emfazo. En tiaj intaj kaj ontaj diskutoj ni, bonŝance kaj pro ne fanatikeco, aŭ komprenas unu la alian aŭ eĉ komplete interakordas. Kaj kie ni diferencas, ni ĝenerale argumentas pli forte ol ni sentas, por pliklarigi ideon aŭ por akiri pli bonan sintezon.

Tamen mi trovas necese klarigi, por la legantaro de *ESK*, du facetojn kiujn, mi opinie, Ronald kaj Donald nebone, eĉ neĝuste, interpretis en la artikolo "Pri la mortigo de Esperanto" (*ESK* jan. 1996).

Unue temas pri la aserto de Ronald ke la funkciaj celoj de Esperanto estas egalaj al tiuj de naturaj lingvoj, ke Esperanto devas "kreski" en la sama maniero kiel naturaj lingvoj, kaj ke ankaŭ Esperanto bezonas provizon da sinonimoj. Li plie kredas ke beletro estas funkcio de Esperanto same grava kiel la neartisma uzo de lingvo, kaj ke tiu ĝenerala uzo ne estas, nek bezonas esti, same preciza kiel la beletra kaj la scienca. En ĉiuj tiuj vidpunktoj estas Ron la verkisto kiu parolas, ne Ron la Esperantisto. Mi malakordas pri tio, verŝajne ĉar mi havas malsimilan vidpunkton pri la esenco kaj funkcio de arto.

Mi opinias ke arto estas aliformigo de la ĉirkaŭanta naturo. Artisto (inkl. de verkisto), por pli emfazi, kaj ankaŭ

por indiki nekutimajn valorojn, klopodas ŝanĝi la ordinarajn bildojn kiujn ni konceptas.

Arto uzas peraĵon por montri al ni la mondon el angulo nekutima al ni, kaj en la procedo plialtigas ĝis artoformo tiun peraĵon kaj la ideojn kaj sentojn de la artisto. Sed sen bazaj bildoj "normalaj" arto ne povas ekzisti, ĉar estas ĝuste la ŝanĝo ante (= "de") tiujn bildojn normalajn, kiu kreas la arton.

Ankaŭ beletra verkado estas arto, sed nur ĉar unue ekzistis normala lingvo. Tiu normala lingvo jam en si mem devas povi esprimi ĉiujn niajn sentojn. La beletro ne aldonas sentojn, sed pliklarigas kaj reliefigas sentojn per certa manipulado de la jam ekzistanta lingvo, per ne aldonado sed ŝanĝo de lingvouzo. Pentristo uzas la samajn kolorojn kaj la samajn liniojn kiel ordinara (= nearta) fotografanto: li ne aldonas, nur ŝanĝas la kolorojn kaj la liniojn, kaj aliordigas ilin.

Diri ke unu el la originaj celoj de lingvo estas beletro, laŭ mi do estas malĝuste: ĝi unue estas interkomunikilo, kaj nur poste povas esti peraĵo por artesprimo kiel beletro. La ordinara lingvo, jam tiom ege komplika ĉe t.n. primitivaj popoloj, estas por beletro nur la materialo. La fizika peraĵo "lingvo" estas simile limiga por la verkisto kiel la ŝtono por la skulptisto: estas nur diferenco de grado. Ke poste la beletro influas la ĉiutagan lingvouzon, estas nur flankajo.

Lingvo unue estas "farita" por interkomunikado ordinara, kaj la artisto devas akcepti ĝin tia kia ĝi estas, kaj provi fari artaĵon el ĝi. Li en tio estas limigita, sed konsideru kiom multe pli limiga estas la peraĵo de skulptisto, la ŝtono. La peraĵo "Esperanto" estas eĉ iom pli limiga ol etnaj lingvoj, pro la malmulteco de la vorto-kvanto kaj pro la samsoneco de multaj vortoj (ekz. "mal-"). Tio simple estas malbonŝanco por la beletristoj: ili devas esti eĉ pli grandaj artistoj ol tiuj uzantaj etnaj lingvojn. La verkistoj ne rajtas diktatoroj la lingvon kaj ŝanĝi ĝin en alian lingvon: ili rajtas nur uzi tion kio estas havebla. Kaj krome Esperanto havas por la verkisto ankaŭ avantaĝajn ecojn super la etnaj. Kelkiuj diras ke Esperanto devas kapabli traduki etnan beletron en beletran Esperanton: tio ne veras. Oni ne povas "traduki" ian ajn artaĵon, nur komenti pri ĝi. Pentraĵo ate de¹ Picasso ne povas tradukati al muzikaĵo de Picasso, aŭ al pentraĵo de Rembrandt. Sed artisto kia Zamenhof kapablas rekrei artaĵon; ĝi tiukaze estas artaĵo ate de Zamenhof pri temo de Goethe.

Resume: Unu kuiristo estas ordinara kuiristo, la alia kuiras artiste; ambaŭ uzas la samajn ingrediencojn, la saman peraĵon, la saman "lingvon".

La afero estas pli grava pro tio ke la funkcio de Esperanto devas ne esti sama al tiu de etnaj lingvoj: etna lingvo estas, krom interkomunikilo, subjektiva parto de la homa psiko; Esperanto precipe estas objektiva ilo de la homa inteligento. Se Esperanto simple "kre-

skus" kaj "disvolviĝus" laŭ niaj subjektivaj sentoj ĝi fariĝus same senutila por fidebla interkomunikado kiel la etnaj. Esperanto devas, por esti utila (escepte kiel flanka ŝatokupo), kreski kaj disvolviĝi inteligente, ne laŭ la maksimumo "ĉiukaze 'fare de' kaj 'far' estas firme asimilitaj" (p. 10, 11; cetero: ĉu vere?). Krome unu el la celoj de Esperanto estas esti facile lernebla kaj pleje fidebla; tial en Esperanto ne estas loko por sinonimoj, nur por vortoj kun nuancaj diferencoj de signifo, krebblaj per la baza oficiala radikaro. Ronald estas en speciala situacio: lia infanaĝa lingvo estas la Angla, kiu havas, ĉar ĝi estas miksaĵo de pluraj lingvoj, nekutime grandan kvanton da sinonimoj, kvankam en la ĉiutaga uzo ĉiu el tiuj sinonimoj uziĝas kune kun specialaj vortoj ĉirkaŭantaj. La Francoj ekzemple povas bonege beletrumi kun malpli multa stoko da sinonimoj. Ĉiu artisto adaptas sian arton al la peraĵo, kaj verkisto ĝenerale kapablas uzi aliajn bilderojn, ekz. anstataŭ "Mi kompatas la kompatindajn ("*povrajn") malsanulojn en tiu malsanulejo ('hospitalo')": "Mi kompatas la malfeliĉajn nesanulojn en tiu kuracejo". Cetero ankaŭ la ripeto de vortoj aŭ sonoj uziĝas kiel beletra funkciaĵo.

Due mi konsideras kelkajn asertojn de Donald neĝustaj kaj verŝajne ne-intencitaj. Temas pri la vorto "logika". Lingvistoj uzas tiun vorton ne en ĝia filozofia koncepto, sed nur en la signifo "laŭ konsekvencaj reguloj celantaj reciprokan komprenon". Ree montriĝas la Anglodeveneco, ĉikaze de Donald: la gramatiko de la Angla lingvo inter la multaj Eŭropaj aspektas (sed ne estas) kaj sentiĝas kiel multe pli

¹ Ate de = farita de—■

“anarhia” ol la aliaj. Do li pledas aŭ por forgeso pri lingvisma logikeco aŭ por arbitra esceptigo de kelkaj uzoj. Nu, lia kialo estas, ke se “far” ne estas miskomprenata (miskomprenas ĝin i.a. mi), ni uzu ĝin se utila. Sed la celo de la logiko en Esperanto ja estas ke ne okazu miskomprenoj. Estas facile diri, ke “far” ne estas miskomprenata, ĉar engorĝigita en la kredulajn samideanojn, sed ĉu ni ne konsideru, ke la forlaso mem de la gramatikaj reguloj kaŭzas aŭ kaŭzos miskomprenojn? Ĉu en la estonteco oni simple kaj safe akceptos tiun escepton al la reguloj, aŭ ĉu oni plenrajte donos al ĝi la veran signifon, kontraŭan al la intencita? Kaj krome se oni allasas unu escepton, kial ne permesi aliajn, kiel ekz. “la luno suras homojn” anstataŭ la ĝusta “la homoj suras la lunon”? Se oni estus en la komenco tuj malkreinta la eraran vorton “peri” (por “agenti”), eble neniu estus kreinta “far”. Kaj eraroj facile disvastiĝas en lingvo, ekz. nun en la Angla pliiĝas la uzo de la pasivsenco “ebl” kun netransitivaj verboj aktive; ĉu tiu (speciale danĝera por Esperanto) kutimo ne povos penetri en Esperanton, pro la nuna moda Angligo de nia lingvo? Mi opinias ke estas nia devo zorgi ke Esperanto restu senescepta kaj do logika. Cetere, tra legante *Lingvaj Respondoj* mi konstatis ke Zamenhof uzis la vorton kaj ideon “logika” 14 fojojn en tiu libro, el kiuj en du kazoj (pri “sidiĝi” kaj “eksidi”, kaj pri la nomo “Esperanto”) li kontraŭas logikecon, dum en la ceteraj 12 kazoj li defendas logikecon. Jen ekzemplo: “En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn

aliaj personoj jam uzis antaŭ vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon” (pri pasivebleco de verboj).

Mi samopinias kun ĉiuj aliaj en la artikolo esprimitaj ideoj de Ronald kaj mi tre akordas kun ĉio kion Donald diras sur paĝo 11 (sed ne sur paĝo 12). □

////////////////////

Donald Rogers:

Alan Towsey (*ESK* 20 “Lingva Angulo”) demandas ĉu iu povas proponi pli precizan tradukon de “air terminal”.

Mi preferas “flugstacio” por “air terminal”, kaj “flugstacidomo” por “airport terminal building”. Ili estas analogaj al “stacio” kaj “stacidomo”. Notu in *PIV* ke “stacio” estas (1) “loko kie haltas la publikaj veturiloj, vagonoj, ŝipoj, por preni aŭ lasi pasaĝerojn kaj varojn”. Ĝi ne temas nur pri trajnoj.

Butler ankaŭ priskribis “stacidomo” kiel “train, bus, etc station”.

////////////////////

ANTAŬ CENT JAROJ

Antaŭ precize cent jaroj, la dato estis Majo 1886. (Informofonto: *Encyclopaedia Britannica*.)

////////////////////

WHERE PROBLEMS LIE

By Donald Broadribb

The following is a query that was on the Internet recently. What we are interested in, in the present article, is not what is being said but how it is being said. The text is suggesting that the word processing program NISUS be combined with the SYMANTEC company's program MORE. The text is reprinted exactly as it appeared:

April 11, 1996, from the Internet:

For me, mac since 1985, in FRANCE, the two best programm in text are NISUS and, second, MORE. SYMANTEC stop developpement of MORE (3.1.2 Dec 91), and want to sell licence to any developper (see message from COMPUSERVE) (Ex PARAGON) Is NISUS SOFTWARE have see the offer of SYMANTEC ? (selling licence) Is NISUS SOFTWARE have consider,for enjoyment of users, to make a gentleman or commercial agreement to make a child of the weddings of NISUS and MORE. NISUS lacks of outlining tool so easy as MORE or ACTA. It is a fact, -ONE- a good outlining is essential for long writing documents, and -TWO- NISUS is not the best outliner at this moments (4.1.5) This is to make a survival of my two best text programm. Perhaps SYMANTEC ask a few for that : they ask to sell licence since 1991..and in 1996 have no candidate. Is NISUS SOFTWARE have consider that ?

In normal English, this reads:

For me, a MAC(INTOSH) user since 1985, in France, the two best text programs are NISUS and MORE. SYMANTEC stopped development of MORE in Dec. 91 and want to sell the licence to any developer (see message from PARAGON on COMPUSERVE). Has NISUS SOFTWARE considered, for the benefit of users, through a gentlemen's agreement, or a commercial agreement, combining NISUS and MORE? NISUS lacks an outlining tool as easy as MORE or ACTA. The facts are: (1) good outlining is essential for long written documents, and (2) NISUS is not the best outliner at this moment. This would preserve my two best text programs. Perhaps SYMANTEC would not ask much money for it: they have been trying to sell their licence since 1991, and still in 1996 have had no offers. Has NISUS SOFTWARE considered that?

The text as it was published on the Internet is a good example of the well

known fact that although English is the most widely used language in the world, it does not always remain English. In fact the text only becomes clear when it is translated back into French, the language in which the writer apparently was thinking. A perusal of the text brings out some of the major problems English presents to a non-native speaker, and which a world language needs to address.

The biggest problem presented is the verb system, and the methods used in English to express time. The construction of verb forms in itself is not the difficulty. It has often been said that English has the simplest verb system among European languages, as far as forming the verbs goes. It is the use of the verbs that presents the greatest difficulty. By and large the writer simply translated quite normal French literally into English:

Is NISUS SOFTWARE have see the offer?

In the writer's mind, which worked in French. the phrase presumably was *Est-ce que NISUS SOFTWARE a vue...* and he has translated the French words literally into English. *Est-ce que* is a common French phrase, equivalent to the Esperanto *ĉu*, which is placed before a simple statement to make it into a question. Literally it means "is it that", which in fact can be used in a similar fashion in English. But it has lost all feel of being a mini-sentence, in French, and the writer translated it as a sort of pseudo-verb. In English, of course, "is" may not precede "have" in this way.

a vue literally means "has seen", though in French it is usually used as a simple past tense meaning "saw". Esperanto would use a simple *vidis* (saw) here.

Is NISUS SOFTWARE have consider,

Much the same is to be said of this bit. But another interesting problem enters in. In French speech, *considérer* (to consider, Esperanto *konsideri*) is pronounced identically with *considéré* (considered, Esperanto *konsideris*) and the writer has confused the two. (Grammatical ignorance among the educated is not confined to Australians!)

NISUS lacks of outlining tool...

Somehow the verb "lack" presents a problem in many languages, I am not quite sure why. In English it is an ordinary transitive verb "Nisus lacks an outlining tool". In French it is an intransitive verb and requires a preposition "lacks of" (similar to such a phrase as "speaks of"). In

Esperanto a most peculiar form is required *al NISUS mankas...* "to NISUS lacks".

(An "outlining tool", by the way, is a provision for the computer program to make an outline of a text automatically, in the same fashion as it can make an index or a table of contents automatically.)

SYMANTEC stop developpement and want to sell licence to any developper

Apart from spelling problems, a confusion caused by different ways of spelling the same word in French, British and American English (*developpement*, also *licence*) French and English have different ways of using what at first glance appear to be the same verb forms. Our usual way of thought runs: "past is past and present is present. SYMANTEC is no longer developing the program, therefore it is past and we must therefore say 'stopped' or, preferably, 'have stopped'. French sees it rather differently. (In this particular instance Esperanto sides with English: "SYMANTEC ĉesigis prilaboradon...")

they ask to sell licence since 1991

Here the problem is that the action is both past and present. ("In 1991 SYMANTEC wanted to sell their licence, and in 1996 they still want to do so.") English usage sees the need to emphasize that the desire began years ago, and uses a past tense "asked; tried; wanted"); French sees the emphasis to be on the continuation of the desire now ("ask"). On this, Esperanto sides with French: "ĉi petas vendi...".

It is also worth noting a few other problems, e.g.:

two best programm

Spoken French has largely lost any distinction between singular and plural nouns. In most instances, words which are written as singular or as plurals sound identical. It is consequently a serious temptation to make a slip, in writing in English, and forget the plural ending: "two best programm".

This same phrase also presents a very intriguing confusion of British and American English language spelling. Thus we have the hybrid form *programm* which is a sort of compromise between *programme* and *program*.

Everyday colloquial expressions have been translated literally into English,

resulting in confusion because English has its own set of everyday colloquial expressions. For example,

Perhaps SYMANTEC ask a few for that

The French presumably said *un peu* which the writer has translated “a few”. Colloquial English says “a bit”—“Perhaps SYMANTEC is asking a bit for that”. In both languages the intended meaning is “a lot of money”, the exact opposite of what the words literally mean.

“*Few, some, little*” present many problems for language students, again not merely in English and French!

to make a child of the weddings of NISUS and MORE.

Here a descriptive metaphor has failed to transfer into English. The basic meaning is “to wed NISUS and MORE to produce a new offspring”, i.e. produce a new product by combining the two computer programs. Whatever may be said of the phrases from a poetic point of view, the over-literal wording has produced an almost unintelligible phrase.

Peculiar wording often sounds peculiar simply because it happens not to be traditional, even though “logically” it is difficult to explain why. Thus:

outlining tool so easy as MORE or ACTA.

Normally English would say *as easy as* rather than *so easy as* in this phrase. There is no good reason for this, but the difference makes the writer’s text hard to understand.

Other difficulties in understanding the original texts are obvious. This is the sort of translation provided by translating machines such as are provided in shops now in hand held forms, and as computer programs for installation on home computers. It is the different directions in which language usage has gone even in such closely related languages as French and English that makes language learning particularly difficult and frustrating. And it is this that makes automatic language translation machines such a distant dream (despite *Star Trek’s* “universal translator!”).

When learning and using another language, it is absolutely essential not only to be familiar with the expressions common in that language, but also to learn *not* to use expressions, word combinations and forms peculiar to your own language. This is equally essential whether you are trying to express yourself in French, Esperanto, or English.

PSEŬDONIMOJ

De Ralph Harry

La iniciatinto de la internacia lingvo eldonis sian unuan libron en 1887 sub la nomo Doktoro Esperanto. Tiu pseŭdonimo fariĝis la nomo de nia lingvo.

En multaj landoj kaj lingvoj oni uzis "kaŝnomojn", por eviti la cenzuristojn, aŭ ĉar la aŭtoro deziris verki anonime pro aliaj kialoj.

Pseŭdonimoj en Aŭstralia Literaturo

En *Aŭstralia Antologio* ekzemple troviĝas kvin aŭtoroj kiuj uzis plumnomojn:

Alexander Browne (Rolf Boldrewood)

Miles Franklin (Brent of Bin Bin)

Ethel Florence Lindesay Richardson
(Henry Handel Richardson)

Arthur Hoey Davis (Steele Rudd)

Joseph Furphy (Tom Collins)

Famaj pseŭdonimoj

Inter 1769 kaj 1772 aperis en la *Public Advertiser*, Angla ĵurnalo, serio de leteroj subskribitaj "Junius". Ili celis detrui la reputacion de la ministraroj de Georgo la Tria kaj unuigi la opozicion. Ili estis tranĉaj, kaj stile elegantaj. Multaj homoj klopodis penetri la maskon de "Junius". Oni sugestis Kavaliron Philip Francis, aŭ Edward Gibbon, eĉ Edmund Burke aŭ John Wilkes, Lord Chesterfield aŭ Thomas Paine. Sed la mistero ankoraŭ restas nesolvita.

Kelkfoje oni uzis pli ol unu pseŭdonimon. Voltaire (François-Marie Arouet) uzis almenaŭ 137 pseŭdonimojn kaj Benjamin Franklin uzis 57! Ho

Chi Minh uzis, de tempo al tempo: Cung, Nguyen Tat Thanh, Ba, Nguyen Ai Quoc, Vuong, Line, kaj Tran. Sed Josip Broz estis ĉiam "Tito", kaj Josif Visarionovich Dzhughashvili estis "Stalin".

Famaj aŭtorinoj

En la 19-a jarcento estis konsiderate ne "ĝentile" ke sinjorino verkas romanon. Pro tio Mary Ann Evans uzis la pseŭdonimon George Eliot kiam ŝi verkis *The Mill on the Floss*. Same en Francio Amandine Lucile Aurore Dupin, la Baronino Dudevant, uzis la plumnomon George Sand. Mi jam menciis Ethel Richardson.

Modernaj plumnomoj

Ofte plumnomoj estis Latinigo de nacia nomo, ekzemple Nicolaus Copernicus (Mikolaj Kopernik) kaj Comenius (Jan Amos Komensky) kaj eĉ Lewis Carroll (Charles Lutwidge Dodgson).

Sed pseŭdonimoj ne nepre rilatis al la veraj nomoj. Tio tro helpus al la cenzuristoj! La Usona romanisto Samuel Langthorne Clemens uzis Mark Twain el la voko signifanta "Notu du klaftojn!" uzata sur la riverŝipoj sur la Rivero Mississippi.

Kelkfoje profesiulo kiu havis reputacion, kiel ekzemple kuracisto; aŭ verkisto kiu fariĝis konata kaj respektata en unu fako uzis pseŭdonimon kiam li verkis popularajn verkojn. La poeto C. Day Lewis uzis la plumnomon Nicholas Blake kiam li verkis detektivromanojn. James Bridie estis pseŭdonimo de Skota kuracisto O.H. Mavor.

Aŭstraliaj kaj internaciaj aŭtoroj de verkoj en Esperanto


Jen kelkaj aŭstraliaj kaj internaciaj Esperantistoj kaj listo de pseŭdonimoj. Penu parigi la nomojn kun la kaŝnomoj:

- | | |
|----------------------|------------------|
| 1. Eugène Adam | A. Sukro |
| 2. Kazimierz Bein | B. Grenkamp |
| 3. Claude Piron | C. Diplodoko |
| 4. Madeleine Stakian | Ĉ. Ezoko |
| 5. Hans Fethke | D. Delsudo |
| 6. D-ro Kornfeld | E. Kabe |
| 7. Hosegawa Teru | F. Eleno |
| 8. Maurice Hyde | G. Robo |
| 9. G. Pyke | Ĝ. Gego |
| 10. George Gordon | H. Revanto |
| 11. Frank R. Banham | Ĥ. Mad Mevo |
| 12. Ralph Harry | I. Jean Forge |
| 13. Wre Chandler | J. Verda Majo |
| 14. Joab Eljot | Ĵ. Johano Valano |
| 15. Len Newell | K. Lanti |


Konkurso

La unuaj kvin personoj sendintaj al la redaktoro tute ĝustan solvon de la ĉisupra ekzerco ricevos surprizpremion.¹


¹ Ĉu Ralph Harry rajtas konkursi?—Odlo

² Ne.—


³ Ĉu do la redaktoro?

⁴ Ankaŭ ne li.—

⁵ Ĉu mi?—Odlo.

⁶ Vi jam partoprenis.—

⁷ Kie?—Odlo.

⁸ Eble konkursanto povos diri.—

ODLO EN ANTARKTIKO!

Odlo Bokserp, nia preskontrolisto, flugis al Antarktiko frue en majo, ĉijare, laŭ invito de la redakcio de *Pingvena Esperantisto*, la organo de la Antarktika Esperanto-Asocio. Ĉiujn vivtenajn elspezojn ili pagis (23 fiŝojn ĉiutage, plus uzadon de kabaneto konstruita el glaciaj blokoj frontanta puran neĝan ebenaĵon, kaj propran neston kie li rajtis sidi neĝenate sur siaj ovoj), malavara donaco ebligita de speciala fonduso de AEA/suda al kiu ni elkore dankas, kaj la flugon kompleze provizis senkoste albatroso tiutempe veturanta al amikino sia loĝanta proksime de la latrino famigita de David Attenborough en sia televida filmserio.

Odlo kunportis, siavice, donacon por AEA/suda: novan Makintoŝ-komputilon speciale konstruitan por tiu celo de Apple Computer Inc., kapablan funkcii je la temperaturo reganta en tiu regiono. Li ankaŭ kunportis malgrandan fridujon en kiu la redakcio de *Pingvena Esperantisto* povos konservi siajn luncofiŝojn freŝaj.

Odlo diris ke *Pingvena Esperantisto* estas unu el la plej elstaraj eldonaĵoj en la Esperanta mondo. Li diris ke ĝi estas unika pro sia ĉiumonata aldono de kompakta disko de la plej novaj fiŝkantoj en Esperanto, sur la kovrilo de la gazeto.

Li ankaŭ gratulis ĝin pro ĝia rekorda nombro da preseraroj, averaĝe 37 en ĉiu paĝo dum 1995, kio superis eĉ la antaŭan rekordon establiton de *Praliteratura Forio*, eldonata en Svisio (36 en ĉiu paĝo dum 1884).

Odlo ankaŭ partoprenis en la speciala Kuŝrito okazigata honore al vizitantaj eminentuloj (foto, p.27). □



LINGVA ANGULO



De Alan Towsey

Antaŭ nelonge amiko mia (kaj jam sperta Esperantisto) protestis kontraŭ mia korekto de frazo sia: “Mi ne vidas lin ekde preskaŭ dek jaroj” al “li ne vidas lin ekde preskaŭ dek jaroj,” citante Step by Step in Esperanto de M.C. Butler, §1063:

When an action or state begun in the past still continues at the time of speaking (“present continuance with past inception”) English uses a past tense, but Esperanto a present tense. *Mi estas ĉi tie de lundo*, “I have been here since Monday”.

Now, because Esperanto usage here follows that of the major European languages, I shall discuss this point in English, for greater clarity, since it affects mainly English speakers, and can be particularly tricky for them.

Those who know some French or German will be aware that the equivalents of the example given by Butler in those languages also use the present tense:

Je suis ici depuis lundi.

Ich bin seit Montag hier.

They will also be aware that when the sentence is *negative*, they follow the English usage:

I haven't seen him for a long time.

Je ne l'ai pas vu depuis longtemps.

(Il y a longtemps que je ne l'ai vu.)

Ich habe ihn seit langem nicht gesehen.

Esperanto does likewise:

Mi ne vidas lin (jam) delonge.

(Incidentally, another way of expressing the initial example above is:

Mi ne vidas lin de antaŭ preskaŭ dek jaroj.)

I have been able to find three similar examples in Zamenhof's usage:

Mi ne vidas lin ĝis nun. (Genezo 44:28)

Mi pluvigos tre grandan hajlon, tian, ke simila al ĝi ne estis en Egiptujo de post la tago de ĝia fondo ĝis nun. (Eliro 9:18)

Mi forte miras, ke mi jam tiel longe (= delonge) ricevis de vi nenian leteron.²

The logic of this seems to be that really no action or state has begun in the past continuing into the Present—nothing has happened: you haven't seen him! It wouldn't make much sense to say, if you suddenly meet an old friend whom you haven't seen for ten years: “Petro! Kia surprizo! Mi ne vidas vin de antaŭ dek jaroj.”

I have never seen this point clarified in any textbook or reference work, possibly because (1) it presents no problem to most Europeans, who simply take it for granted and (2) it doesn't seem to have occurred to the compilers of English language textbooks!

Some Usage Points

They look happy — Ili aspektas feliĉe. But (following Zamenhofan usage): Ili aspektas tute feliĉaj. Note

also the following (taken from *PIV*):

Vi aspektas tiel vire maltima!¹
(You look so manly and fearless)

Akvo fluetas el la buŝo de la (bronza) besto, kiu pro maljuneco aspektas tute mallume verda.² (quite dark green)

Zamenhof used the adverbial form of the predicative after *aspekti* where English uses the adjectival form. However, when this is preceded by another adverbial form, Zamenhof generally preferred the adjectival form, as in English.

eventuala = any (that may occur); contingent (Wells)

contingent, eventual, liable to (that may) happen (occur) in certain circumstances. *eventuala akcidento/profito, eventuala elirejo, emergency exit* (Butler)

Povanta okazi, depende de necertaj cirkonstancoj: *la eventualaj profitoj de la afero* (PIV)

eventuale = en okazo de bezono: *Skribu, eventuale telegrafu* (PIV)

if need be, if the case should arise (Wells)

if necessary, in case of need, on occasion, should the need arise (Butler)

eventual = (consequent, ultimate) rezulta, fina.

His many mistakes and his eventual failure—liaj multaj eraroj kaj lia rezulta malsukceso.

This resulted in the eventual disappearance of the species—Tio ĉi okazigis la finan malaperon de la specio.

eventually = fine, iam (e.g. *she will*

eventually come: ŝi iam venos)
(Benson)

We eventually found it—Ni fine trovis ĝin.

eventuality = eventualaĵo.

<<<<<>>>>

- revise* = 1. revise an article: kontroli artikolon (before printing)
2. revise a book: revizii libron
3. revise one's opinion: ŝanĝi/modifi sian opinion
4. revise a law/document: amendi leĝon/dokumenton
5. (study) relegi studmaterialon/siajn notojn (pri io) (e.g., for an exam)

I'm going to revise my French tonight—Mi intencas relegi/restudi miajn Francajn librojn ĉi-vespere/reaŭskulti miajn Francajn diskojn/sonbendojn, ktp. (according to the sense)

<<<<<>>>>

opposite = (facing; contrary) kontraŭ(a)

Their house is opposite ours—Ilia domo estas kontraŭ la nia (Benson)

to sail opposite the wind—veli kontraŭ la vento

opposite winds — kontraŭaj ventoj

on the opposite side of the road—ĉe la alia flanko/ali-flanke de la vojo

directly opposite—rekte kontraŭe

the opposite sex — la alia sekso

(diametrically different) mala, male, malo

Tio havas la malan signifon. "Sub" estas la malo de "super" (Benson)

iri en la mala direkto.
It's just the opposite—(Estas)
tute male!
his opposite number — lia
homologulo / samrangulo/ ek-
vivalento/samoficulo

<<<<<>>>>

to mark an essay / examination paper
— prijuĝi / taksi eseon/
demandaron
homework/an exercise — ko-
rekta hejmtaskon/ekzercon
to give full marks to—doni
plenajn poentojn al

<<<<<>>>>

to speculate = (on the financial market)
spekulacii, spekulii
(reflect, meditate) pensi,
mediti (pri)
(indulge in conjectural
thought) spekulativi, konjekti,
hipotezi (pri, ke)

<<<<<>>>>

so that = (in order that) por keu
I put it there so that you could
find it easy—Mi metis ĝin tie
por ke vi povu facile trovi ĝin.
(in such a way that) tiel ke...
Arrange the flowers so that
the roses are in the mid-
dle—Aranĝu la florojn tiel ke
la rozoj estos en la mezo.

Some more conversational phrases

Dankon! Ne dankinde! — Thanks!
Don't mention it!
Zorge!—Careful!
Ne koleru!—Keep your hair on!
Ne paniku!—Don't get your knickers
in a knot!

Lasu min trankvila—Leave me alone
Faru vian eblon—Do your best
Jen ja via maniero!—That's just like
you!

Ne mi estas kulpa (pri tio)!—It's not
my fault! Don't blame me!

Kion tio utilas?—What's the good/use
of that?

Ĉu tio iel utilos al vi?—Is that of any
use to you?

Por kio ĝi utilas?—What's it used for?
sin direkti al—make one's way to □

Alan Towsey atentigas: "Se oni
ne baldaŭ sendos al mi de-
mandojn aŭ interesaĵojn, mi
komencos trovi malfacile trovi
taŭgajn pritraktindajn temojn!
Legantoj bonvolu sendi al mi
ekzemplojn de malbona uzado,
eraroj, aŭ aliaj interesaĵoj."
Adreso: 19 Market St, Tahmoor
NSW 2573.

ESPERANTO EN LA INTERNET

Nun (aprilo 1996) partoprenas 52
redaktoroj de Esperanto-gazetoj en 23
landoj, en la Redaktora Grupo de la
Internet. La celo de la Grupo estas
ebliĝi tujan informadon tra la mondo,
pri Esperanto-eventoj. La Grupon nun
administras la redaktoro de *Eventoj*.
Adreso: <eventoj@ODIN.NET>. Povas
aboni la informojn ĉiu persono kiu
havas elektronikan poŝtadreson.

KIU ESTAS KIU EN LA AŬSTRALIA ESPERANTO-MOVADO?

55. Donald Broadribb

Verkis Ralph Harry



Donald Broadribb, elektita fratulo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio en 1996, faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado dum 50 jaroj.

Naskiĝis li en la urbo Rochester, en la ŝtato Novjorko, Usono, en 1933. En 1945 li aĉetis Etan Bluan Libron pri Esperanto kaj meminstrue lernis. En 1946, dank' al sia fratino li konatiĝis kun la Esperantisto-socialisto Karl Nell, kaj akiris la libron *Step by Step in Esperanto* de la Angla Esperantisto M.C. Butler.

Donald studis en diversaj universitatoj: en Rochester, de la ŝtato Illinois, Union Theological Seminary en Novjorkurbo, la Universitato de Chicago, la Universitato de Melburno en Aŭstralio, kaj en la C.G. Jung Institute en Zuriĥo. Tre interesis lin la lingvoj, kaj li doktoriĝis en la filologio de antikvaj mezorientaj lingvoj, inter ili la Hebrea.

Grava kontribuo al la evoluo de

Esperanto estis la *Supplement to the Esperanto-English Dictionary of Milidge*. Post enketado kaj reserĉo de multaj miloj da vortoj en la Esperanto-literaturo, Donald analizis ilin kaj en la *Supplement* indikis multajn necesajn neoficialajn vortojn, kiujn bezonas oficialigi la Akademio de Esperanto.

Li ankaŭ kunlaboris kun Rüdiger Eichholz de Kanado pri ties *Bildvortaro*.

En posta tempo Donald estis lektoro en la Universitato de Melburno, kie li daŭre helpis la movadon en Nord-Ameriko (redaktis ties *Revuon*), kaj komencis sian agadon en la Melburna Esperanto-Societo.

Donald ankaŭ tiutempe fariĝis la fondinto kaj redaktoro de *Biblia Revuo*. Gaston Waringhien priskribis ĝin kiel "la sola scienca revuo en Esperanto". Li persone proponis Donald kiel membron de la Akademio de Esperanto en 1971.

Donald aktivis 9 jarojn en la Akademio en la 70-aj jaroj. Li helpis pri la preparo de la 8a Oficiala Aldono. Li studis en Zuriĥo inter 1970 kaj 1975 kiel psikologo, poste revenis al Aŭstralio, kie li ekloĝis en Perto, la 24an de decembro 1975. Li fariĝis la redaktoro de *La Nigra Cigno* kaj komencis kontribui al *The Australian Esperantist*. En la 80-aj jaroj li ne estis akademiano kaj povis fari kelkajn gravajn tradukojn, el kiuj kelkaj aperis

en Biblia Revuo:

- manuskriptoj el la tradicia Siria lingvo

- mansukriptoj de la Morta Maro
- ĉapitroj de la *Aŭstralia Antologio*
- li ankaŭ kunlaboris kun Ralph Harry kaj Volo Gueltling pri la *Aŭstralia-Ĝesperanta Vortaro*.

Inter 1992 kaj 1995 Donald estis membro kaj prezidanto de la Ekzamena Komitato de AEA, por kiu li enkondukis bonajn modernajn ideojn.

En 1992 li denove elektigis Akademiano, kaj estas membro de la gramatika sekcio.

Dum la 1990'oj Donald tradukis kaj publikigis, i.a.,

- *La Respubliko* de Platono
- *Precious Bane* (revizio de la tradukode Grace Kirkwood)

- tri volumoj en la serio *The Wizard of Oz* (*La Sorĉisto de Oz*, *La Lando Oz*, *Ozma de Oz*).

- kaj li kunlaboris en la *Pekoteko-projekto* de Rüdiger Eichholz de Kanado.

La plej konata laboro de Donald por AEA estas la redaktado de *The Australian Esperantist*, nun *Esperanto sub la Suda Kruco*, kiun li redaktas ekde 1989. Li konstruis sur la fidela laboro de Reg Banham kaj Herbert Koppel (ambaŭ Fratuloj de AEA), kaj evoluigis pligrandigitan kaj profesie komputile presitan gazeton kiun legas ankaŭ multaj Esperantistoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando.


En la lastaj jaroj lia eldonejo Bookleaf Publishing (Eldonejo Librofolio) multe kontribuis al Esperanto.


Donald estis multe helpata de sia unua, nun forpasinta, edzino Rosemary. (Bedaŭrinde liaj edziĝoj kun

Eve kaj poste Norma finiĝis divorce.) Li estas ankoraŭ subtenata de sia filino Cheryl kaj de sia filo Peter, kaj Peter instruis ne nur al Donald, sed al aliaj, inkluzive de mi, pri la misteroj de la komputiloj.

Nun li ne havas edzinon, sed loĝas sola, kvankam ofte vizitata de najbaraj katoj. (La amata kamarado 42, nomita pro la *Gvidilo al la Galaksio por Petveturantoj*, mortis antaŭ unu-du jaroj.) Kaj kompreneble konstanta amiko estas Odlo Bokserp, konata de ĉiu leganto de ESK. Kune ili aŭskultas Sibelius kaj Ŝostakoviĉ, siajn preferatajn komponistojn.¹

¹ Ĉu eble samtempe?— Odlo.²

² Ĉit!—



NIA KONKURSO LA KANTOJ EL KUBO



SUKCESIS HAZEL GREEN

Brianta Luno

Maria de los Angeles Caraballo Mauriz

Al-te en la mont - et - o du -
 on-e kaŝ-ig - as la lun' Ti - el bel - a kaj ti - el
 bri-la Post la kres-to ĝi perd-ig - as nun.
 Kun esp-rim' de na-iv - ec' sam-temp-e kun kaj sen ĝoj -
 ec' Ĝi ĉi -ujn in-spir-as al rid - ad'
 Kaj al ti - a kant - ad' Bel - et - a lun - o arg-ent - a
 lun'. Vi bel - e bril-as je la mort-o de la sun'. Bel - et - a
 lun - o arg-ent - a lun'. Vi bel - e bril-as je la mort-o de la
 sun'.

originala tonalo

Aŭtuno Apud la Maro

Dez-ir - as mi kant - ant - e vag - i
For-pas - os ĉi - o, ĝin mi sci - as

Kaj re-serĉ - i vi - an am-ik - ec - on.
kaj temp - o ŝanĝ - os tut-an mond - on

Ki-e vi est - as? Ki-u sci - as?
Sed mi nen - i - am for - ges - os

Kaj ĉu vi rest - as trov - ebl - a?
La aŭt - un - on ĉe la mar - o.

a - mik - o , mi - a id - e - al - ul - o

Ho vi in - stru - is pri am - o

al mi - a kom - pat - ind - a kor - o

Ki-u scrĉ - ad - is i - an varm-on.

Hazel Green ricevis kiel premion la librojn La Mirinda Sorĉisto de Oz, Ozma de Oz, kaj Doroteo kaj la Sorĉisto en Oz.

Hoŝida Acuŝi vizitis Novzelandon

Mi ĝojas raporti ke mi povis vojaĝi tra la Norda Insulo laŭ la anoncita tagordo. Ĉar la plejparto de nia vojaĝo estis io oficiala inter ĝemelaj urboj, mi ne havis sufiĉan libertempon tie. Tamen mi havis oportunon renkonti kaj kune promeni kaj interparoli kun tieaj gesamideanoj.

En Napier min vizitis S-ino Agnes I. Bray el Havelock North, kun Ges-roj Lock kiuj tiam vizitis ŝin el Anglio. S-ino Bray informis min ke Robert Harding (Delegito de UEA por Napier) nun loĝas en Domo por Maljunuloj. Kaye Dobson estas nun malsana.

Intertempe mi trovis la telefonnumeron de S-ro Edgerton en telefonkajero. Do mi povis telefone paroli kun li dum iom da tempo en nia lingvo.

Laŭ densa tagordo okazis diversaj eventoj por festi la 15-jaran rilaton de la ĝemelaj urboj Napier kaj Tomakomai. Ceremonioj, Havena Tago, vizito al lernejoj, muzeoj, la Maoria Porknabina Kolegio St. Joseph, koncerto en la Urba Teatro, nia folkdanca parado tra la la stratoj, k.a. Ĉiam la urbanoj de Napier varme salutis nin. Ni povis plene ĝui la belan naturon kaj veteron de la urbo.

Kun granda ĝojo mi trovis la Sudan Krucon en nokta ĉielo, sed bedaŭrinde la Nebulozon Magelanan ne, pro tro da lampoj en la stratoj.

En Hotelo Sheraton Auckland mi salutis Bradley McDonald, Emin Baro, David Rockell kaj Howard Gravatt. S-roj McDonald kaj Baro gvidis min per aŭto al Monteto Eden, Parko Cornwall kaj Unuarba Monteto.

Koran dankon al vi, gastamaj Novzelandaj gesamideanoj! La ĝoja tempo de nia kunesto ĉe via bela lando restos eterne en mia memoro. Dankon ankaŭ al S-roj Don Rogers en Lower Hutt kaj E.T.F. Fidler en Whangarei, pro viaj bonaj sugestoj antaŭ mia vojaĝo. Mi deziras al vi ĉiuj feliĉon kaj prosperon.

Kelkajn horojn post la ekveturo el la Aŭklanda Flughaveno, ni estis super la verdaj Solomonaj Insuloj kie, antaŭ kvindekkelkaj jaroj, mortis centmiloj da homoj pro la kruela milito. Estu paco eterne en la Pacifiko!

Sincere via,
Hoŝida Acuŝi

□

//////////

Jeanie Wilson

Mi devas en la (tuja) estonteco sendi al vi nekrologon pri Jeanie Wilson, kiu mortis dum marto.—David Rockell

//////////

OKAZIS EN LA GRUPOJ

MANLY ESPERANTO CLUB

Komitato por 1996:

Patrono: Ralph Harry

Prezidanto: Robby Robertson

Vicprezidantoj: Eunice Graham kaj
Kevin Smith

Sekretario: Betty Cleminson

Kasisto: Margaret Robertson

Libro-agentoj: Irina Timonin kaj Janet
MacLelland.

Resumo pri 1995:

- Aĉetis brikon (donacon) por la nova Biblioteko de Manly, kun la nomo "Manly Esperanto Club" kaj alian kun la nomo "Marjorie Duncan Esperantist".
- Proĉeso de klasoj en la Manly Evening College, post 35 jaroj da klasoj tie, la klub-biblioteko translokiĝis al la Esperanto-Domo.
- Harry Peddy, multjara membro, mortis.
- Lilli kaj Lucien Giloteaux, el Francio, vizitis. Ankaŭ Ole Therkelsen el Danlando.
- Ralph, Kep & Doroteo, kaj Irina vojaĝis eksterlande; escepte de Irina ili ankaŭ partoprenis en la UK en Tampere kaj la post-Kongreso en S. Petersburgo.
- Peg Ford-Lewis fariĝis 98-jara.
- Malcolm Ross mortis, 84-jara, en majo.
- Ellen Meadem instruis du klasojn en la kadro de la Universitato de la 3a Aĝo, kun 5 komencantoj kaj 4 progresintoj.
- Partoprenis la Kristnaskfeston 31 anoj kaj amikoj.

Laŭ *Telopeo*, Marto 1996.

VICTORIA ESPERANTO-FEDERACIO

Komitato por 1996:

Prezidanto: Bernie Heinze
Sekretario: Margaret Inglis
Kasisto: Peter Inglis

MELBOURNE
ESPERANTO SOCIETY
Nova sekretario: Ken Rolls, 31
Miller Crescent, Mt Waverley Vic
3149.

ESPERANTO-FEDERACIO DE KVINSLANDO

SEMINARIO KAJ KONFERENCO
De Ray Ross

Tridek anoj kaj vizitantoj ĉeestis la unuan konferencon de EFK 1996 la 22-24an de marto en Toowoomba; en Withcott. Post alveno vendredon matene anoj vizitis la Universitaton de Suda Kvinslando, kie raportisto de la loka ĵurnalo *Toowoomba Chronicle* intervjuis Ralph Harry kaj Ronald Gates pri Esperanto. Plena raporto kun fotoj aperis en la sabata eldono. Je la dekdua la Vickanceliero de la universitato bonvenigis Esperantistojn kaj interesatojn al duhora seminario pri Esperanto, kie Ralph Harry, Ron Gates kaj Karakán Kochárdy prelegis vice pri la Origino kaj Celo de Esperanto (Ralph), Esperanto-literaturo (Ron), Instruado al infanoj (Karakán). Ĉiuj tri respondis al diversaj demandoj. La Toowoomba-Societo starigis Esperanto-ekspozicion en la fama Japana Ĝardeno Ju Raku. En por tetrinki kaj babiladi, poste estis la Greka Dramo *Edipo*, kaj post tio vespermanĝo en Withcott sekvate de distrovespero kie okazis komuna kantado, raportoj pri la AEA/NZEA Kongreso en Aŭklando, la Somerlernejo en Adelajdo kaj la preparado por UK-97 en Adelajdo.

Sabate: Ron Gates estris sesion pri verkado, proponis komencliniojn al diversaj grupetoj; rezultis sep novel-etoj, por estonta eldono. Ralph Harry parolis pri Esperantoligoj al Internaciaj Aferoj; Karakán Kochárdy prezentis sian instrumentodon specialan por infanoj; Kay Andersen muzikis kaj montris kiel eblas adapti Esperantotradukojn al originalaj melodioj en diversaj popolkantoj.

Ege ĝuiga konferencovespermanĝo okazis, sekvate de distraĵo, komuna kantado, brila kantserio de Jim Jones, ŝercoj de Tom O'Grady, skeĉlegado de Peggy Ross, Tom O'Grady, Lillian Newman, Kay Andersen, Caroline Turner kaj Merv Schramm; poemdeklamis Joyce Turner. Dum EFK-kunsido la estraro reelektiĝis unu-anime. La dua konferenco por 1996 okazos en Noosa en oktobro.

Jarpikniko apud Ipswich temos pri gepatroj de studentoj en la Adventista Lernejo. Laŭ propono de Jennifer Dimo, EFK starigu budon dum la Aŭstralia Skolta Ĵamboreo ĉijara, ankaŭ apud Ipswich.

Dimanĉe: Margaret Skeel (Price) dum intervjuo por la programo "Bahai Spectrum" en Radio 4DDB brile respondis al demandoj pri Esperanto. Lena Buchan gvidis Ekumenan diservon; Jean Lehane enkondukis Esperantoludojn. Estis plezuro bonvenigi anojn de la Lower North Group, Bill kaj Betty Aulsebrook kaj Harold Patterson, al la konferenco. Dankon al la Toowoomba-Societo pro la aranĝoj dum ĉi tiu intereseĝa semajnfino.

UK 1997 EN ADELAJDO

Estas mia plezuro informi vin ke nia fonduso Amikoj de la 82-a UK 1997 nun havas \$4050, post donacoj fare de Stan Bruton, Betty kaj Bill Aulsebrook, kaj la Oakley Esperanto Group. Dianne Lukes

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ


KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio: AŬ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membr-eco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA. PO Box 230, Matraville NSW 2036.


Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: NZ\$40 por individuo, %50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.Gld., pagu



ODLO EN ANTARKTIKO: PLEJ NOVA FOTO



Fotis P. Dikventrulo, ĉe la Anatolfranca ekspozicio, Antarktiko

al la konto aĉal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA. Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1996 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

de *La Pingvena Esperantisto*. Abonprezo ekster Antarktiko: 3 fiŝoj jare. Komputilo uzita estas Macintosh 9500Ĉ. Alfabetoj uzitaj estas Nova Baleno 12pkt kaj Plena Gluto 18pkt.

La redakcio respondecas pri neniu teksto en ĉi tiu numero de ESK. Ĉiujn plendojn sendu al Odlo Bokserp, Asteroido Zamenhof, Galaksio Laktovojo

Ĉi tiun numeron kompostis P. Longbekulo, por la Antarktika Esperanto-Asocio, kiel Aŭstralazian suplementon

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Business Network, 5/25a Oxford St, Bondi Junction NSW 2022.

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 22 [1996/4] — Julio-Aŭgusto 1996

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralia.
✉ kaj faksoj: 096 46 1389.

e-poŝto: enkidu@perth.dialix.oz.au

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralia.

Korespondaj kursoj: D. Lukes & H. Green, PO Box 1814, Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3.5-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto estu klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ✉ 09-270 3669.

Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ✉ kaj faksoj: 09-579 4767.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Pri abon- kaj membro-kotizoj, vidu paĝon 27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Profesia konvertato (Broadribb).....	3
Unua analizrezulto de EKPAROLI.....	7
Nia konkurso (rezultoj).....	10
Kiu estas kiu: Ellen Meadem	11
La vorto "foje".....	11
Provu vian vortoscion	12
UK Adelajdo 1997.....	14
Deziras korespondi.....	15
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	16
Transitiveco kaj netransitiveco de verboj (Marcel Leereveld).....	19
Aldono al la Librokatalogo	23
Lokaj informoj	24

Recenzoj:

Bibliografio de tradukojel la Angla lingvo	8
Tria kolekto de krimnoveloj	8
Stokita vino	8

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la septembra numero: 23 aŭgusto.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet. Adreso:

<http://www.emedia.com.au/users/peterb/esk/>

PROFESIA KONVERTATO

Rakonto de Donald Broadribb



i estis
tiutempe
multe pli
juna ol
nun.

Temas
pri la fino

de la 1950'oj. Mi tiutempe estis studento en teologia edukejo en la granda urbo Nov-Jorko. Pro manko de mono mi luis ĉambron en la studentloĝejo de la edukejo mem, kaj tie mi sidis unu nokton legante romanon *La Leono, la Sorĉistino kaj la Vestoŝranko* de bone konata teologo kaj romanisto C.S. Lewis. Apud mia mano estis botelo da vino (dolĉa ŝereo, kiun mi abunde kaj plezure trinkis tiutempe). Mi rigardis mian horloĝon—estis la 11a kaj duono, mi enlitigis finleginte la aktualan ĉapitron. Kompreneble, ĝuste kiam mi atingis nekutime ekscitan parton de la rakonto, kaj komencis turni paĝon, aŭdiĝis frapo sur la pordo. Mi diras "kompreneble", ĉar en ĉiu bona streĉa rakonto tio okazas, ĉu ne? Kaj ankaŭ en la reala vivo, kiel ĉi tiam.

Iom necerte mi levis min el la seĝo kaj malrapide promenis la du aŭ tri metrojn al la pordo. Vizitoj tiu-horaj estis tre oftaj, en la studentloĝejo, do min ne mirigis la pordo-frapo. Verŝajne iu volas pruntepreni ion. Malferminte la pordon, mi trovis ke la vizitanto estas konato, studento kiu kun mi kaj unu alia studento laboras semajnfinojn kiel junularlaboristoj en malnova preĝejo

en Bronx (unu el la plej krimoplenaj partoj de Nov-Jorko). Li envenis, sidigis, laŭ sia kutimo eĉ sen saluto. Mi pergeste proponis al li vinon, sed li pergeste indikis ke ne, kio ĝojigis min ĉar mi mem intencis fintrinki la botelon.

"Ĉu iam mi rakontis al vi pri mia veturo al Moskvo?" li demandis.

"Pri la student-kongreso, jes," mi diris. Mia amiko kelkfoje rakontis pri tio, preskaŭ fiere, al siaj konatoj; li tute ne sekretis pri ĝi. Mi kvazaŭ kolektas "sekretajn" agentojn en mia konataro, kvankam pri tio mi eble parolu pli detale aliffoje. Ĉi tiu amiko estis dungita, dum la McCarthy-epoko, partopreni en internacia junular-kongreso en Moskvo, kun la celo observadi kunusonanojn partoprenantajn kaj poste raporti al registara instanco kiu kompiladis dosierojn pri "komunist-simpatiantoj" inter la junularo. Iom amuze, la tria studento en nia grupeto kiu laboris en Bronx estis fervora komunisto, kiu disvastigis sian komunistan reputacion per ĉiumatena aĉeto de la tagjurnalo *The Daily Worker*, kaj ofta mencio pri ĝia enhavo dum klasoj. Kelkfoje mi distris min per amuza penso ke eble mia "komunista" kunlaboranto estas sekreta agente de la Usona registaro, kaj mia "kontraŭkomunista" kunaboranto estas sekreta agente de la KGB. Sed tio estis nur privata ŝerco mia, kiun mi ne aŭdacis pervoĉe esprimi.

"Nu, vi aŭdis jam pri la 'Evangelia Krucmilito' kiu post kvar monatoj

komenciĝos? Nia preĝejo partoprenos, kaj ni mem devos helpi."

Krucmilito estis nomo uzata por serio de amaskunvenoj aranĝitaj de evangeliisto en iu urbo.

"Jes, Pastro —*— menciis ĝin al mi antaŭ kelkaj tagoj," mi respondis. "Kaj mi legis menciion en *New York Times* pasintan dimanĉon. Mi ne scias kiom ni devos aktive helpi, tamen."

"Sendube ni devos almenaŭ partopreni en la amaskunvenoj. Nu, tiu Evangelia Krucmilito estas komunista fronto."

Mi ridis. "Kion? —††— [La nomo de la evangeliisto] estas intima amiko de la Prezidento [Eisenhower]?"

"Tiaj estas komunistaj frontoj. Ili havas respektindan 'frontulon' por trompi la publikon."

"Sed kial? —††— kaj lia organizo konstante furiozas kontraŭ la 'Imperio de la Diablo'?"

"Ĉu vi ne scias kiom da mono ili kolektas dum ĉi tiuj Krucmilitoj? Milionojn. Estas preskaŭ nekredible. Kaj per siaj amaskunvenoj ili influas centmilojn da homoj."

Nu, mi devas diri ke mi ne kredis tiun mian amikon tiam, nek mi kredas lin nun. Dum la tuta epizodo pri kiu temas mia rakonto mi neniam trovis eĉ spureton da komunista influo en tiu Evangelia Krucmilito pri kiu mi parolas. Sed li estis tiom certa ke ne eblis kontraŭargumenti lin. Kompreneble la celo de lia vizito estis varbi min kiel sekretan observiston en la amaskunvenoj. Mia tasko estus ĉiuespere, en la amaskunvenoj, fariĝi sindediĉanto. Jargone ni nomis tian personon 'profesia

konvertato'.

Se vi ne konas la organizadon de tiaj Evangeliaj amaskunvenoj, mi nur diru ke post du-tri horoj da entuziasmiga parolado, kantado, kaj predikado, la Evangeliisto petas ke la pekuloj antaŭenvenu al lia podio por dediĉi sin al Kristo. Ĉe la podio konsilistoj renkontas la antaŭenvenintojn por poste intervui ilin kaj plusendi ilin al religiistoj por helpi ilin plu renkonti Kriston'. Nu, en amaso da plur- aŭ eĉ mult-mil personoj en tia kunveno, estas tre timige sin elstarigi per tia publika sindediĉo ĉe la podio. Oni multe pli facile perdas sian timon se oni vidas ke jam aliaj personoj en la grupego sin levas kaj antaŭeniras. Do la Evangeliista organizo antaŭarangas ke fidelaj membroj en ĉiu kunveno starigas kaj antaŭeniras, altirante al si atenton, por kuraĝigi la timantojn. Mia avino estis tia "profesia konvertato" en sia Baptista preĝejo.

Kiel profesia sindediĉanto, mia amiko diris, mi povos iom post iom firmiĝi kiel partprenanto en la organizo de la Evangeliisto, kaj eble penetri la supozatan sekretan nivelon komunistan en tiu organizo.

Estis malfacile rifuzi la proponon. Por akiri postenon de instruisto mi jam antaŭ kelkaj jaroj devis subskribi solenan deklaron ke mi nek estas nek estis membro de la Komunista Partio. Kaj, grave, ke mi ne simpatias kun ĝiaj celoj; kaj ĉia rifuzo pruvu tion povus kaŭzi perdon de mia kariero. Kaj ke la FBI jam havas dosieron pri mi, tion mi jam bone sciis. Krome, konfesendas ke la proponata ĉeko por \$50 multe

helpis persvadi min. (La CIA neniam estis malavara al siaj sekretaj agentoj.)

Do mi akceptis.

La "Krucmilito" mem estis tre interesa, kaj postulis multan laboron. Nia preĝejo organizis plurajn komitatojn. Volontuloj proponis sin kiel helpistojn: iuj provizis transporton, ŝoforante interesatojn al kaj de la stadiono kie la kunvenegoj okazas; iuj gvidis grupojn uzante la subteran fervojon kaj la aŭtobusojn; iuj disdonis informfoliojn kaj diskutis detalojn kun interesatoj; unu-du trejniĝis kiel konsilistoj laborantaj pri sindediĉintoj je la fino de ĉiu kunveno; du-tri aliaj trejniĝis por konsili kaj gvidi konvertitojn kiujn la konsilistoj ĉe la kunvenoj transendas al la preĝejo por pli profunda konsilado; ks. Ĉar centoj da preĝejoj en Nov-Jorko partoprenis en ĉio ĉi, la nombro da nepagataj kunlaborantoj de la Krucmilito estis centoj. Ankaŭ mi, kiu laboris kiel profesia sindediĉanto, devis trejniĝi. Mi devis lerni legi la mienojn de eblaj konvertitoj en la kunvenoj, taksi la ĝustan momenton ekstari kaj antaŭeniri por "ricevi Kriston", por plej influ la homojn sidantajn proksime de mi; mi devis lerni la ĝustajn komentojn kiujn mi flustru dum la kunvenoj al kunsidantoj por konvinki ilin; mi devis familiarigi kun la geografio de la stadiono, por povi facile kaj senĝene marŝi inter la seĝovicoj por atingi la pordojn, scii kiujn ŝtuparojn uzi por ne kolizii kontraŭ aliaj profesiaj sindediĉantoj, kaj, kompreneble, kuraĝigi preskaŭpretajn konvertitojn akom-

pani min kiam mi antaŭeniras por ricevi Kriston. Oni emfazis ke por sukcesi necesas detale antaŭplani kaj profesikvalite aranĝi ĉiun detalon de la kunveno.

Verŝajne mia priskribo ŝajnas kruda kaj manipulema, malsincera. Sed vi eraras. Kaj kvankam la teologio de la Evangeliisto ne vere konvinkis min, ĉar mi jam perdis ĉian kredon je Kristo kaj la religia sistemo, min tre interesis la sociologia fenomeno religia. Tute malcinike mi deziris studi la filozofian kaj psikologian meĥanikon per kiu tiaj amasmovadoj funkcias. La konvertitoj kaj nekonvertitoj, la konvertitoj kaj nekonvertitoj, kaj la funkciiguloj mem de la entrepreno, estas miaj kunhomoj, kaj rajtas al mia respekto kaj komprenemo. Eble estus ia konflikto inter tiu respekto kaj la spionado kiun mi entreprenas. Sed \$50 estis granda sumo por mi kiu malofte vidis tiom da mono je unu fojo. Cinika mi ne estis; manĝobezona mi ja estis.

Nu, alvenis la tagoj de la Krucmilito. Ĝi daŭris dekkvin tagojn, komenciĝante je dimanĉo kaj finiĝante per granda manifestacio la postsekvanta dimanĉo. Ĉiun vesperon dum du horoj kaj tridek minutoj mi sidis sur benko en la grandega stadiono, inter dekoj da miloj da kunhomoj.

La unuan mardon kantis de la podio bone konata basa kantisto laŭte kaj emocie kaj kortuŝe tradician himnon, "Ho Sinjoro mia Dio, kiam mi kun solena miro rigardas ĉion kreitan de via man'..." Dum li kantis junulino sidanta apud mi

flustris al mi, "Pli belan voĉon mi neniam aŭdis." Mi kapjesis—efektive min tre emociigis la kantado.

Poste, dum la Alvoko veni al Kristo, ŝi flustris, per preskaŭ larmeca voĉo, "se tiu kantisto mem alvokus, verŝajne mi antaŭenirus."

Mi kapjesis.

Jam pluraj proksimaj kunsidantoj komencis levi sin por antaŭeniri do mia sindediĉo ne estos bezonata ĉi-vespere. Mi dankeme restis sidanta, apud tiu vere tre allogaspekta samagŭlino.

Merkrede mi sidis sur alia benko, kaj la junulino ne estis apud mi. Sed ŝi rimarkis min, de iom distance, kaj mangelis salute al mi. Denove mi ne sindediĉis kiam aŭdiĝis la Alvoko.

Lunde, mi trovis ŝin sidanta apud mi denove.

"Ĉu kafon post la kunveno?" ŝi flustris.

"Jes," mi flustre respondis.

Malgranda kafejo troviĝis en la teretaĝo de la stadiono, kaj tien ni puŝis nin tra la homamaso post la finiĝo de la kunveno. Sidante ĉe tableto ni povis iom konversacii. Ni baldaŭ trovis ke ni ambaŭ uzas la saman subteran trajnon por hejmeniri, do ni povis plukonversacii dum la hejmenveturado. Mi estis tre timida knabo kaj nenion proponis, sed ŝi komentis ke eble ni povos denove kune sidi dum la morgaŭa kunveno, kaj mi volonte konsentis.

La duan vendredon de la Krucmilito necesis ke mi ekstaru kaj antaŭeniru, ĉar mi ne sufiĉe faris tion dum la antaŭaj tagoj. Do dum la Alvoko, post longa kaj forta pre-

diko pri la neceso ke Usonanoj revenu al Kristo por povi venki en la malvarma milito kontraŭ la kontraŭdiaj komunistoj, mi surpiediĝis. Tuj la nova konatino levis sin ankaŭ kaj kune ni promenis al la podio.

"Dankon ke vi antaŭeniras," ŝi komentis al mi dum nia antaŭenmarŝo, "mi ne kuraĝus iri sola, sed delonge mi deziras min dediĉi."

Okazis iom da konfuzo dum la antaŭenirintoj aranĝis sin ĉe la podio. Ĉar la Krucmilito proksimiĝis al sia fino, la nombro da sindediĉantoj multe grandiĝis. Ĉifoje 75—la rekordo estis 134 dum la fina dimanĉa kunveno—, kaj ĉar nur 20 konsilistoj troviĝis, ni bezonis iom atendi. Mia nova amikino kaj mi denove aranĝis kunkaŝtrinki post la konsiliĝo.

Komprenoble mia propra konsiliĝo postulis nur malpli ol minuton, ĉar mi estis profesia konvertato, do nur montris al la konsilisto mian identigilon—en aparta ĉambro, por ke la veraj konvertatoj ne seniluziĝu pri mi. Mi tuj iris al la kafejo por atendi tie mian amikinson. Ŝi venis eble unu minuton poste.

"Ĉu ankaŭ vi estas profesia konvertato!" ŝi diris surprizite, kiam ŝi vidis min.

Mi kapjesis.

Ŝi sidiĝis ĉe mia tablo kaj ni komencis konversacadi. Montriĝis ke kaj ŝi kaj mi estis dungitaj de la Organizo, por inspiri interesatojn sin dediĉi je la Alvoko. Ni iom ridis pro tiu koincido, kaj ni ŝerce provis luddiveni kiom de la sindediĉantoj estas aŭtentikaj kaj kiom dungitaj.

Mi demandis al ŝi kial ŝi parto-

prenas en la Krucmilito.

"Ĉu vi ne scias?" ŝi demandis, ridetante. "Mi estas filino de -††- [la Evangeliisto estranta la Krucmiliton]. Mi supozis ke tial vi interesigas pri mi."

"Ne, mi ne sciis," mi respondis. "Mi interesigas ĉar vi estas vi. Ĉu via 'vi' emus trinki glason da vino kun mi en mia ĉambro en la Eduk-ejo?"

"Kial ne?"

Ni kune prenis la subteran trajnon kaj multe ĝuis la kuneston.

Mi neniam revidis ŝin.

Tamen, kelkajn monatojn poste, atingis min poŝtkarto kun sola vorto "Saluton" kaj ŝia subskribo. La poŝtstampo diris Moskvo.

Nu, jen la fino de mia rakonto. Mi esperas ke vi ne anticipis ekscitan kulminon. Plejofte la vivo ne estas tia.

Mi forgesis, eble vi volas scii pri mia studkolego kiu instigis min partopreni en la Krucmilito. Li revenis al mia ĉambro, post la lasta tago de la kunvenoj, kaj demandis al mi:

"Nu," ĉu vi trovis komunistojn?"

"Ne," mi diris. □

UNUJAJ ANALIZREZULTOJ DE EKPAROLI

el raporto de Alan Bishop

Ekstakto el la rezulto de demandaro al la studentoj en la 6a jaro de la elementa lernejo, post la fino de ilia studado de fremda lingvo (detalojn trovi en la *Angla Suplemento* de ĉi

tiu numero de *ESK*.)

La dua parto (de la demandaro) petis informon precipe pri la specifa LOTE [*Language Other Than English*] studita, ĉu ili ĝuis la studon, kaj kiujn karakterizaĵojn de la LOTE ili trovis malfacilaj aŭ facilaj.

Rezultoj

Kelkaj karakterizaĵoj de la respondintoj

Kvar LOTE-oj estis studataj en la koncernaj lernejoj; la nombro da studentoj taksitaj estas:

Esperanto	80	en 3 lernejoj
Japana	57	en 2 lernejoj
Germana	40	en 1 lernejo
Indonezia	44	en 1 lernejo

Knabinoj: 115

Knaboj: 108

El Anglularolanta fono (ESB): 151

El neanglularolanta fono (NESB): 72

La plej kutimaj aliaj lingvoj estis la Greka kaj la Ĉina.

Kun plezuro lernas LOTE-n: 153

Preferus ne lerni LOTE-n: 69

Opinioj pri la graveco de lernado de LOTE:

tre grava	54
iom grava	123
negrava	38
ne scias	8

La plej grava LOTE studenda:

Japana	65
Esperanto	22
Indonezia	22

Deziras plu studi en la gimnazio:

lasaman LOTE-n	101
alian LOTE-n	121

Ĝenerale, la ESB-studentoj opiniis (daŭrigo sur paĝo 18)



TRI RECENZOJ



Bibliografio de Tradukoj el la Angla Lingvo, de William Auld kaj Edmund Grimley Evans. Privata eldono 1996 ĉe la adreso de William Auld: 20 Harviestoun Road, Dollar, Clackmannanshire, Skotlando FK14 7HG. 55 paĝoj A4-formataj. Broŝurita. Prezo: £4.00.

Esperantolingva literaturo jam ekzistas de preskaŭ 110 jaroj. Inter ili, grandega nombro da tradukaĵoj el la Angla lingvo. Libroformaj verkoj estas grandparte malfacile troveblaj sed plej efemerŝajnaj estas tradukoj aperintaj en la gazetaro, ĉar indeksoj de gazetoj malofte ekzistas. Gazetokolektoj ekzistas en multaj niaj bibliotekoj, kaj Auld / Grimley Evans disponas pri la relative granda biblioteko de la Brita Esperanto-Asocio. Do mi salutas ĉi tiun tre zorge preparitan bibliografion.

Ĉ. 2000 verkoj estas listigitaj, laŭ aŭtoro. La plej tradukata aŭtoro? William Shakespeare, pli ol 140 eroj. Estas interese ke multaj verk(et)oj estas plurfoje tradukitaj. Ekzemple, "La Korvo" (*The Raven*) de Edgar Allan Poe kvarfoje, kaj "La Soldato" (*The Soldier*) de Rupert Brooke sepfoje!

Laŭdon al la laboro de Auld kaj Grimley Evans.

Donald Broadribb □

Tria Kolekto da Krimnoveloj, de Ronald Cecil Gates. Matraville: Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1996. 84p., broŝurita.

\$8.00.

Sep mallongaj rakontoj de nia bone konata verkisto Ron Gates, kies krimnoveloj kaj -romanoj ĝuas grandan popularecon. La stilo de la rakontoj estas relative facila—iom tro anglalingveca por mia gusto—kaj ne prezentas problemojn al la leganto kiu nur volas ĝui interesan kaj distran rakonton leĝeran. Plejparte, sed ne ekskluzive, la rakontoj temas pri murdoj, kaj ĉefas en ili la bone konataj roluloj de la antaŭaj rakontokolektoj.

Bona antaŭlita legaĵo, senprentenda, modestaspekta, bone sed ne impone presita, rekomendata al personoj dezirantaj necerbostreĉan distraĵon.

Donald Broadribb □

STOKITA VINO

recenzas Trevor Steele

Poul Thorsen: *Stokita vino*. Edistudio, Pisa, 1995. 104 paĝoj kun kelkaj fotoj kaj desegnaĵoj.

Eble ni ĉiuj estas vojaĝemuloj. Certe Esperanto ricevas sian plenan valoron kiam ni troviĝas en lando kies lingvo estas mistero por ni. Jam de la komenco vojaĝraportoj okupas niĉon en nia literaturo. Privat kaj Tibor Sekelj estas inter la plej konataj tiaj aŭtoroj; ne postrestas ilin laŭ talento kaj kvanto Poul Thorsen.

La plej sincera laŭdo estas envio. Kiam mi legis ekzemplojn de la "geopoezio" de Thorsen, mi enviis:

mi volonte havus tian lertecon! Pli ol okdekjara, li vizitis ĉiujn kontinentojn, kaj post vizito li scias distilisiajn impresojn en poemon kiu trafesprimas la etoson/historion de la loko.

Tiu ĉi nova libro enhavas poemojn pri Paska Insulo (ankaŭ tie li estis!) sed estas serio da prozaĵoj (pli ol dudek, do mallongaj). La nomo indikas ke la "vino" originas el pluraj jardekoj. Trafe, la unua peco estas memorajo pri laboro ĉe la bieno de lia knabaĝo. Sekvas karcera raporto el la tempo de la germana okupacio de lia hejma Danlando. Vagabonde la junulo vizitis Hispanion: tian spartanan-dangeran viziton povus ĝui nur juna kaj fortika aventur-emulo. Nu, kiun landon vi volas vidi tra la akutaj okuloj de bone informita, sentema, lakona kaj fojesprita gvidanto: ĉu Bulgarion, Brazilon, Acoran Insularon, solecan Paskan Insulon, Birmon, Skopje dum la tertremo de 1963-07-27, Marokon, Hindion, Srilankon?

Krom la vojaĝraportoj estas iuj fikciaĵoj lerte prezentitaj kaj temantaj ĉefe pri problemoj de teknologio. La kompatinda rolanto Vitaliumo (inventinto de hemiaĵo kiu igas benzinon nenecesa) apenaŭ hazarde havas la nomon filtor; la aŭtoro nomo signifas 'filo de Thor'.

Mi rekomendas la libron al ĉiuj. Aparte ĝi taŭgas kiel legaĵo dum klubvesperoj: mallongaj, intereso-kaptaj kaj informoplenaj—fojesocikritikaj kaj kortuŝaj—vinjetoj de aŭtoro bone konata dum jardekoj.□



Igorj Svitnikov

RECENZONTO SERĈATA

Ni ricevis por recenzo 327-paĝan libron *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*, de Antonio Marco Botella. Tre altnivela kultura kaj sociologia studo pri la Araba civilizacio en Hispanio dum la 8a-16a jarcentoj. Multaj arkitekturaj fotoj, tradukitaj poemoj, kaj historia komentario. Kiu pretas recenzi ĉi tiun verkon por ni bonvolu sin anonci al la redaktoro.

NIA KONKURSO

En nia Majo-Junia numero, post artikolo de Ralph Harry pri pseŭdonimoj, aperis konkurseto por parigi 15 pseŭdonimojn de Esperantistaj verkistoj kun iliaj veraj nomoj. Tri personoj partoprenis la konkurson: Vera Payne, Edna Turvey kaj Ray Ross. Ili interakordis pri:

1. Eugène Adam.....K. Lanti
2. Kazimierz Bein...E. Kabe
3. Claude Piron.....J. Johano
..... Valano
4. Madeleine Stakian: (la tri konkursantoj sendis tri diversajn respondojn!).....Ĥ. Mad Mevo
5. Hans Fethke.....I. Jean Forge
6. D-ro Kornfeld.....B. Grenkamp
7. Hosegawa Teru...J. Verda Majo
8. Maurice Hyde.....D. Delsudo
9. G. Pyke.....Ĉ. Ezoko
10. George Gordon...Ĝ. Gego
11. Frank Banham G. Robo
12. Ralph Harry.....C. Diplodoko
13. Wre Chandler...H. Revanto
.....(du personoj)
14. Joab Eljot.....A. Sukro
15. Len Newell.....F. Eleno (du
.....personoj)

Nur Edna Turvey identigis ĉiujn 15 ĝuste kaj ricevas premion.

Estas interese rigardi la originojn de la pseŭdonimoj. Multaj el ili estas rekte ligitaj al la veraj nomoj iu-maniere. Jen kelkaj klarigoj de ili:

Lanti < l'anti = la kontraŭulo.

Kabe < la komencliteroj de la vera nomo: Kazimierz Bein. La pseŭdonimo poste fariĝis verbo en Esperanto, *kabei* = "fari kiel Kabe, kiu, estinte tre vigla Esperantisto, subite kaj tute forlasis la movadon" (PIV).

Mad (Mevo) < Madeleine

Jean Forge: "Jean" estas la Franca formo de "Hans" (= Johano).

Grenkamp estas traduko de Korn (= greno) feld (= kampo).

Ezoko estas traduko de la vorto "pike/Pyke".

Gego < la komencliteroj de George Gordon.

Robo < la komencliteroj de Frank Reginald Banham.

Eleno < lakomencliteroj de Len Newell.

Pri la signifo de la nomoj Stakian, Fethke, kaj Hosegawa Teru en siaj originaj lingvoj mi ne scias.

[*Donald Broadribb* estas, kompreneble, pseŭdonimo de Odlo Bokserp. *Donald* estas partanagramo de *Odlo*; *Broad* < la Ugarita vorto "boksu" = "larĝa", kaj *ribb* el la Helena vorto *ριβος = jeto. (Pro lia kariero kiel fama kriketisto en la 7a jarcento. Sed maliculoj diras ke *ribb* < ριττ = furzo.)—O.B.] □

DE L. FRANK BAUM

La Mirinda Sorĉisto de Oz

La Eksterordinara Lando Oz

Ozma de Oz

Doroteo kaj la Sorĉisto en Oz

Glinda de Oz

Tiktoko de Oz

tradukitaj de Donald Broadribb.

Prezo de ĉiu libro en la serio: \$30 broŝ., \$35 bind. La prezoj inkluzivas poŝtkostojn. (Ekster Aŭstralazio: US\$30 kaj US\$35.)

Aĉeteblaj nur ĉe:

Donald Broadribb

59b Lukin St

Beverley WA 6034, Aŭstralio.

KIU ESTAS KIU INTER AŬSTRALIAJ ESPERANTISTOJ #46 ELLEN MEADEM

De Ralph Harry, tr. Donald Broadribb



Ellen naskiĝis en julio 1935 en Ŝanhajo, Ĉinio. La familioj de ambaŭ ŝiaj gepatroj datas de antaŭ 700 jaroj inter la nobelaro Germanidaj, de Teŭtonaj kaj Livonaj

Kavaliroj sur la bordoj de la Balta Maro, nuntempe Latvio. En ŝiaj vejnoj fluas la sango de Germanaj, Ukrainaj, Polaj kaj Rumanaj prapatroj.

Ŝi naskiĝis en dulingva familio, kiu parolis kaj Germane kaj Ruse. Ŝia patro, origine maroficisto en la Rusa Cara Mararmeo, estis tiam elektringeniero en la Elektro-Kompanio de Ŝanhajo. Ellen lernadis unue en Germana lernejo kaj post la dua Mondmilito en Usona lernejo, lerninte la Anglan kiam ŝi estis dekunu-jaraĝa.

Ŝi venis al Sidnejo en 1949 post kelka tempo sur la insuloj filipinaj en tendaro, eskapinte de la komunista sukceso en Ĉinio. Ŝi finis sian studadon en Sidnejo kaj laboris en la Universitato de Sidnejo kaj aliaj edukejoj kiel sekretario.

Ellen interesiĝis pri Esperanto en 1992 kaj komencis lerni ĝin en la Lernejo por Aguloj de Wesley Centre en Sidnejo. Poste ŝi plulernis de Robbie Robertson en Chatswood.

Nun ŝi estas membro de la Aŭs-

tralia Esperanto-Asocio, la Esperanto-Federacio de NSK kaj la Esperanto-Klubo de Manly. Ŝi instruas malgrandan klason por komencantoj, por U3A en sia hejmo en Cammeray. Krom lingvoj interesas ŝin kroketo, kiun ŝi ludas konkurse, Scrabble, okultismo kaj kompara studo pri religioj. Ŝi estas vegetarana, amas bestojn, precipe katojn ĉiadimensiajn, legadon, kaj ĝardenprizorgadon. Ŝi havas unu filon kaj du nepojn. □

LA VORTO "FOJE"

Mi ofte rimarkas malklarecon rilate al "foje". Multaj personoj, precipe orienteŭropanoj, uzas ĝin kun la signifo "unufoje" ("once"): "mi foje renkontis lin" = "iam, unufoje, mi renkontis lin", sed okcidenteŭropanoj ofte uzas ĝin kun la signifo "plur/ multfoje" ("sometimes"): "mi foje renkontis lin" = "I met him sometimes". Laŭ PAG (§196) "Foje signifas: unufoje en nedifinita tempo: *foje estis reĝo*. Por signi: pli-ol-unufoje en nedifinita tempo, oni uzu: **kelkfoje, plurfoje**".

Ĉar miskompreno tre facile estiĝis mi rekomendas uzi "unufoje" aŭ "plurfoje" anstataŭ nur "foje". [NB por "Once upon a time", en rakontoj, "foje estas perfekta!—Vera P.] □

PROVU VIAN VORTOSCION

De Donald Broadribb

OFICIALAJ VORTOJ



La sekvantaj vortoj ĉiuj estas oficialaj. Provu elekti la signifon por ĉiu el ili. (Respondoj sur

paĝo 26).

1. **amplekso:**

- (a) *grandeco, vasteco*
- (b) *grava ostoj en la brakoj*
- (c) *necerteco, konfuziĝo, dubo*

2. **branko:**

- (a) *ĉevalo rajdata dum konkursa*
- (b) *organo per kiu fiŝo spiras*
- (c) *parto de floro*

3. **cirkelo:**

- (a) *ilo uzata por desegni cirkulojn*
- (b) *vojo laŭ kiu kurento cirkulas*
- (c) *supra parto de la haŭto*

4. **ĉifono:**

- (a) *delikata ŝtofo el silko*
- (b) *senvalora peco de ŝtofo, uzata por purigi, por plenigi truon, aŭ ŝmiri*
- (c) *ŝtofo, papero, difektita per tro multa faldado*

5. **drapo:**

- (a) *ŝtofo uzata por kovri fenestron*
- (b) *katuna ŝtofo el kiu oni faras*

is / faras bandaĝojn

- (c) *lana ŝtofo el kiu oni faras vestojn*

6. **etato:**

- (a) *registaro, regantaro*
- (b) *menuo, en franca restoracio*
- (c) *oficiala tabelo, listo*

7. **fandi:**

- (a) *manĝi plezurigan substancojn*
- (b) *peti lsendon de varoj*
- (c) *deĝeligi*

8. **galono:**

- (a) *mezuro, = du litroj*
- (b) *speco de ŝipo*
- (c) *rubando sur uniformo, indikanta rangon*

9. **ĝibo:**

- (a) *grasa parto de la dorso de kamelo*
- (b) *kurbigo de la brustosto de homo*
- (c) *arango de la veloj de ŝipo*

10. **haladzo:**

- (a) *venena gaso el brulado aŭ putrado*
- (b) *alpaĉa buŝodoro pro dentmalsano*
- (c) *frukta manĝaĵo orientazia*

11. **impliki:**

- (a) *malfaciligi per komplikaĵoj*
- (b) *Logike enteni*
- (c) *Kunfaldi*

KIEL ONI NOMAS TION?
(Respondoj sur p.26)

1.



2.



3.



4.



5.



6.



7.



8.



9.



10.



11.



12.



13.



INFORMO PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN ADELAJDO, 1996

Via LKK raportas



Unue kaj tre grave, la 31an de majo mi sendis oficialan inviton al nia Aŭstralia Regna Ĝenerala Guberniestro, William Deane, malfermi la Kongreson aŭ, se tio ne eblas, esti nia Alta Prokteanto. Mi ricevis respondon ke li akceptas esti Alta Protektanto. Pri malfermo de la Kongreso, la respondo estis ke ankoraŭ ne eblas scii ĉu li povos fari tion.

Bona novaĵo estas ke antaŭ ne-longe konfirmiĝis ke por prepari la 1997-an Universalan Kongreson en Adelajdo ni havos la profesionan helpon de SATOUR, malgranda Adelajda firmao estrata de du virinoj, Jill Lambert kaj Delna Dugdale. SATOUR specialistas pri kongresoj, kaj ni rajtas esperi ke ĝi multe helpos nin fari la necesajn aranĝojn pri mendo de hoteloj, loĝejoj, ekskursoj, la preparo de la nacia vespero, kc.

La LKK ankaŭ deziras informi ke laŭ la Kongresa Regularo de UEA, jam subskribita de ni, ni devos proponi al la Estraro de UEA en Prago en julio la nomojn proponatajn de ni por nia Tutlanda Kongresa LKK, kaj, almenaŭ pri kelkaj el la personoj, iliajn respondecojn.

La listo ankoraŭ ne estas fermita, sed la proponataj kernaj membroj estas Kep Enderby, **PREZIDANTO**; Max Wearing **VICPREZIDANTO** havanta pre-

cipan respondecon kunordigi la laboron de la LKK en Adelajdo; Brendan Linnane **DUA VICPREZIDANTO** kun respondecoj pri ĉiĉeronaj kaj aliaj similaj gravaj aferoj; Peter Bird **SEKRETARIO**; Rochelle Jacquier **KASISTINO**. Krom ili estos Jennifer Bishop, kiu respondecas pri Gazetaro kaj Edukaj servoj; Delna Dugdale, partnero en la firmao SATOUR, kiu pro sia posteno en SATOUR senpage prizorgos loĝejoj kaj ekskursojn sub la gvidado de la LKK; Bob kaj Audrey Felby, pri informoj pri la preparo de la Kongreso sendotaj al la Aŭstralia esperanta gazetaro; Gay Phillips, pri kantlibroj, kongresa klubo kaj aliaj similaĵoj; Jay Grant, pri komputilistoj; Dianne Lukes, pri fondusoj; Joseph Wearing, Bernd Wechner aŭ Nick Nicholas, pri junularaj aranĝoj; Barbara Bruer, pri la infana kongreseto; Donald Broadribb, pri lingva konsilado, eksterlanda informado, kaj la dumkongresa bulteno; Audrey Felby, pri bonvolu kontakti Brendan Linnane, kies adreso estas 28 Redfern St, Vale Park SA 5081, ☎ numero 08/2661 1384. Li kunordigos la varbadon kaj organizadon de tiuj kiuj pretas labori helpante dum la semajno de la Kongreso, kiu okazos inter la 19a kaj 26a de julio. Por fari la Kongreson granda sukceso ni bezonas tiom da helpantoj kiom eblas, por prizorgi budojn kaj giĉetojn, kaj agi kiel ĉiĉeronoj. Por kandidatiĝi al tia

EKPAROLI IN VICTORIA

by Jennifer Bishop

In 1993, after a lengthy national discussion of the teaching of languages, a national "white paper" was published. According to the white paper, the states may chose from a list of fourteen languages, both European and East Asian. The State of Victoria choose eight languages: four European—French, German, Greek, Italian—and four East Asian—Indonesian, Japanese, Mandarin and Vietnamese.

For the school year beginning in January, 1994, the government of Victoria ordered all state schools, both primary and secondary, to plan a program of language education, beginning in February, 1995. The big question was: where to find teachers and which language(s) to teach. There was considerable unrest in the school communities throughout the year, since around 150 languages, including native languages, are spoken in Australia. Also, the government did not at first restrict the school to a choice from the eight approved languages. Thus the school councils had to hold long discussions before making a decision. Even if one or two languages were chosen, there would still be the problem of enough competent teachers.

This was the climate which saw the birth of the EKPAROLI project, when my husband, Alan Bishop, professor of Education at Monash University, read the Esperanto document *Towards a New International Language Policy: the Educational Value of Esperanto* by Edward Symoens. The project began in October, 1994, when the schools had for the most part already set up their language program for February, 1995. By phoning 98 primary schools we were, however, able to find three schools, eight classes and eight teachers, who were ready to learn and at the same time teach the language with considerable help from the EKPAROLI team. Only two of the nine teacher had ever learned anything of a foreign language.

Throughout the school year, from February to December, 1995, nine teachers and about 240 children (aged 10 to 12) from grades 5 and 6 studied Esperanto in three primary schools. The materials, two sets of 20 children's work sheets, were written by two hired research workers, using the trial video lesson from *Mazi en Gondolando*. The BBC gave the project permission to use further original drawings from the English version.



Year 6 students, Clayton North Primary School

The research workers wrote English questionnaires for the children learning Esperanto, and for children learning another language, such as French, German, Indonesian or Japanese. The questionnaire concerns the children's own language, their parents' languages, and the languages taught to them in school (including Saturday schools for migrants); it is also concerned with the children's general attitude to learning a language and its lifetime value. There was also a questionnaire for the teachers concerning their students.

The data have now been put on computer. They will be examined closely, but there is already a clearly visible difference between the attitude of Esperanto students and that of students of other languages. At first glance it appears that the former enjoy language study far more than the latter. However it is also necessary to study the teachers' questionnaires and the examination results at the end of the first year before a final evaluation of the project can be undertaken.

We are happy that in 1996 two schools are continuing the teaching of Esperanto and another will begin its language instruction program, perhaps in grade 4, with Esperanto, but will complete it with French. The further existence of Esperanto teaching will depend greatly on government bodies which are looking for a simple systematized program of language teaching; they now wish every school to choose one or two languages from the state approved list of four European and four East Asian languages. We now hope that at least the plan sketched above will succeed during the school year of 1996, so that some of those children will be able to meet foreign children their own age in the children's group at the 82nd Universal Esperanto Congress in Adelaide in 1997.

Jennifer Bishop

Faculty of Education, Monash University

(Tr. from *UEA/Esperanto*, Rotterdam, May, 1996)

REPORT ON TEACHING OF ESPERANTO IN SCHOOLS IN PERTH .

by Trevor Steele

Mrs. Idyss Einihovici has collected (and largely contributed to) a fund to finance teaching of Esperanto. No state schools showed interest in introducing the subject, even when told it would cost them nothing. Fortunately some Montessori schools in Perth accepted the proposal, so I am busy teaching at three of them: "Riverlands" in Middle Swan, "Victoria Park" in Burswood, and "The Beehive" in Mosman Park.

The organization of Montessori schools is quite different from that of state schools, which also influences (in general favourably) the teaching of Esperanto. There are three divisions in each school, not the usual classes: preschool (three to five years of age); middle (six to nine), and upper primary (ten to twelve), but more capable children may move up before their contemporaries.

My main difficulty is to find the most appropriate level of knowledge to aim at and the best method of teaching a very wide range of ages, abilities and attitudes. In general I am fairly satisfied so far. At the one

school where, because of greater numbers, only volunteers attend my lessons, it is encouraging that so far only one child has dropped out but several who originally did not come to me have asked if they may join in. The feedback from parents has been most encouraging—and some teachers and several parents are learning “to keep up with Tommy/Emily/Sarah...”

The best results so far have been from the smallest children. They have only fifteen minutes of instruction a week, so it is most gratifying that they retain so much of what I teach them, largely in game form. Apart from their ability to count, to name colours and a few dozen animals and identify about a dozen activities (*mi trinkas, li dormas, vi sidas* etc.), they are able to carry out many more complicated instructions. The children in the middle school know many more words and some of them can write short sentences, but there is less uniformity (some cannot write in English).

The hardest task is at the upper primary level. There is occasionally a pseudosophisticated attitude: “Why do we have to learn Esperanto? Nobody uses it.” Where might they hear that? It is consoling to hear the “fun” parts of the lessons. It is my hope that at least one of the best pupils—of the five candidates—will be advanced enough to attend the *Infana Kongreseto* in Prague this year (imagine trying to prepare a child for such a congress with one lesson a week over five months, in any other language!).

Already some individuals and some groups are exchanging postcards, drawings or short letters with children in China, Russia, Belgium, Croatia and France, and I anticipate that other countries will soon reply to my requests for postcards. Of course teacher input will be necessary for quite a while yet.

Though I have tried using *Mazi en Gondolando*, my judgment is that the children are saturated with television and prefer direct teaching. Perhaps I gave up on *Mazi* too early; it might be very suitable for teachers who are themselves still learning the language, or for adult classes.

Because of the unusual structure of the learning groups, I cannot supply exact numbers of learners by age, but here are my estimates. Pre-school: 75; middle school: 72; upper primary 70.

posteno necesas havi sufiĉe bonan regon de la lingvo kaj volon helpi pri la ĝenerala laboro dum la semajno de la Kongreso.

Helpos ankaŭ ke laŭeble plej multaj venu al Adelajdo frue dum la antaŭa semajno por helpi tie pri la preparoj.

Mi petas ke ĉiuj volontuloj bonvolu kontakti Max or Brendan kiel eble plej frue, por ke ili povu progresigi sian laboron.

Alia punkto: memevidentas kaj gravas ke ĉiuj el niaj membroj estu informataj pri okazaĵoj rilate al la Kongreso dum la preparada periodo ĝis julio 1997. Tiurilate Max kaj Bob Felby planas aranĝi ke de tempo al tempo informeroj sendigos al la redaktoroj de nia Esperanto-gazetaro. Por helpi al Max Wearing kaj Bob Felby tion fari, bonvolu ĉiuj kiuj respondecas pri tiuj eldonaĵoj sciigi al Max kaj Bob la ĝustajn adresojn kaj datojn por ricevi tiajn skribaĵojn. Max Wearing: 30 Westbury St, Hackney SA 5069, ☎ 08/ 3626338. Bob Felby estas 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019, ☎ 08/2421460.

Step Enderby, Prezidanto de LKK

UK ADELAJDO 1997

Margaret Furness sciigas sian eksigon el la LKK por la UK 1997 en Adelajdo.

DEZIRAS KORESPONDI

VAKARELSKI Georgui, 24 Raiko-Daskalov Str., 4400 Pazardjik, Bul-

gario. 40-jara instruisto de la Angla kaj Germana lingvoj; interesigas pri vojaĝado, naturo, aliaj landoj.

HEBERLEIN Sabine, Kuckuck 3, D-31789 Hameln, Germanio. 34-jara komencanto, interesigas pri desegnado, arto, bestoj.

KALAI Mejdoub BA F., No. 33 Diarel-Hana, 27000 Mostaganem, Algerio.

FAVERIAL Brigitte, 22bis rue Charnay Frachet, 24000 Perigueux, Francio. S-ino, gvidanto de infan-grupo de Esperanto, kiuj korespondas kun eksterlandanoj.

VIA REDAKTORO

komencis studi Esperanton antaŭ precize kvindek jaroj. De tiu monato (julio 1946) li estas konstanta, aktiva membro de la Esperanta komunumo. Ĝenerala konstato pri tiu kvindekjara periodo: la Esperanto-movado nek kreskis nek malkreskis dum tiuj kvin jardekoj. Ĝi stagnas, dum la mondo kreskas. (Komparu kiom pligrandigis la monda homaro dum tiu tempo! Kaj samtempe ĉu la loĝantaro de Aŭstralio triobligis aŭ kvarobligis?)

Pli persone: nunmomente oni operacias por preni la kataraktan lenson el mia dekstra okulo, kaj enmeti novan, platan lenson. La lenso el la maldekstra okulo oni anstataŭigos post kelkaj monatoj. Do se la redakcio ne tutperfekte funkcios dum ĉi tiu julia monato, ne miru tro...



EK- kaj -AD-

Tiun ĉi artikolon grandparte verkis Prof. Ron Gates, kiu profunde pensis pri la supre menciitaj afiksoj. Li skribis al mi jene:

Interesos min kaj kredeble aliajn se vi pritraktos la prefikson "ek-" kaj la sufikson "-ad-", ĉiu el kiuj povas esti dubsenca.

Laŭ *PIV*, "ek-" povas signifi aŭ komenciĝantan agon aŭ momentan, nedaŭran agon, kaj en la unua senco ludas la saman rolon kiel la sufikso "-ig-". Butler, en sia vortaro kaj en *Step by Step in Esperanto*, iom larĝigas la duan senco per sia "sudden [emfazo aldonita] or momentary action"; kaj en la praktika uzado de la prefikso oni ofte perceptas la intencon sugesti almenaŭ nuancon de subiteco.

Do, ekzemple, "La knabo ek-parolis" povas signifi aŭ ke li komencis (eble longan) paroladon, aŭ ke li eligis nur unu-du silabojn, aŭ ke lia parolo estis senpripensa aŭ neatendita. Konsentite, la kunteksto ordinare klarigas kiun el tiuj signifoj la uzinto intencis. Tamen estas strange—ĉu ne?—trovi en tiel logika lingvo tian mankon de precizeco.

Ankaŭ la sufikso "-ad-" havas pli ol unu rolon. *PIV* donas por ĝi kvar: por fari el *substantiva* radiko

novan substantivon signifantan pli-malpli daŭran agon faritan per la ilo kiun la radiko montras (ekzemple, "telefonado"); por fari el *verba* radiko substantivon signifantan la agon en senco ĝenerala kaj abstrakta (ekzemple, "kantado"); por fari el *verba* radiko substantivon signifantan la agon en longdaŭra aŭ ripetita formo (ekzemple, "parolado"); kaj por fari el *verba aŭ substantiva* radiko verbon kiu prezentas la agon en ĝia malvolviĝo kaj insistas pri ĝia daŭro aŭ ripetigo (ekz., "vizitadi").

Butler ne limigas la aplikon de la unua el tiuj roloj al substantivaj radikoj signifantaj ilojn: "With a noun or an adjective root [emfazo aldonita] -ADO adds the idea of action...rapidado, hurrying; sangado, bleeding." Pri la dua kaj la tria roloj distingitaj de *PIV*, li diras, "With a verbal root -ADO denotes action in general, as distinct from an isolated act or an abstraction...Kanto, a song; kantado, singing ..." Pri la kvara rolo li diras, ke la formo "-ADI...denotes that the action is Continued, persistent..." or "Repeated..." or "Habitual, customary..."

Ke tiu ĉi lasta, verba uzo povas esprimi iom malsimilajn ideojn eble ne multe gravas. Gravas, tamen, ke la sufikso "ado", aldonite al verba radiko, povas signifi aŭ

agon simplan, aŭ agon longdaŭran aŭ ripetitan, depende de tio, ĉu la nuda finaĵo "-o" estas rezervita por esprimi ne la agon, sed rilatan objekton. Ekzemple, ĉar el la verbo "kanti" estas jam farita la vorto "kanto" por prezenti objekton, la substantivo "kantado" estas uzata por signifi la agon nur en ĝenerala formo. "Parolado", male, indikas ripetitan aŭ daŭran agon, ĉar la substantivo "parolo" jam signifas, interalie, la simplan agon.

Ĉu mi perceptas malfacilaĵojn, kie vere neniu ekzistas?"

Nu, mi devas konfesi ke mi mem neniam spertis nek sentis malfacilaĵojn pri la punktoj atentigitaj de Ron. Sed ili ja meritas diskuton.

Unualoke, estas granda diferenco inter "logiko" kaj "precizeco". Logiko rilatas al klara rezonado. Esperanto estas pli logika ol la tiel nomataj "naturaj" lingvoj, sed eĉ ĝi ne estas perfekte logika. (Kial, ekzemple, "fini" kaj "komenci" estas transitivaj, sed "ĉesi" kaj "daŭri" ne transitivaj?)

Dualoke, neniu lingvo estas "preciza", eĉ ne Esperanto. Precize pro tio la sciencistoj uzas specialajn vortojn por provi klare priskribi tion, pri kio ili parolas.

Se vi petas plurajn personojn desegni "domon", vi ricevos tiom da malsimilaj desegnaĵoj kiom estas personoj. Se vi diras ke iu homo estas "alta" kaj alia "malalta", je kiu punkto iu ne plu estas "alta" sed nun "malalta"? "Ne metu tro da sukero en mian kafon."—Kiom da sukero?! Vere, tio estas bela kio plaĉas! Rapida trarigardo de vortaro trovas multajn Esperantajn vortojn

kiuj havas pli ol unu signifon. Ekzemple:

afero—matter, affair; aferoj—business.

agrafo—clasp; catch; hook.

akcepti—accept; receive (guests).

porti—carry; wear.

premio—prize; premium.

ŝtupo—log; chopping block.

timpano—eardrum; (architecture) tympanium, spandrel.

instanco—(competent) authority; (law) court, instance.

bela—beautiful; belo—bel (unit of electrical communication or intensity of sound); Belo—another name of Marduk (Babylonian).

En *PIV* sur ĉiu paĝo oni apartigas per numeroj (1. 2. 3. ktp.) la *diversajn sencojn* de pluraj vortoj.

Eble la plej simpla maniero pliklarigi la uzadon de "ek-" kaj "ad—"—kiujn tamen Ron mem jam bonege diskutis — estas citi el la *ABC-Gramatiko de Esperanto*, de Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme (havebla ĉe la Libro-servo de AEA):

EK-: AFIKSOJ. 2. (a) komenciĝi: bruli, ekbruli (= burst into flames, catch light)

(b) subita momenta ago: krei, ekkrei (= exclaim, cry out)

LA KOMENCA ASPEKTO.

Li ekstaris kaj foriris (= he jumped to his feet, rose abruptly)

sidi, sidiĝi (= to sit down)

koleri, koleriĝi (= to get angry; ekkoleri—to lose one's temper)

Oni montras ĝin dumaniere:

per la prefikso ek-

per la sufikso -ig-; ne kun ĉiuj verboj: vidu vortaron! Vd. **MEDIALA VOĈO**, 2

La sufikso -ig-

Tiu sufikso, la malo de -ig-.... indikas ke la subjekto transiras nevole, nekonscie, en la staton esprimatan de la radik(al)o

1. Netransitiva verbo

sidi, sidigi, eksidi
stari, stariĝi, ekstari,
kuŝi, kuŝigi, ekkuŝi, ekz. la tritiko,
kaŭze de la fulmotondro.

Oni ne distingas facile la transiron al nova stato disde la komenciĝo de tiu nova stato; sekve oni povas uzi la prefikson ek- de la komenca aspekto kun la sama senco kiel la sufikso -ig-. Tamen la ek- ofte indikas pliajn nuancojn de rapideco kaj neantaŭvidebleco.

[*Nota mia*: La rimarkoj en parentezoj estas miaj. Jen pluraj pliaj ekzemploj:

Petro malrapide stariĝis (slowly got up).

Petro ekstaris (jumped to his feet)

Maria malgaje sidigis (sat down sadly)

Maria eksidis ([promptly] sat down, dropped into her chair)

Ŝi ekridis (burst out laughing)

La knabineto ekloris (burst into tears)

Evidente ek- kaj -ig- ne estas interŝangeblaj: ne nur "ridigis" kaj "plorigis" estas sensencaj, sed eĉ "ekstari" kaj "stariĝi" prezentas malsimilajn nuancojn.]

-AD-: **AFIKSOJ**. 2. (a) ago: telefono, telefonado

(b) ago daŭra, ripetata aŭ kutima:

pafi, pafado (= a shot), pafado (= shooting);

vizito (=a visit), vizitado (= visiting)

LA DAŬRA KAJ LA RIPETA ASPEKTOJ.

Daŭro kaj ripeto estas ofte asociataj, tiel ke la unua ĝenerale implicas la duan.

(b) Mi saltadis la tutan tagon (= mi estis saltanta, mi ripete saltis)

Karolino obeadas la ordonojn de sia patrino (= ĉiam obeas), sed hodiaŭ ŝi ne obeis.

La daŭro kaj la ripeto povas esti esprimataj per la sufikso -ad-. En la dua ekzemplo, rimarku la diferencon inter *obeadi*, kiu indikas la kutimon, kaj *obei* indikanta unu tempopunktan agon. □

(Daŭrigo de p.7)

ke estas pli malfacile lerni LOTE-n ol opiniis la NESB-studentoj.

La sekvantaj listoj indikas la ordon de prefero:

Kun plezuro lernas LOTE-n:

Germana
Esperanto
Indonezia

Trovas plej facila la lernadon de:

Esperanto (plej facila)
Germana
Indonezia
Japana (plej malfacila)

Unu el miaj plejamataj studtemoj:

Esperanto (plej amata)
Germana
Indonezia
Japana (malmulte amata) □

TRANSITIVECO KAJ NETRANSITIVECO DE VERBOJ

De Marcel Leereveld

1. Enkonduko



iam ni ekkonas aŭ lernas naturan lingvon, frapas nin la fakto ke troviĝas en ĝi gramatikaj reguloj kiuj laŭ nia sento estas nelogikaj aŭ nenecesaj, eĉ malhavindaj. Kelkfoje iuj reguloj aspektas necesaj, sed nenecese komplikaj kaj malfacile kompreneblaj.

Studante la historion de lingvoj, ni ofte ekkomprenas ke tiaj komplikaj aŭ malhavindaj reguloj estis logikaj kaj necesaj en praaj civilizacioj. En tiaj kazoj la lingvo ne sufiĉe ŝanĝiĝis kun la homa pensmaniero.

Unu tia postlasaĵo estas la regulo en kelkaj lingvoj ke ne nur nomoj de homoj kaj bestoj indikas inecon kaj malinecon (= virecon), sed ankaŭ ĉiuj aliaj substantivoj, por aĵoj kaj ecoj. En la epoko de animismo tiu divido aspektis logika kaj necesa.

Alia gramatika fenomeno en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto, nome la divido de la verboj en transitivaj kaj netransitivaj, montriĝas malfacile lernebla kaj ŝajnas eĉ nenecesa. Kial ni ekz. en Esperanto ne povus nomi ĉiujn verbojn transitivaj, dirante, kiel en iuj aliaj lingvoj, "Ni vojaĝas aŭtobuson" aŭ "Ni vojaĝas pramsuron [= sur pramo]"? Tio multe plifaciligus la lernadon kaj uzadon de Esperanto, kaj de aliaj

lingvoj. Aŭ, eĉ, dirante "Ŝi finis la laboron" kaj "La laboro finis", esperante ke miskomprenoj ne okazos.

En la pratempo tio estis logika kaj necesa, kaj ankoraŭ necesas en tiuj lingvoj pro ilia speciala strukturo gramatika, kiun lastan ne havas certaj aliaj lingvoj tial ne bezonantaj la dividon.

En la pratempo, pli ol nun, la homo ŝajnis distingi inter du malsamaj specoj de agoj: unufanke tiuj kiuj okazis en kaj pro la naturo, kaj pri kiuj li/ŝi estis senpova, nepovante ŝanĝi ilin aŭ almenaŭ ne iniciatante ilin, kaj aliflanke tiuj agoj kiujn ŝi/li mem faris por efiki sur la ĉirkaŭantan mondon. Ĉi lastaj agoj celis (kaj ankoraŭ celas) agigi, ŝanĝi, aŭ rekrei parteton de la ĉirkaŭanta mondo (inkl. la aliajn homojn), kiu parteto estis la celo de la ago, funkcie la rekta objekto. Tiuj agoj do bezonis ĉiam, en la menso kaj en la lingvo, rektan objekton kaj la verboj tiukaze estis transitivaj.

La alia klaso de agoj, tiuj kiujn la homo simple akceptis kiel naturajn fenomenojn, okazis nature kaj ne celis, ne laŭ homa percepto, iun parteton de la mondo; ili ne bezonis rektan objekton, kaj la homo simple vidis la agon okazanta en si mem. Por tiuj agoj la homo uzis netransitivajn verbojn.

Kvankam tiu divido ne plu, pro ŝanĝado de la lingvoj dum longa historio, estas senescepta, ni tamen

povas ankoraŭ konstati ke la plejmulto el la transitivaj verboj indikas agojn faratajn precipe de la homo (kaj de individuigitaj iuj en religio kaj en fabeloj), kaj ke la plejmulto el la netransitivaj indikas agojn nature okazantaj, eĉ en la homo mem (pensi, revii, dormi, stari, ktp), kaj ne celantajn ŝanĝi partetojn de la ĉirkaŭanta mondo. Dum ĉe la verboj indikantaj transitivan agon la homo ĝenerale efikas rekte kaj aktive sur ĉirkaŭaĵon, la rektan objekton, li/ŝi pasive akceptas la agon de la netransitivaj verboj, kiujn agojn ŝi/li ĝenerale ne kaŭzas. Ĉi lastaj konsistas el diversaj specoj indikantaj aŭ *esencon* (nigri, taŭgi, simili), aŭ *internan okazon* (igi, batali, droni), aŭ *lokigon* (resti, aparteni, stari), aŭ *ricevon de ekstera ago* (ebli, indi, ati, iti, oti).

2. Verboj netransitivaj

La sekva estas listo de la netransitivaj verboj en Esperanto. Neologismoj, ja ne oficialaj, ne estas inkluzivitaj. Notu, tamen, ke eĉ netransitivaj verboj povas havi rektan komplementon, sed nur vorto(j)n estanta(j)n aŭ reprezentanta(j)n la radikon de la verbo (ekz. "ŝanĝi belan ŝanĝon").

La verboj inter krampoj, (), estas en *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)* klasifikitaj kiel transitivaj, sed aliaj Esperantologoj konsideras ilin (aŭ la plimulton el ili) netransitivaj, ĉar ilia akuzativajo estas tia nur pro ŝanĝo el prepozitivo (ekz. "miri ion" povas origini en "miri pri io", kaj oni ne diras "io estas mirata"); sed vi decidu por vi mem la klarigon kaj

la aplikon. Io simila (sed ne sama!) okazas ĉe la verbigitaj prepozicioj (ekz. "antaŭi iun" el "[esti aŭ] antaŭi antaŭ iu").

Ĉiu vorto en Esperanto estas baze en unu el la vortkategorioj. La ĉi tie menciitaj verboj kun aldono (S) estas origine substantivoj. La proporcioj de la transitivaj kaj netransitivaj verboj faritaj el substantivoj estas proksimume samaj, do fari regulon pri tio ne plu eblas, eĉ se oni volus.

Alie staras la verboj faritaj el originaj adjektivoj. La nombro da netransitivaj verboj tiaj estas multe pli granda ol tiu da transitivaj verboj tiaj. Estus do utila la regulo ke ĉiuj verboj faritaj el adjektivoj estas aŭtomate netransitivaj. Krome tia regulo logike konvenas al la karaktero de la adjektivoj (tio ne okazas ĉe la substantivoj). Ĉar mi samopinias kun tiuj kiuj favoras tian senesceptan regulon, mi tute ne menciis netransitivajn verbojn faritajn el adjektivoj (kiuj estas tre granda plimulto), konsiderante ĉiujn tiajn verbojn aŭtomate netransitivaj.

La nur kelkaj, uzataj, kontraŭregule transitivaj verboj tiaj (ekz. "favori iun", kie eblas "favori al iu") estas ĝenerale konataj kaj (espereble) ŝanĝigos en la estonteco.

La verboj *kursive skribitaj* estas tiuj verboj kiuj en la Angla lingvo estas uzataj transitive kaj netransitive, do kun du tute malsimilaj signifoj. Ekz. "to drown" estas netransitive "droni" kaj transitive "dronigi" ("la kato dronas" kaj "ŝi dronigas la katon").

Listo de Verboj Netransitivaj

aborti	danci	fali	grumbli	kluki
abstini	dandi	fanfaroni	grundi (S)	knari
adulti	danĝeri (S)	farti	gusti (S)	koincidi
agi	daŭri	fasti	guti	koleri
agonii	debuti	faŭki (S)	ĝemi	kolizii
aĝi (S)	deci	(favori)	ĝermi (S)	komerci
akordi (S)	degeli	febri (S)	ĝoji	komploti (S)
aktori (S)	degeneri	feki	hajli (S)	konduti
almozi (S)	deĵori	ferii (S)	haldi	konflikto (S)
alterni	dekadenci	fermenti	harmonii (S)	kongresi (S)
aparteni	deliri	festeni	heziti	konkordi (S)
apelacii	devas	fiaski (S)	hipnoti (S)	konkuri
aperi	diboĉi	flagri	honti	konkurenci (S)
ardi	diferenci	flami (S)	igii	konkursi (S)
aromi (S)	(diskuti)	firti	imperi (S)	(konscii)
aspekti	disponi 1	flori	(indi)	(konsenti)
ati	disputi	floesi (S)	insidi	konsisti
atuti (S)	distanci (S)	flui	insisti	konspiri
aŭdaci	ĉormi	flugi	intermiti	kontrakti
aviadi (S)	drinki	(fustri)	intrigi	kontrasti (S)
	droni	fonti (S)	iri	kontribui
baloti	dubi	friponi (S)	jesi (interj.)	konveni
bankroti	ĉueli (S)	fronti *S)	juki	konversacii (S)
barakti		frosti (S)	jongli	korespondi
bstali	ebli	frukti (S)	kampi (S)	kotizi
bicikli (S)	efekti	fuĝi	(kanti)	kraki
blasfemi	efiki	fulgi (S)	kapitulaci	krepuski (S)
bleki	eki	fulmi (S)	kaprici (S)	kreski
blovi	eksplo-di	(fumi (S))	karamboli	krevi
boji	ekzisti	funebri (S)	kartavi	krii
boksi	emi	funkcii	kaŭri	krimi (S)
boli	endi	furori	klaĉi	krozi
brili	enketi (S)	galopi	klaki	kulmini (S)
brokanti	enui	gasti (S)	klopodi	kuri
brui	erari	genui (S)		kuŝi
bruli	erupcii (S)	gesti (S)		kutimi
	esti	gliti		kvereli
ĉirkuli	evolui	grimpi		
ĉesi	fajfi	grinci		
ĉirpi				

labori	(mal-)paci (S)	<i>promeni</i>	skermi	<i>tinti</i>
lamenti	pacienci (S)	prosperi	sklavi (S)	tondri
larmi (S)	paradi	protesti	(soifi)	torenti (S)
lekci (S)	paraziti (S)	pulsi (S)	soni	trafiki (S)
(loĝi)	paroli	pusi (S)	(songi (S))	transiti (S)
loti	pasi	putri	(sonori)	<i>tremi</i>
lukti	paŝi		sopiri	triumfi (S)
lumi (S)	paŝizi (S)	radii (S)	spekulacii	troni
	peki	radiki (S)	spiri	troti
majstri (S)	peni	rajdi	spirali (S)	trumpeti (S)
makleri	<i>pendi</i>	(rajti (S))	<i>stari</i>	tumulti (S)
manifestacii	(penetri)	rampi	stati (S)	tusi
(S)	pensi	reĝi (S)	strabi	
manki	(penti)	remi	strebi	urini
manovri	pepi	(respondi)	striki (S)	vadi
marĉandi	perci	resti	(suferi)	vagi
marŝi	perli (S)	revi	sukcesi	vaki
mediti	persisti	rezisti	susuri	valsi (S)
mensogi	petoli	rezoni	svarmi	vapori (S)
migri	<i>pezi</i>	rezulti	aveni	varii
militi	pilgrimi	ribeli	ŝajni	vei (interj.)
miri	plaĉi	ridi	ŝaŝmi (S)	vegeti
morti	plaŭdi	rifuĝi	ŝerci	veli (S)
muĝi	pledi	rilati	ŝimi	velki
murmuri	plendi	<i>ripozi</i>	ŝipi (S)	veni
	plori	riverenci (S)	ŝmaci	venti (S)
naĝi	pluvi (S)	ronki	ŝpruci	veti
(nei (interj.))	polemiki (S)	rusti (S)	ŝrumpi	<i>veturi</i>
nebuli (S)	posteni (S)		ŝvebi	vibri
negoci (S)	(povi)	salti	ŝveli	vivi
neĝi (S)	preĝi	sangi (S)	ŝviti	voĉi (S)
nesti (S)	(pretendi)	sekreti (S)		vojaĝi
nokti (s)	prezidi	serpenti (S)	tamburi (S)	(voli)
odori	procedi	servi	taŭgi	zigzagi (s)
okazi	proceduri (S)	sibli	teksti (S)	(zorgi)
ondi (S)	procesi (S)	<i>sidi</i>	temi (S)	zumi
opozicii (S)	profiti	ŝilenti	tempi	
origini (S)	progresi	ŝimpatii (S)	terni	
oscedi		singulti		

Plus

- preskaŭ ĉiuj verboj sensufikse formitaj el adjektivoj (kaj adverboj)
- ĉiuj verboj kun la sufiksoj -at-, -it-, -ot, iĝ, -ebl, -ind, kaj -end

<<<>>>

La ĉisubaj en Esperanto transitivaj verboj estas en la Angla lingvo uzataj transitive kaj netransitive, do kun du tute malsamaj signifoj (kio ne eblas en Esperanto):

bani	rompi
difini	ruli
fini	streĉi
interesi	sufoki
kaŝi	ŝanceli
kirli	ŝanĝi
klini	ŝlosi
komenci	tiri
konduki	tordi
(kosti)	tranĉi
ligi	turni
mezuri	veki
miksi	vendi
movi	vesti
pesi	volvi

Por la netransitiva signifo necesas aldoni la sufikson "at" aŭ "iĝ". Do "veki iun"; "vekati de la vekhorloĝo (aŭ de la patro)"; "vekiĝi pro la bruo (aŭ pro malbona sono)". □



ALDONO AL LA LIBROKATALOGO

328. *Tria Kolekto de Krimnoveloj*, de Ronald C. Gates 84p., broŝ. \$8
530. *Translation Course in Esperanto*, de Frank Banham, 106p., broŝurita. \$14
100. *Paŝoj al Pli Alta Ŝtupo*, red. Hao Duoren. 195p., broŝurita. Rakontoj el *El Popola Ĉinio*, por komencantoj. \$6.80
94. *Enciklopedieto de Ĉinio*, red. Li Quing, Zang Meizhi. 330p., broŝurita. Riĉe ilustrita. \$12
92. *Vinilkosmo: Kompil' vol. 1*. Kasedo de rokmuziko. \$25.50
110. *La Imperio Omaks*, de A. Thor-kent, Liven Dek. 96p., broŝurita. Sciencfikcio. \$8.90
35. *Sferoj 7*, red. M.G. Aduriz. 134p., broŝurita. Sciencfikcio. \$17.20
406. *Vojaĝo Inter la Tempoj*, de Kal-man Kalocsay. 195p., broŝurita. Prilingv a. \$28.50

Rehaveblaj ĉe la Libroservo estas: *Comprehensive Dictionary* de Benson, *Ĉina Antologio 1 & 2*, *Antikvaj filozofoj de Ĉinio*, *Brilas Saĝo*, *Kamelo Ŝanĝzi*, *Noveloj de Lusin*, *Feliĉa Birdo* kaj *Papilia Fonto*, ĉuj el Ĉinio.

Supersigno 4.0 nun haveblas. Ĉi tiu nova versio ebligas pli bone regi la pozicion, formon, kliniĝon kaj dimension de la supersignoj en viaj alfabetaroj. Ĝi estas nun kongrua kun Windows 3.11, 3.11 kaj Windows

95. Ĝi ankaŭ inkluzivas ilon por konverti la Internetecajn skribojn de Esperanto (cx, ch, c^, c-, -c, ^c = ĉ) al Latino-3 aŭ formato difinita de la uzanto, kaj inverse. Disko kun *Supersigno* estas havebla de la Libroservo de AEA je \$3 (inkl. poŝtkoston), aŭ per la Internet ĉe blinky@pnc.com.au.

Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, P.O. Box 230, Matraville NSW 2036. Ĉiuj prezaj en Aŭstraliaj dolaroj.

Ni atentigas ke Esperanto-alfabetaroj por Macintosh-komputiloj haveblas senpage ĉe la redakcio de *Esperanto sub la Suda Kruco*. Bonvolu sendi tri HD-diskojn tiucele, kun taŭga adresita koverto. □



LOKAJ INFORMOJ

JEANIE WILSON

Raportas Gwenda Sutton

Ŝi naskiĝis la 10an de marto 1895 kaj mortis pace la sesan de marto 1996.

Ŝi estis la plej aĝa Esperantisto en Nov-Zelando kaj la plej aĝa dum-

viva membro de UEA. La artikolo pri ŝi en *ESK* de 1995/4 estis tributo al virino kiu fondis Esperantan klubon en Wanganui, instruis Esperanton dum multaj jaroj en lernejoj. Ŝi ankaŭ dum multaj jaroj tre aktive laboris por paco kaj por plibonigi la vivkondiĉojn de aliaj.

EDMUND HEARNE

La poŝto informis nin pri la morto de Edmond Hearne, multe amata 90+-jara Esperantisto kaj kontribuinto al *Esperanto sub la Suda Kruco*.

KIO OKAZAS EN MELBURNO

La 9an de aprilo surprizis nin Ges-roj Sachs. Pro la festotagoj ne okazis Esperanto-kunveno de la Melburna grupo, do la renkontiĝo kun Ges-roj Sachs ne povis okazi en la klubo. Margaret Inglis, sekretario de la Melburna grupo kaj de la Esperanto-Federacio, invitis al sia hejmo marde (la 9an de aprilo) vespere gesamideanojn por konatiĝi kun Ges-roj Sachs. Margaret preparis vespermanĝon por ĉiuj ĉeestantoj. La

vespero estis des pli surpriza ĉar gasto ankaŭ estis S-ro Zeng Hojaŭ, prezidento de la Pekina Esperanto-Asocio. S-ro Zeng venis al Aŭstralio por viziti sian familion kaj restis



Zeng Hojaŭ



En Melburno: Alan Bishop, Bernie Heinze, Rüdiger Sachs, S-ino Sachs, Zeng Hojaŭ, Marcel Leereveld, Alida Leereveld, Jennifer Bishop, Peter Inglis, Margaret Inglis, Svetislav Kanaĉki.—3 apr. 1996

en Melburno tri monatojn. Post la vespermanĝo S-ro Sachs parolis iom pri si, pri la Akademio de la Sciencoj San Marino, kaj pri siaj spertoj en Afriko. S-ro Zeng parolis pri la Esperanto-movado en Pekino kaj en Ĉinio. Ni ĉiuj ĝuis la tutan vesperon. — *Svetislav Kanaĉki.*

KAJ EN PERTO

Antaŭ du monatoj ni ricevis leteron de Germana paro kiu volis viziti nin. Ili trovis niajn nomojn en *Pasporta Servo*. Rüdiger kaj Christine [Sachs] estis niaj unuaj vizitontoj—granda ekscito!

Rüdiger skribis ke en Echwege,

Germanio, "frostas, neĝas, malvarmas", do ili decidis viziti Nov-Zelandon kaj Aŭstralion kie estas pli varme. Ankaŭ la nevo de Christine estis edziĝonta en Geraldton, kaj ili volis ĉeesti la ceremonion kaj renkonti parencojn kiujn ili dumlonge ne vidis.

Rüdiger telefonis al ni el Geraldton—Margareto [Chandler] respondis kaj parolis kun li. Poste mi ankaŭ parolis kun li pri ilia vizito. Ili alvenis je sabato posttagmeze, kaj ni tuj sentis ke ni trovis novajn amikojn, samideanojn. Ili ja estis bonegaj gastoj.


Niaj gastoj estas emeritaj veterinaroj—sed ne urbaj kuracistoj de katoj kaj hundoj. Ili laboris dum 30 jaroj en diversaj landoj en Afriko. Ili plejparte laboris kun sovaĝaj bestoj, kaj interesiĝis pri bestaj malsanoj kiuj ankoraŭ infektas homojn.

Dimanĉe ni veturigis niajn gastojn al la Malferma Tago de la plantovartejo de Men of the Trees.

Lunde ni vizitis Pingvenan Insulon, je 700m for de la ĉeftero de Safety Bay, per pramo. Marde niaj gastoj forveturis por viziti la sudokcidentan parton de nia ŝtato, kaj ili revenis post naŭ tagoj. Intertempe ili vizitis Perton kaj nian Esperantodomon, kaj Len Eddington veturigis ilin al urbaj vidindaĵoj.

La vendredan kunmanĝon kun liganoj ĉiuj tre guis, kaj poste Christine forflugis kun sia bofratino al Sidnejo por viziti nevon, kiu kantas tie en *Jesus Christ Superstar*. Rüdiger devis reiri al Germanio la sekvan tagon.

John Mills
(El *La Nigra Cigno*, junio 1996)



3 ZZZ ESPERANTO

3ZZZ-Esperanto nun estas preparata kaj disaŭdigata de tri membroj. La plej nova estas Haeng-Cho. Haeng-Cho komencis studi esper-

anton antaŭ 3-4 jaroj, memstude; li estas lingve tre kapabla kaj forte volas diskonigi Esperanton. Laŭ mia peto kunlabori kun Jenny kaj mi en radio, li volonte akceptis kaj tuj komencis kurson en 3ZZZ kiu daŭras 60 horojn. Haeng Cho studas en la Universitato Monash. Li havas du malgrandajn infanojn. Mi dankas al Haeng-Cho pro lia helpo.

La 20-an de aprilo ni okazigis nian duan oficialan jarkunvenon de kiam 3-ZZZ oficiale akceptis nin kiel plenrajtajn membrojn. Mi devas esprimi mian dankon al ĉiuj kiuj pretas esti membroj de 3ZZZ eĉ kvankam ili ne povas aŭdi niajn disaŭdigojn. Kaj al ĉiuj kiuj sendas al ni artikolojn, novaĵojn kaj konsilojn. Ni precipe dankas al Anita Berg, en Svedio, kiu regule sendas al ni intervjuojn kun diversaj gravaj personoj. Ni ankaŭ estas en kontakto kun Radio Brazilo, Kubo, Pollando, Aŭstrio, Francio, kaj AERA kaj OSIEK de kiuj ni estas membro. Kun via helpo ni esperas ke ni daŭrigos kaj progresos. Membreĝu en 3ZZZ ĉar tiu estas la sola Esperanto-voĉo en la radiondoj de Aŭstralio.—*Svetislav Kanački*.

Respondoj por "Provu Vian Vortoscion":

Oficialaj vortoj:

1.a; 2.b; 3.a; 4.b; 5.c; 6.c; 7.c; 8.c; 9.a; 10.a; 11. a.

Kiel oni nomas tion?:

1. heliko; 2. flasko; 3. flagoleto; 4. kamiono; 5. rano; 6. palmo; 7. kultivejo; 8. kranio; 9. plongisto; 10. vitrodomo, forcejo. 11. pulmo; 12. vespo; 13. ankro.

SIMPOZIO POR ĈIUJ LINGVOJ POR LA 21a JARCENTO—KIEL KOMENCI

Ĉe la Universitato Monash, Clayton, Victoria. De la 3a ptm vendrede, la 11an de oktobro, ĝis la 4a ptm dimanĉe, la 13an de oktobro. Parolistoj el Victoria kaj aliaj ŝtatoj, inkl. de Trevor Steele, kaj Alan kaj Jenny Bishop; diskutoj; laborsesioj (inkl. de la Internet). Registriĝo: \$30 (koncesia kotizo: \$15). Por pli da detaloj pri la programo, loĝaranĝoj ke., kontaktu Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley VIC 3149. □

Paul Desailly skribas:

"Vi jam verŝajne scias pri mia deziro revojaĝi al Pollando laŭlonge de la Transsiberia Fervojo. Post Azia kongreso en Ŝanhajo mi planas viziti diversajn Esperanto-klubojn en Mez-Azio, survoje parolante pri koincidoj, simbiozo ktp., kiel ankaŭ pri Bahaismo kaj Esperanto. Mi, prefere ni, invitos Esperantistojn al Aŭstralio por ĝui nian UK-on 1997 en Adelajdo, pere de prelegoj, fotoj, broŝuroj, mapoj ktp. Por trafi la "klientojn" kaj pli sekure vojaĝi estos multe pli bone se mi ne sola vojaĝos." □

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio: AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membro: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 plus poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 plus poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.Gld., pagu al la konto

neal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1996 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita de Donald Broadribb per Power Macintosh 7200. la kompostoprogramo estas Nisus Writer. Alfabetoj uzitaj estas New Century Schoolbook 10 kaj Orion Esperanto 16 (disponigita de *Eventoj*)

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Business Network, 5/25a Oxford St, Bondi Junction NSW 2022.

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 23 [1996/5] — Septembro-Oktobro 1996

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ 096 46 1389. (Domaĝe, faksoj ne eblas nuntempe. Bonvolu uzi e-poŝton) —

e-poŝto: enkidu@perth.dialix.or.au

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Korespondaj kursoj: D. Lukes & H. Green, PO Box 1814, Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ IBM-Kongrua—nur 3.5-ola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

ADRESOJ

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

143 Lawson St, Redfern NSW 2016.

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006.
☎ 09-270 3669.

Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.
☎ kaj faksoj: 09-579 4767.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Pri abon- kaj membro-kotizoj, vidu paĝon 27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

ILEI-Kongreso (J. Bishop).....	9
Provu vian vortoscion.....	11
Deziras korespondi.....	13
Via redaktoro.....	11
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	13
"Ambaŭ" (Marcel Leereveld).....	17
Infankongreseto en Prago 1996.....	19
Trans kvar oceanoj (NikSt).....	20
Ray Ross (Nekrologo/T Elliott).....	20
Diversaj informoj.....	20
Reduobligado (Ralph Harry).....	22

Recenzoj:

Alico en Mirlando.....	3
Peter Jameson's Secret Language.....	6
Piedlibro pri Juralismo.....	8

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la novembra numero: 19 oktobro.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet. Adreso:

<http://www.dialix.com.au/~peter-b/kindex/html>



ALICO EN MIRLANDO

Recenzas Vera Payne



Alico en Mirlando de Lewis Carroll, tr. Donald Broadribb. Beverley WA: Bookleaf Publishing, 1996. 103p., bindita, ilustrita. \$25.00 inkl. poŝtsendon, de Donald Broadribb.

Charles Ludwidge Dodgson, fotografisto, Oksforda akademi-ano, matematikisto, inventisto, kaj kreinto de, inter aliaj neforgeseblaj uloj, Alico kiu sin trovis en Mirlando. Eble vi ne konas la nomon, sed sendube ja la plumnomon, Lewis Carroll. Altulo, religiema meditulo, soleca fraŭlo, li kondukis kviete, parolis balbute. Sed ankaŭ fekundis je magiaj estaĵoj kiaj la Snarko, Buĝumo, Babilfrenzo (Jabberwock), Rosmaro, Ĉarpentisto, Blanka Kuniklo, Marta Leporo kaj multa cetero kiu hodiaŭ konatas mondvaste. La kernan rakonton pri Alico en la kuniklotruo Lewis Carroll unue buŝe rakontis en la somero de 1862 al tri fratinetoj 8-13jaraĝaj. Unu el la trio, Alice Liddell, fariĝis Alico. Estis la tempo de la *Akvo-Beboj* (Charles Kingsley) kaj de *Martin Chuzzlewitt* (Charles Dickens). *Alico en Mirlando* kaj la kunula volumo *Tra la Spegulo* daŭre eldoniĝas, kaj jam tradukiĝis en pli ol 70 lingvojn. Ke D-ro Donald Broadribb tradukis ilin en Esperanton, pripensigas. Ĉu jen pli ol nura sensencaĵo? Dramoj, filmoj, teatraĵoj, baletoj jam abundas. Lewis Carroll-Societoj floras ne nur en Britio kaj Usono, sed eĉ en



Japanio! (Britio ankaŭ fieras pri Dido-Klubo kun pli ol cent anoj.)

Do, kial *Alico en Mirlando* tiel ĉarmas? Almenaŭ grandparte en Anglio pro tio ke la rolantoj kaj la lokoj transplantigis el la vera vivo. Kiel ankaŭ la okazajoj, kvankam iom kamufitaj. Distorditaj kaj troigitaj karakteroj kaj aferoj baziĝas sur la Reĝin-Viktoria socio, sur ĝiaj ŝiboletoj, klas-hierarkio, moroj, kutimŝablonoj, decoj, tabuoj, malfortajetoj kaj malsaĝecoj. La miskonceptoj pri la infano flanke de la plenkreskuloj kaj la observado je la adolta mondo flanke de la infanoj, kaj la manko de adolta sentemo kune kun insulta kaj eĉ misuza traktado je la infano, kuŝas je la kerno de ĉi tiuj du aventuroj. Jen ne sensencaĵoj sed parado de homaj mankoj.

Preskaŭ ĉiuj kiuj renkontas Alicon malbone traktas ŝin, kaj ankaŭ ŝi rapide lernas konduki simile. (Ŝiaj akraj respondoj kiel ekzemplo.) La vivoludo speguliĝas en la

kroketoludo:

...la ludo estis tiom konfuzita, ke ŝi neniam sciis ĉu aŭ ne estas ŝia vico". Kiom la plenkreskuloj ŝatas moraladi. "Tt, tt, infano!" diris la Dukino. "Ĉio havas moralajon se oni povas trovi ĝin." "Kiom ŝi amas trovi moralajon en ĉio!" Alico pensis."

Plenkreskuloj ofte penas imponi per malsimplaj, torditaj esprimoj al kiuj tamen mankas senco. Kiam Alico admonas la Dukinon, ke ŝi "ne povas kompreni la sencon dum vi parolas..." la fiera respondo estas, "Tio estas nenio, kompare kun kion mi povus diri se mi volus."

Kiel en ferakontoj kaj ankaŭ en la reala vivo, tute ne mankas violenteco. "Senkapigu lin!" apenaŭ decas en antaŭdorma rakonto. Tamen, Alico supervivas. Kiel la plimulto de infanoj ŝi posedas tion kio certigas venkon je malamika, neprognosebla medio. Ŝi estas moderna fraŭlineto (kvankam pli ol 130-jaraĝa). Ŝi fariĝas memfida. Ŝi demandas al si ne etan demandon: "Ĉu mi mem estis la sama persono kiam mi vekigis ĉimatene?...Kiu en la mondo mi estas? Ha, jen la granda enigmo..."

Se vi ne facile ridetas, ne legu *Alicon*. Se vi ne ĝojas pro vortludoj, rimoj, belsonaĵoj, ne malŝparu vian tempon per *Alico*. Carroll rompis la tradicion ke libroj por infanoj devas instrui kaj prediki. La libroj kiujn li mem devis legi celis instigi disciplinon kaj obeemon. Ne liaj verkoj. Kaj li ne insultis per bebo-lingvo kaj -konceptoj. Jen grandaj, multsilabaj vortoj, sofistaj pensoj,

sed en facile kompreneblaj aventurotoj.

Je la fino de sia vivo Carroll ankoraŭ kredis ke erarvaga penso, leĝera indulgo, senzorga plezureto povus tuj damni nepenteman animon. Tamen, li liberigis la librojn por infanoj el la tenego de la moralistoj. Kaj tio per la plej forta rimedo havebla, humuro. Li trovis kuraĝon kaj inspiron en la verkoj de homoj kiaj Wordsworth, Coleridge, Tennyson, Blake, Dante Gabriel Rossetti, Dickens, kiuj rifuzis akcepti kaj daŭrigi la Kalvinistan kredon pri la Origina Peko, la kredon ke la infano naskiĝas esence malbona kaj devas esti traktata strikte kaj severe. Kuraĝon kaj eĉ emocikuracon li bezonis, ĉar en sia propra juneco li observis kaj suferis la Viktorianajn malsimpatiojn. Li mem, kiel la Romantikaj poetoj, opiniis la infanon preskaŭ dieca. Li altetaksis kaj amis la naturan infanon, ankoraŭ nesocializitan, senkulpan. Li precipe amegis knabinojn, sed ĉiam tute ĉaste kondukis. Li neniam edziĝis. La pasion kaj malĝojon en sia brusto li ŝanĝis en spriton kaj ĝojigon.

Al la hodiaŭaj infanoj pro diversaj premoj de nia socio, mankas patro, patrino, etendita familio. Ili ankaŭ mankis al la Britaj infanoj de la Viktorianoj. Estis la epoko de vartistinoj; oni vidis panjon eble unu horon tage. Baldaŭ, ek al la edukpensiono kie oni timis la tiranecon de la geinstruistoj, kaj eĉ pli de siaj egaluloj. Eskapo ofte eblis sole per la fantazio. Fantazio

en kiu oni kapablas fari ĉion, en kiu oni estas bela, forta, venkanta, ĉiopova.

Kion diri pri la tradukarto kaj fantazikapablo de Donald Broadribb? Nur ke ĉiam estas plezure legi kaj originalaĵon kaj tradukon faritan de li. Don ne malpli brilas ol Lewis C., ekzemple (nur unu) parolante pri unu proverbo: "Prizorgu la penson, kaj l' abundo prizorgos sin mem". Kvankam esprimoj kiaj "Mine is a long and sad tale" ne povas konservi la du signifojn de la sama sono (tale/tail), li tamen bone eskapas el tiu ŝajna senelirejo (p. 18-19). Vi trovos belan voston al kiu ne mankas la originala signifo, sed en kiu plenas kreiva vortludado. Por reteni la esencon li iomete (tute plaĉe) kulpas pro "tradukista licenco", ekzemple sur p. 82 kie "whiting" fariĝas "heliko" kiu "heligas" (anstataŭ blankigi) botojn kaj ŝuojn. Vivu la infana koro de nia estimata akademiano.

La eldonadoj de Bookleaf Publishing fariĝas pli kaj pli belaspektaj. Al la laŭdoj kiujn mi faris rilate al *La Mirinda Sorĉisto de Oz* aldonu ke ĉi tiu havas belan malmolan, marbluan kovrilon. Parenteze, oni ne povas ne rimarki la paralelon inter Alico, kiu sin trovis en Mirlando, kaj Doroteo, kiu vizitis la Mirindan Smeraldan Urbon de Oz. Ĉu Brita kaj Usona kuzinoj? Kaj ĝuste kiel aldone feliĉigas la ilustraĵoj de W. W. Denslow en la *Oz* de Frank Baum, tiel ankaŭ la pli malmodernaspektaj desegnaĵoj de John Tenniel en ĉi tiu *Mirlando de Alico*.

La lasta alineo de *Alico* donas al ni la pensojn de la fratino de Alico. Jes, sed ankaŭ la pensojn de Charles/Lewis mem. "Laste, ŝi bildigis al si ke tiu sama fratineto ŝia, poste, mem estos kreskinta virino; kaj ke ŝi gardos, dum ĉiuj siaj maturaj jaroj, la simplan kaj amantan koron de sia infanaĝo; kaj ke ŝi grupigos ĉirkaŭ sin aliajn malgrandajn infanojn, kaj briligos kaj fervorigos *iliajn* okulojn per multaj strangaj rakontoj, eble eĉ per tiu sonĝo pri Mirlando de longe antaŭa tempo; kaj ke ŝi kunsentos kun ĉiuj iliaj simplaj malfeliĉoj, kaj plezurigos pro ĉiuj iliaj simplaj ĝojoj, kaj memoros sian propran infanaĝon, kaj la feliĉajn somertagojn."

[Noto: Ĉi tiu libro estas nur aĉetebla rekte de Donald Broadribb; la prezo estas \$28, kio inkluzivas la poŝtendon.] □



Igorj Sitnikov

PETER JAMESON'S SECRET LANGUAGE

Recenzas Donald Broadribb

Peter Jameson's Secret Language, de Sylvan Zaft. Farmington (Michigan): Bela Lingvo Press, 1996. 152p., broŝ. US\$9.95 + sendkostoj = US\$13.90 ensume. (Adreso por mendoj: Sylvan Zaft, PO Box 371, Farmington MI 48332, Usono.)

Ĉu vi konas 10-11jaraĝan infanon? Aŭ ĉu vi mem iam estis 10-11jaraĝa? Se jes, jen la aggrupo por kiu ĉi tiu verko estas intencita. Mi mem estis 12-13jara kiam mi komencis lerni Esperanton, do legante ĉi tiun libron mi retransportiĝis en tre ekscitan parton de mia vivo, kaj la sperton mi multe ĝuis.

Peter Jameson estas junuleto en la kvina jaro de la elementa lernejo. Lia instruistino mencias gestolingvojn uzatajn de Indianoj, kaj tiu ideo entuziasmigas lin. Li trovas ke ankaŭ surduloj uzas gestolingvo(j)n. Post kelka tempo li renkontas emeritan profesoron kiu konas virinon kiu entuziasmeĝas pri "mondlingvo", Esperanto. Peter kaj liaj geamikoj ekstudas ĝin por povi uzi ĝin kiel sekretan lingvon inter si.

Sed problemoj ekestas. Aliaj infanoj en la lernejo ĵaluzas pro tiu uzado de sekreta lingvo; krome, la lernejestro kaj pluraj instruistoj forte kontraŭas tiun uzadon de "nevera" lingvo. Baldaŭ ĉefas ne la kvalitoj de la lingvo sed la batalo inter la aŭtoritato de la lernejestro kaj instruistoj kaj la insisto de la malgranda grupo de infanoj je siaj

homaj rajtoj. Nu, tia batalo ne facile solviĝas. Necesas alvoki la intervenon de la estro de la loka lernejsistemo.

Sylvan Zaft ĉarme verkas, ankaŭ tre realisme. Mi povas kredi ke la dekjara mi multe amus ĉi tiun libron. Ankaŭ la sesdektrijara mi ĝuis ĝin.

Kvankam por-Esperanta propagando (reklamado?) estas tre elstara en ĉi tiu verko, ĝia literatura kvalito estas nekutime alta. Oni sentas ke la aŭtoro verkas laŭ propraj spertoj kaj memoroj pri la infaneco. Krome, la informoj pri Esperanto estas realismaj—

"Wow!" Peter exclaimed. "We have our secret language!"

"Oh no, no, no, certainly not!" Ethel Wingate threw up her hands in protest. "Esperanto is not a secret language. Esperanto is a language for la tuta mondo, for everybody in the world!"

Peter looked up at her, right in the eye, and he spoke very slowly. "Mrs. Wingate, how many people speak Esperanto in Michigan?... Come on, Mrs. Wingate, be honest."

She blinked rapidly and her eyes looked up to the left and then made little movements back and forth. In a small voice and with a weak smile, she finally said "Maybe a hundred."

Peter did not quibble with her figure. "A hundred out of nine million people. Maybe. And it's a language for the whole world? ...

You know, Mrs. Wingate, I think that Esperanto is going to be a secret enough language for us.

Interese, tiu sama proporcio validas ankaŭ por Aŭstralio. El niaj 18 milionoj da loĝantoj, AEA havas ducent membrojn.

Nur unu gravan eraron mi trovis en ĉi tiu verko, kaj ĝi ne rilatas al Esperanto. Kiu muzikamanto povas trankvile legi ke:

His father got up and went to where their laser disks were stored. He held one up. "How about this? The Ode to Freedom. A Jew conducting in Berlin."

Soon they were watching Leonard Bernstein's balletic movements as he conducted players and singers from many lands in the last movement of Beethoven's Ninth. Ten minutes or so into the movement the soloists and the chorus were singing in animated German about Freiheit.

Ĉu miaj oreloj tro trompas min, kiam mi aŭskultas tiun simfonion? Ĉar ili sciigas al mi ke temas pri la Odo al...Gojo (Freude), ne Libereco. Kara Sylvan Zaft, nepre re-aŭskultu viajn diskojn!

Nu, malgraŭ tiu ofendo al la sankta memoro de Beethoven kaj Bernstein, mi plu laŭdas ĉi tiun libron. □

AMANTOJ DE ROKMUZIKO

Kasedo (kaj kompakt-disko) 2 de *Vinilkosmo-Kompil'* nun aperis. La prezo de la kasedo estas \$25.50 de la AEA-Libroservo. Ĝin akompanas bela libreto kun la kantotekstoj. Detaloj pri la muzikgrupoj aperos en numero 8 de *Rok-gazet'* antaŭ la jarfino.

ESK havas ekzempleron de la nova kasedo kiel ankaŭ de la unua kasedo, kaj volonte disponigos ilin senpage al aŭskultemulo kiu akceptos recenzi ilin por ni.

RECENZANTO-SERĈATA

Ni ricevis por recenzo la sekvantajn du librojn:

Princidino Mary novelo de Miĥail Lermontov. (71p.)

Kvarteto, originalaj poemoj en Esperanto de kvar Rusaj poetoj. (78p.)

Se vi akceptas recenzi unu aŭ ambaŭ librojn, bonvolu kontakti la redaktoron de ESK.

Ne Forgesu


UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
EN ADELAJDO 19-26 JULIO 1997

PIEDLIBRO PRI JURALISMO

Recenzas Odlo Bokserp



Piedlibro pri Juralismo, de Odlo Bokserp. Karnako: Tutmonda Esperantista Juralisma Organizo (TEMO), 1996. Duona paĝo, bind. Neaĉetebla ĉe nia Libroservo.

Mi unue aperigis ĉi tiun libron en hieroglifoj, sub la titolo  en la jaro 1996 a.K., sur peco de papiruso, en Karnako. Por komencantaj Esperantistoj, la teksto estas prezentita tute en bildoj, laŭ la metodo de *Asterisko inter la Goloj*.



Michael
Jackson

En ĉi tiu libro mi instruas inversigi la ordon de literoj, detranĉi la lastajn liniojn de teksto en alineo, mislokigi ŝupersignojn, trograndigi la spaconinter vortoj, kaj aliajn necesajn partojn de la kompoŝtarto. En speciala apendico mi pritraktas la detalojn de la antikva arto, nun bedaŭrinde preskaŭ perdita, re

Instigis la eldonon de ĉi tiu libro

urĝa bezono—konigita al mi de la estro de mia banko, kiu atentigis min pri la enhavo de mia konto.



Ankaŭ Michael
Jackson

Ĉi tiu libro estas ankaŭ tre bona piedlibro por akompani la *Koreslokigi liniojn de teksto en alian senrilatan alineon. pondan Ekskurson pri Juralismo* eldonitan pasintjare de la sama eldonejo. En tiu koresponda ekskurso oni

—vizitas la kompostoficejojn de Gutenberg—vidu kiel li iomete aliigas la enhavon de ĉiu ekzemplero presata, arto retrovita nur lastatempe de la Okcidentaŭstralia eldonejo **BOOKLEAF PUBLISHERS**,

—de Faraono Amenofis XIIIIII, vidu lin desegni la enhavon ne nur de la *Egipta Libro de la Mortintoj* sed ankaŭ de la *Tibeta Libro de la Mortintoj* (laŭ komisio de la Dalai-Lamao)

—de (daŭrigo sur p.27)

ILEI-KONFERENCO 1996 EN TABOR ĈEĤA RESPUBLIKO

Raportas Jennifer Bishop



utime post UK oni serĉas malsreĉigon. Per postkongresa ekskurso vizitindis banurboj de okcidenta Ĉeĥio, mondaj trezoroj de Unesko, aŭ magia triangulo: Prago-Dresdeno-Krakovo; sed estis laborema la grupo de instruistoj kiuj partoprenis la ILEI-Konferencon en Tabor. Tabor estas belega vidinda mezepoka urbeto kiun ni sukcesis viziti kaj altetaksi dum mallongaj promenadoj inter la sesioj de la estrarkunsidoj, interesaj prezentaĵoj kaj ekzamenpreparadoj.

Okulfrapis ke aliĝis pli ol 70 personoj el pli ol 30 landoj, inkluzive de Argentino, Aŭstralio, Finnlando, Kameruno, Kazahio, Kanado, Makedonio, Ganao, Japanio, Kubo, Madagaskaro, Meksiko, Taĝikio, Togolando, kaj Usono. Tamen eble ne tiom miriga estas la diverseco se oni mencias ke ĉeestis ankaŭ kelkaj plej konataj kaj spertaj instruistoj de Esperanto en la mondo: Katalin Smideliusz (Hungario), Atilio Orellana Rojas (Argentino), Stefan McGill (Hungario), Zsuzsa Barcsay (Hungario).

Unu allogo de ILEI-Konferenco estas la oportuno ekzameniĝi lingve kaj instrue. Mila van de Horst-Kolinska, prizorganto de Internacia Esperanto-Instituto en Nederlando, la hejmo de la Cseh-

metodo de instruado, aranĝis C-nivelan Cseh-seminaron, t.e. kurso por instruistoj kiuj jam partoprenis en seminarioj A kaj B, kaj kiuj intencas diplomigi kiel instruistoj laŭ la Cseh-metodo. Efektive, nur tiuj kiuj sukcesis en la ekzameno rajtas instrui laŭ la metodo de Andreo Cseh.

Aliaj allogoj estas la oportuno subiri internaciajn ekzamenojn de Esperanto, kaj partopreni *Mazi-studgrupon*. Multaj Esperantistoj subtenas la projekton *Mazi en Gondolando* kaj aĉetis kompletojn de tiu elstara profesia Esperantokurso por infanoj. Tamen, malmultaj el ni scias uzi ĝin efike por instruado al infanoj, ne nur por distri ilin per tiu ĉi tre alloga rakonto.

Dum la semajno okazis kelkaj sesioj de la *Mazi-studgrupo* por diskuti kaj esplori tiun problemon, kaj juna instruistino el elementa lernejo en Slovakio, Katarino Bodnarova, tre bone prezentis kelkajn lecionojn kaj montris siajn lernilojn kiuj instigas la infanojn aktori kaj imiti la rolulojn en *Mazi en Gondolando*. Jus aperis nova, tre bunta libro por infanoj, en kiu ili povas skribi, desegni kaj eltondi vortojn kaj fingropupojn; tamen bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas instrulibro por gepatroj aŭ instruistoj.

Dum nefermitaj Komitataj Kunsidoj, landsekcioj de ILEI, kiu konsistas el 800 membroj, raportis pri

sia agado. Nuntempe ŝajnas ke Esperanto estas malmulte instruata dum la ĉiutaga lerneja programo, sed pli multe kiel kromleciono. Laŭ la raportoj, nur en Aŭstralio, Hungario, Kroatio, Kubo, Rusio, kaj Usono, la geknaboj lernas kiel parto de la deviga lerneja programo.

En Svedio ili lernas en la lernejo, sed libervole. En Brazilo oni oficialigis la laŭvolan instruadon de Esperanto en ŝtataj elementaj lernejoj, tamen mankas instruistoj.

Krom ĝenerala manko de profesiaj instruistoj, ankaŭ mankas instrulibroj diversnivelaj kaj ekzamenoj. Atilio Orellano Rojas substrekis la bezonon trovi iun por verki tekstojn.

La projekto *Fundapax I*, subvenciita de UNESKO, jam ĉesis kaj oni nun atendas la raporton. Ŝajnas ke la plej gravaj aktualaj instruoprojektoj en la mondo nun estas EKPAROLI, ĉe Universitato Monash, Aŭstralio, kaj projekto de Maŭro la Torre ĉe Tria Universitato, Romo, Italio—ĉi tiu temas pri instruado al instruistoj kiuj celas instrui Esperanton ekde septembro 1997 en mezgradaj lernejoj (infanoj 11–14jaraj). Por ni en

Aŭstralio la plej grava novaĵo estas ke la Komitato decidis starigi la 32an ILEI-Konferencon, 1997, la 27an de julio ĝis la 2a de aŭgusto, apud Melburno. La ĉefaj kialoj temas pri partopreno de instruistoj kaj lernejoj de EKPAROLI, kaj espereble ankaŭ aliaj instruistoj de lingvoj. La temo estos *Multkultureco kaj Lingvolernado*. Tial

mi urĝas ĉiujn instruistojn de Esperanto en Aŭstralio: 1. Membrigu en ILEI, por ke ni fondu landsekcion de ILEI; 2. Partoprenu la 32an ILEI-Konferencon, 1997.

Aparta evento estis la prezento de *Mazi*-kantoj verkitaj de Alan Bishop de Aŭstralio, kantitaj de la gimnazianoj kaj direktitaj de Perla Mielo de Hungario. Por aldoni eĉ pli da gusto al tiu ĉi bonega instruilo, Tommy Publishers, kiuj eldonas *Mazi en Gondolando*, serĉas laboreman, interesatan verkiston!

Inter la longaj laborsesioj, ne pensu ke la partoprenantoj ne havis tempon por regali unu la alian. Julian Hernández, el Kubo, per sia konstanta akompananta gitaro ludis kaj kantis siajn kantojn; Natalia Kasymova, blindulino el Taĝikio, legis brajle kaj belege kantis malgajajn kantojn de sia lando; kaj Stefan McGill, kun helpo de Perla Mielo, per spritaj skeĉoj distris nin dum tuta vespero. Laŭ tradicio, la gimnazianoj prezentis la rezultojn de siaj studoj, unue la historion de la mondfama ĉeĥa edukisto Komenio, kaj poste kelkaj el ili tre bone ludis siajn muzikinstrumentojn por fini tre ĝueblan semajnon. □

**AEA SOMERLERNEJO
EN ADELAJDO
13-25 JANUARO 1997**

////////////////////

PROVU VIAN VORTOSCION

De Donald Broadribb

OFICIALAJ VORTOJ

La sekvantaj vortoj ĉiuj estas oficialaj. Provu elekti la signifon por ĉiu el ili. (Respondoj sur paĝo 27.)

1. anticipi

- (a) skribi petleteron
- (b) malebligi gravediĝon
- (c) fari ion antaŭtempe

2. basto

- (a) fibro el kiu oni faras ŝnur-ojn
- (b) sufiĉe! (interjekcio)
- (c) grandeco, amplekso de io

3. citro

- (a) muzika instrumento:
- (b) frukto
- (c) trinkaĵo

4. ĉarumo

- (a) unurada puŝebla ujo uzata en ĝardenoj
- (b) frua nomo de aŭtomobilo
- (c) organizo kiu disdonas neces-ajojn al bezonuloj.

5. deserto

- (a) sabla tereno
- (b) senpermesa foriro el armeo
- (c) lasta parto de manĝo, konsistanta el dolĉaĵoj.

6. balanci

- (a) prilabori buĝeton por ke la elspezoj kaj enspezoj estu egalaj
- (b) ritme movi ion

(c) sendi monpostulon

7. ekvilibri

- (a) egalpezi
- (b) skueti la kapon jese aŭ nee
- (c) sonigi du instrumentojn tiel ke ili egale vibras

8. fakturo

- (a) multiplika numero (en algebro)
- (b) konstruaĵo en kiu oni konstruas maŝinojn
- (c) paperfolio sur kiu estas la kvanto kaj prezo de varoj.

9. grego

- (a) aro da bestoj
- (b) nia aktuala kalendara sistemo
- (c) terkultivisto

10. hirta

- (a) rekte staranta (hararo)
- (b) specio de birdoj
- (c) paŝtisto en antikva Grekio

11. impona

- (a) kapabla legi kaj skribi
- (b) multekosta
- (c) kaŭzanta senton de respekto, admiro

12. juki

- (a) meti ligilon ĉirkaŭ la kolon de tirbesto
- (b) premi likvaĵon el frukto
- (c) kaŭzi malagraban piketan senton en la haŭto

KIEL ONI NOMAS TION?
(Respondoj sur paĝo 26)

1



2



3



4



5



6



7



8



9.



10.



11.



Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. Se vi deziras aperigi korespondeton en ĉi tiu rubriko, bonvolu kontakti Betty Aulsebrook.

Pablo Vicente VALEW, 4 de la Ermita No 2, BJ Barrio Santa Cruz, 40300 Sepulveda (S.G.), Hispanio. Komencanto. Kolektas receptojn de ŝafidajo, ĉar li loĝas en ŝafidregiono. Ankaŭ kolektas poŝtmarkojn. Interesiĝas pri politiko kaj kutimoj.

Ni ricevis la ĉisekvan peton per la Internet:

Mi kore salutas vin kaj mi tre ŝatas trovi en la reto esperantajn geamikojn el la alia poluso de mia latitudo (28° 28' 28" N—16° 16' 16" W)

Mia hejmlando estas Kanariaj Insuloj (Insulo Tenerife), Hispanio.

Mi volonte korespondos kun geamikoj vialandaj.

por poŝta korespondo mia adreso estas:

Poŝtkesto 425

38080 Santa Cruz de Tenerife

Hispanio

Koran saluton

Antonio Suárez

Mi interesiĝas pri internacia korespondado.

Richard Swerdlin

Route 5, Box 160

Denton, Texas 76208

Usono

Internet-adreso:

(swerdlin@coefs.coe.unt.edu)

VIA REDAKTORO

Bedaŭrinde, la operacio je mia dekstra okulo en julio malsukcesis, kaj devos refariĝi.

La operacio je la maldekstra okulo okazas nun, en septembro. La dua operacio je la dekstra okulo okazos en oktobro.

Katarakto estas maldiafaniĝo de la lenso en okulo, kaŭzanta blindecon. La operacio konsistas el elpreno de la lenso el la okulo, kaj anstataŭigo per plasta lenso. Kvankam la plasta lenso ne estas egale bona kiel natura lenso— ĝi ne povas akomodi sin laŭ la distanco de la vidataĵo— ĝi estas multe pli bona ol blindeco.

Okulo bezonas 4-8 semajnojn por resaniĝi post la operacio, kaj ĉar la miopeco de mia dekstra okulo estas vaste diferenca de tiu de mia dekstra okulo, reakordigo de la du okuloj estas malaŭtomata. Pro tio mia vidkapablo multe malgrandiĝas dum la operaciperiodo.

Pro tio, mi pardonpetas ke dum la aktuala periodo, ĝis eble la fino de novembro, mi malrapide respondos viajn leterojn kaj korespondajojn.



LINGVA ANGULO

De Alan Towsey



De Edna Turvey, nome de la "Marda Stud-Grupo", venis kvar demandoj:

OL

1. Ĉu vi klarigos, bonvolu, kiam oni uzas **ol** kun **antaŭ**, **anstataŭ** ktp.?

Respondo: Tion ĉi temon mi jam pritraktis en *ESK* Jan.-Feb. 96. Sufiĉas ĉi tie diri ke **anstataŭ ol** estas ĉiam eraro!

ĈIO TIO

2. Ĉu estas bone diri "ĉio tio", aŭ ĉu estas erare?

Respondo: Por "all that"—kial ne?! Tute ĝusta, miaopinie.

DEZIRI—VOLI

3. Ĉu "deziri" kaj "voli" havas samajn nuancojn kiel en la Angla lingvo?

Respondo: Proksimume, jes. Sed preskaŭ neniu vorto en ia ajn lingvo konformas precize kun vorto en alia lingvo. Notu la difinojn en *PIV*:

deziri:

1. *Konscie emi al io, aspiri posedon aŭ ĝuon de io.*

Ne deziru la edzinon de via proksimulo. (*Biblio*)

Kion vi povas pli deziri?

2. *Voli atingi, ricevi.*

Ili deziras aliajn reformojn.^z

Mi deziras iom pli da kafo.

La dezirata momento alproksimiĝas.

Estas dezirinde (desirable), ke

vi ĉeestu.

voli:

1. *Pli-malpli energie uzi la spiritajn fortojn, per kiuj efektiviĝas la agoj.*

Kiu volas, tiu povas.

Prenu kiel vi volas, la potoj ĉiam bolas.^z

Se Dio volas.^z (If God wills/ God willing)

2. *Koncentri sian atenton al la ideo de ia ago, por ke ĝi efektiviĝu.*

Kion oni volas, tion oni povas.^z

Li ne volas eĉ respondi al mi.

Mi volas diri al vi la veron.^z

Dio volu, ke ni nin en ĝojo revidu!^z

Mi volas, ke vi tien iru.^z (I want you to go there)

3. *Voli iri.*

Mi volas en militon.^z

Ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte.^z

(Tion ĉi uzon mi malofte vidis dum mia legado. Miaopinie, ĝi estas germanismo.)

4. *Voli akiri, ricevi.*

Volas kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas.^z

Mi ne volas baton. (= Mi ne volas esti batata)

Mi ne volas kompaton. (=Mi ne volas esti kompatata)

Notu: Mi deziras ripozi = I wish to rest. Mi volas ripozi = I want to rest.

Home thoughts from abroad

By Max Wearing

Australian delegates at the Universala Kongreso (World Esperanto Congress) in Prague barely had time to be dazzled by the splendours of the city's congress centre and the impressive attendance of 3000 delegates before they received the sad news of Ray Ross's death in Brisbane. Ray would certainly have been one of the most active workers for Australia's first Universala Kongreso if it had taken place according to plan in Brisbane in 1988. In Prague we could not help remembering his excellent contribution to the Pacific Region Esperanto Congress in September of that same year.

The Australian delegates were also disappointed that facilities for promoting the UK in Adelaide in 1997 did not match those afforded by 1995's UK in Tampere. Nevertheless, Prague's LKK (local congress committee) and additional 100 helpers were obviously not lacking in goodwill. They generously transported me from the Prague airport to the congress centre, along with 62 kilos of posters, brochures and other promotional materials, carried free of charge from Adelaide to Prague by QANTAS and BRITISH AIRWAYS. Our disappointment lay in the less favourable position of our booth and our difficulty in getting ready access to the display boards and electronic equipment ordered for us in advance through the head office of the Universala Esperanto Asocio in Rotterdam.

Despite the sad beginning, the Australian delegates got on with the business of promoting 1997's UK. Our AEA President, Justice Kep Enderby, delivered a most impressive lecture on "The Indigenous peoples of Australia" in the Congress University series to an audience so large that it packed the huge lecture hall, many of us having to sit on the floor. Our other influential speaker was Dr Ralph Harry, whose contributions at the Nitobe

Symposium of International Organizations on "Language for international peace and democracy" were very highly valued. The presence of an Australian boy in the Children's Congress (thanks largely to Mrs Einihovici) also drew favourable comment.

Meanwhile, the Australian booth in the foyer of the congress hall was constantly busy. Jennifer Bishop and Dorothy Enderby worked long hours and Diane Lukes worked almost non-stop every day selling posters and souvenirs, and showing the Esperanto language videos about Australia.

Though not present in Prague, Dr Margaret Furness continued to make generous contributions to promoting Adelaide's UK. She designed and obtained free of charge the congress posters which we distributed, and produced a delightful 44-minute video *Al Sud-Aŭstralio* about Australian nature resorts, which makes a pleasant, leisurely contrast with the commercial city-centred 10-minute *Adelaide Kongresurbo* produced last year with a grant from the South Australian tourism department. Jay Grant, though also not present in Prague, prepared and sent a series of computer pictures of Adelaide.

The directors of the central office of UEA in Rotterdam, which is in charge of the UK series, have agreed that the money taken in Australian currency through our Libroservo's Tom Elliott will be available to pay local expenses for the UK. Several English-speaking Esperantists from overseas countries offered to act as helpers for the Australian UK. Australian and New Zealand volunteers are reminded to contact Brendan Linnane, PO Box 68, Rundle Mall, SA 5000. To avoid the possibility of people volunteering but doing little or nothing to help, UEA has long been using a system whereby volunteers enrol just as everyone else does but have their fees refunded after the congress.

Good news for the Summer School

Before attending the UK in Prague, I received several expressions of interest from overseas Esperanto teachers for the 1997 Australian Esperanto Summer School in Adelaide (13-25 January). In Prague two of these confirmed their interest to the extent that I feel confident of their services being engaged by the Summer School committee.

One of these teachers is Nikolo Raŝiĉ, UEA-headquarter's officer in charge of UKs, and author of *La rondo familia, sociologiaj esploroj en Esperantio*, who has twice taught at the San Francisco University Esperanto summer school. It is likely that in Adelaide he will teach, at levels 3 and 4, a course on Esperanto culture, community and movements, and one on UK organization. The second, Stefan MacGill, was brought up speaking Esperanto as his first language in New Zealand. Now living in Hungary, he has long been regarded as one of the most exciting and respected Esperanto teachers in the world. He is a past president of ILEI (International Esperanto Teachers' Association), a prolific writer of Esperanto teaching materials, and is the present editor of *Juna Amiko*. He is likely to be teaching levels 2 and 4 at our Summer School. It has already been decided that Vera Payne will be teaching beginners, using *Mazi en Gondolando*, and that Jennifer Bishop will be teaching levels 2 and 3.

The Australian Esperanto Summer school planned for 13-25 January 1997 is likely to be the last of its kind held in Adelaide. As was announced at the 1996 school, its organizers hope that after 1997 they will be able to hand on the task to others. If all goes well, there may even be enough general community interest in learning Esperanto throughout Australia after the 1997 Universala Kongreso to warrant more than one annual

summer school—perhaps one of them specifically for school-age participants.

Whatever the future, the Summer School in January 1997 will focus on the preparation of Australian Esperantists for the UK in Adelaide, 19-26 July 1997. While every school has had the aim of building the speaking competence of Australian Esperantists (providing an opportunity for two weeks' total immersion in the language), there is little doubt that the 1997 school will extend the oral skills of its participants even more than usual, giving much attention to skills needed by translators, tour guides and general helpers at the UK.

Perhaps it is appropriate to remind readers here that AEA is required to have an annual general meeting to conduct elections, deliver reports and so on. It has been decided to deal with these formalities in Adelaide in July at a time yet to be announced, during the week just before the Universala Kongreso, when members of the LKK and other helpers will need to come together for final planning and briefing. The Summer School and this "mini-congress" will provide the only opportunities for group on-the-spot preparations for the World Congress. The main theme for both will obviously relate to preparing for the Adelaide UK. The UK in Prague had 100 official helpers. Let us hope we can make up in quality what we lack in quantity, and that a goodly number of Esperantists can attend the two weeks in January and the pre-UK week in July to make Australia's first UK memorable for all the right reasons.

PS The theme chosen for the UK in Adelaide is "Tolerance and justice in a multicultural world"; that for the ILEI Conference in the Geelong Grammar School the following week is "Language teaching in a multicultural world".

deziro: desire, wish.

(a) *Deziro de iu pri io.*

Via deziro estas plenumita.
(Your wish has been fulfilled)

bruta volupta deziro.^z

(b) *Io dezirata.*

La deziro de virtuloj estas nur bono. (*Biblio*)

Ĉion, kion mi skribis al vi, volu rigardi nur kiel mian opinion, sed ne kiel mian deziron.^z

voló:

(a) *will.*

libera volo (free will)

(b) *what one wants.*

kontraŭ sia volo.

Tia estas mia volo! (That's what I want!)

Volo kaj deziro leĝojn ne konas.^z

-ANTAS KTP.

4. Donald ion diris al mi pri la historio de la formoj **-antas**, **-intas** ktp. Kion vi opinias pri tiaj? Ankaŭ **-untus** aŭ **-antus** ktp.

Respondo: Zamenhof mem respondis jam en 1907 al simila demando jene:

"La formoj 'amatas', 'amitas' k.t.p. anstataŭ 'estas amata', 'estas amita', per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone uzi ilin. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia propra iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia

okazo, se 'as', 'is' k.t.p. signifus 'estas', 'estis'; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo 'esti', tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas."

Pri ĉi lasta punkto, Grabowski (kaj kelkaj aliaj) en sia poezio eksperimentis pri formoj, kia "La patro *as* fore", por "La patro *estas*fore", sed tia uzo neniam populariĝis. Mi vidas de tempo al tempo *'stas* por *estas*, kaj eĉ aŭdis ĝin ankaŭ kelkfoje en rapida konversacio: "Li *'stas* jam ĉi tie"; "Li ne *'stas* ĉi tie."—simile al la anglaj mallongigoj: "he's", "he isn't". Tio povas esti utila en la poezio.

Laŭ mia lingvo sento, *as* ne signifas *estas*; miaopinie, ĝi estas nur indikilo de *tempo*. Ĉu ekzemple *i egalas al esti*??!

Formoj, kiaj "Laŭdatu Jezu-Kristo!" (Grabowski), "Ili manĝ-antas", "Tiu promeso ankoraŭ ne plenumitas", kiel diris Zamenhof, ja neniel perfortas la spiriton de Esperanto, sed, kiel rimarkis la aŭtoroj de *Plena Analiza Grammatiko de Esperanto*, ili neniam prosperis en la komuna lingvo, pro la malfacilo de uzado kaj komprenado.

Ili tamen povas esti tre utilaj en la poezio, pro sia koncizeco, kaj ankaŭ en literatura prozo, por variigi la stilon. Komparu la jenajn frazojn, kaj decidu, kiujn vi preferas:

Se vi estus tie, tio ne okazus. (If you were there, that wouldn't

happen)

Se vi estus (estinta) tie, tio ne estus okazinta. =

Se vi estus tie, tio ne okazintus. (if you had been there, that wouldn't have happened)

Se mi havus sufiĉe da mono, mi povus aĉeti ĝin. (If I had enough money, I could buy it)

Se mi estus havinta / havus sufiĉe da mono, mi estus povinta aĉeti ĝin. =

Se mi havus sufiĉe da mono, mi povintus aĉeti ĝin. (If I had had enough money, I could have bought it)

Vi devus protekti ŝin. (You should protect her)

Vi estus devinta protekti ŝin.—Vi devintus protekti ŝin.

(You should have protected her) (Vi devus esti protektinta ŝin)

Laŭ kiom mi memoras, mi neniam aŭdis tiajn formojn en la konversacio, kaj mi ne rekomendastian uzadon al komencantoj! Eksperimentu pri tiaj formoj nur kiam vi bone scios la lingvon.

KELKAJ MODERNAJ TEKNIKAJ VORTOJ

La jenajn vortojn mi trovis dum mia legado aŭ en diversaj vortaroj. Elektu por vi mem tiujn, kiujn vi preferas!

magnetic tape: sonbendo, magneteta bendo

tape recorder: magnetofono, sonbendilo

videotape: videobendo (*PIV Suplemento*, Benson), vidbendo (Benson kaj aliloke) bildbendo, filmbendo (Middelkoop: *Nederlands Esperanto-Nederlands*)

Videotaperecorder: video-registrato (*PIV Suplemento*, Krause: *Wörterbuch Deutsch-Esperanto*) vidomagnetofono (Benson), magnetoskopo (*Grand Dictionnaire Français-Esperanto*, Middelkoop), bildbendaparato (Middelkoop), vidbendilo

remote control: telekomandilo (Benson), teleŝaltilo (por televido), telekondukilo (por aparato) (*Grand Dictionnaire*), teleregilo (Krause), telefunkciilo (Middelkoop)

video cassette: bildkaseto (Middelkoop); pli bona: vidbendkasedo

to (tape-) record: registri, surbendigi

to play back: aŭdigi (bendon) □

////////////////////

HEROLDO DE ESPERANTO

Se vi deziras ricevi senpage la duoblan numeron de *Heroldo de Esperanto* kun raporto pri la Universala Kongreso en Prago, skribu simplan poŝtkarton al la redakcio, ĉe Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale, Italio. □

////////////////////

AMBAŬ

De Marcel Leereveld

Ambaŭ estas nevaria pronomo ("Ambaŭ foriris") aŭ nevaria adjektivo ("Mi ametas ambaŭ infanojn"). Ĝi signifas kunaj du aferojn menciitajn aŭ menciitajn; do ĉiam havas pluralan sencon. Ĝia signifo similas al "la du", sed "ambaŭ" pli emfazas ke temas pri du, se iu dubas. Ĝin neniam antaŭas la artikolo. Ĝi ne povas uzati kiel konjunkcio kiel en la Angla (do: "both the father and the mother" = "Kaj/tiel la patro kaj/kiel la patrino").

"La ambaŭo" estas "la grupo formita el la du menciitaj". "Ambaŭi" ankoraŭ ne ekzistas. "Ambaŭa" signifas "de ambaŭ" (ekz. "La ambaŭa biciklo" = "La bicklo apartenanta al ambaŭ"). "Ambaŭe" = "en grupo de du", kaj similas al "duope", tamen emfazante ke temas pri specialaj du kiujn oni estas menciinta.

Kiel determinanto en adjektiv-ecaj aŭ adverbecaj kunmetaĵoj ("ambaŭmane") ĝi signifas "en/de/per/je la du (manoj)". "Ambaŭdekstra viro" estas viro kiu estas dekstrema je ambaŭ manoj. Tamen ekzistas kazoj de kunmetaĵoj neuzeblaj sen kroma indiko:

Imagu ekzemple ke ekzistas en bestprizorgejo kaĝoj por hundoj kaj katoj: kelkaj havas nur hundo(j)n, kelkaj nur kato(j)n, kaj kelkaj havas hundon kaj katon en unu kaĝo. La lastmenciitaj estas kaĝoj por ambaŭ bestoj, do "ambaŭbestaj kaĝoj" (unu hundo kaj unu kato).

Se estas pli da hundoj kaj katoj en granda kaĝo, la kaĝo estas por

ambaŭ bestspecoj, do "ambaŭbestspecaj kaĝoj". ("Ambaŭbestaj kaĝoj" povas signifi ankaŭ "por du hundoj" aŭ "por du katoj").

Se la kaĝoj estas nur por hundoj aŭ nur por katoj, ili estas "aŭ por hundoj aŭ por katoj", ili estas "aŭe ambaŭbestaj kaĝoj". Ili ne povas nomiĝi "ambaŭbestaj kaĝoj", ĉar "ambaŭ" ne signifas "aŭ por hundoj aŭ por katoj": ĝi signifas nur "por hundo(j) kaj kato(j) kune".

Same pri tulipoj, kreskigisto havas ruĝajn tulipojn kaj flavajn tulipojn kaj tulipojn kiuj havas ambaŭ kolorojn en ĉiu tulipo. Ĉu ĉi-lastaj estas "ambaŭkoloraj"? Jes, ĉar ili estas "de ruĝa kaj flava koloroj". (Se ĉiu tulipo estus de pluraj ruĝecaj kaj pluraj flavecaj koloroj, ili estus "ambaŭkolorspecaj".)

Sed se li havas nur du specojn de tulipoj, la ruĝajn kaj la flavajn, li ne havas "ambaŭkolorajn tulipojn", ĉar liaj tulipoj estas nur aŭ de ruĝa aŭ de flava koloro; do ili estas "aŭe ambaŭkoloraj"; sole "ambaŭ-a" ne povas signifi "de ruĝa aŭ de flava", nur "de ruĝa kaj flava koloroj kune".

Same "ambaŭflankaj arboj" signifus ke ĉiu arbo troviĝus parte sur unu flanko de la vojo kaj parte sur alia flanko. Se ni celas la arbojn

* [Kvankam gramatike logika, ĉi tiu frazo estas tre nekutima, do se oni uzas ĝin estas dezirinde kune meti klarigan noton.—⁽¹⁾]

de unu flanko kune kun la arboj de la alia flanko de la vojo, la arboj estas aŭ de unu aŭ de la alia vojflanko, do ****aŭe ambaŭflankaj arboj****.

Same se ĉiuj lernantoj havas du seksojn, ambaŭ seksojn, ili estas **"ambaŭseksaj"**. Sed se ĉiu el ili havas nur unu aŭ la alian sekson, ili estas aŭ de unu aŭ de la alia sekso, do ****aŭe ambaŭseksaj****.

Tamen la lernejo (aŭ eĉ la lernantaro) estas **"ambaŭseksa"**, por (aŭ **"el"**) unu kaj la alia seksoj kune.¹

Same la barbirejo estas **"ambaŭseksa"**, se ĝi traktas klientojn el ambaŭ seksoj. (Notu ke la barbiro normale ne estas **"ambaŭseksa"** —nek la klientoj **"ambaŭseksaj"**— = **"de ambaŭ seksoj!"**)

Same la vojo estas **"ambaŭflanka"** = havas du flankojn; la tulipkampano estas **"ambaŭkolora"**; kaj la bestprizorgejo estas **"ambaŭbesta"**, por hundoj kaj katoj en unu prizorgejo. □

¹ Do *Paĝoj por Plena Posedo*, paĝo 229, eraras tiurilate.

KONTRIBUOJ AL ESK

Se vi sendas tekston por aperigo en *ESK*: sendu la tekston per e-poŝto por plej facila utiligebleco; precipe por lastmomentaj kontribuoj tio certigas ke ĝi povos aperi akurate.

TRANS KVAR OCEANOJ

De NikSt

Moskvaj jaĥtistoj okaze de la 300-jara jubileo de la Rusia fioto intencas tranaĝi kvar oceanojn de Tero. Moskvaj jaĥtistoj el la klubo Prikluĉenije [Aventuro] sub gvido de la polusa esploranto-vojaĝisto Dmitrij Ŝparó planas unue en la historio tranaĝi kvar oceanojn dum unu jaro. Speciale konstruita jaĥto veturigos 7 sportistojn (kvar el ili Moskvanoj). Ili komencos en oktobro el Murmansko kaj post unu jaro revenos Moskvon— ĝuste dum la festado de la 850-jara jubileo de Moskvo. La jaĥtistoj planas tranaĝi 50 mil km laŭ la bordoj de Eŭropo, Afriko, tra la Hindia Oceano, ĉirkaŭ Aŭstralio, inter la insuloj de Oceanio, tra la Beringa Markolo, tra la Norda-Polusa Oceano.

Mi neniam komprenis aŭ aprobis tiujn, kiuj, anstataŭ labori sur kampoj, en fabriko, en oficejoj ktp., vojaĝas (je kies konto?) kaj riskas per sia vivo sanon k.s. Sed, kiel diris nia (mond)fama poeto Vladimir Majakovskij, se oni lumigas stelojn, do tio signifas ke tio ĉi estas bezonata de iu. Pro tio, ni deziru sukceson kaj ĉion la plej bonan al la vojaĝistoj kaj sukcesan revenon al la Patrujo. Eble ni (esperantistoj) sekvu la vojaĝon kaj raportu pri iliaj vizitoj en diversaj landoj, ĉu? Fartu bone!

(Teksto provizita per la Internet.) □

INFANKONGRESETO DUM LA UK EN PRAGO 1996



ekutime granda nombro da infanoj ĉeestis la ĉiĵaran 30-an

Infanan Kongreseton —entute 59 infanoj el 21 landoj.

La kongreseto okazis samtempe kun la UK, en Nová Rábyně, 40km sude de Prago. La kongresejo estis feria hotelo, kun multe da tereno, kaj eĉ apudlaga strando, kie la infanoj de tempo al tempo naĝis. La loĝejoj konsistis el pluraj unu-etaĝaj domoj en la arba tereno, malantaŭ la ĉefa hotelkonstruaĵo.

La celo de la infankongresetoj estas doni al Esperanto-parolantaj infanoj semajnon da aktivado pere de Esperanto, por ke ili ĝuu la sperton, kreu amikecojn, kaj progresu en la lingvo. Ili estis dividitaj en malsamajn grupojn por loĝado, manĝado kaj agadoj — ĉiuj kun miksitaj naciecoj, en si mem sufiĉe granda organiza tasko.

La grupaj agadoj konsistis ĉijare el kroĉbrodado, pentrado, arto, logikoproblemoj kaj lernado bekfluti. Speciale ŝatataj dum liberaj momentoj estis jonglado kaj farado de bidaj bracletoj. La infanoj estis petitaj kunporti siajn muzikilojn se ili havas, kaj kiel kutime infanorkestreto estis formita.

Mardon ĉiuj infanoj vizitis pluŝ bestan fabrikon, kie ili amuziĝis per pluŝursoj k.s. je diversaj grandoj kaj diversaj stadioj de produkt-

ado. Poste ili vizitis la Universalan Kongreson en Prago, kie ili kantis. Poste la infanoj intermiksiĝis kun gepatroj kaj kongresanoj. Kiel farigis lastatempa tracidio, ili "almozpetis", uzante grandan violonĉelujon, kaj esperis uzi la monon por remboatoj sur la lago, sed tio ne efektiviĝis pro troa vento. Ili tamen unu tagon ŝipekskursis.

Vendredon venis aŭtobuspleno da kongresanoj al la IIK-ejo por ĉeesti prezenton de la infanoj, kaj vidi la manlaboron de la infanoj. La prezento daŭris pli longe ol kutime, kun multaj skeĉoj de ĉeĥaj fabeloj. La orkestro kaj la bekflutistoj prezentis la akvomuzikon de Händel, kaj estis dancado de ĉeĥaj popoldancoj. La tekston por unu skeĉo, *La Pikniko*, la infanoj jam studis antaŭ ol veni al la kongreseto. Unu infano—15-jaraĝa Rolf Fantom—kantis unu el la kantoj de sia nova sonkasedo *Fantoma Fenomeno*.

Sabaton ĉiuj IIK-anoj iris al la UK, kie la infanoj kantis en la Solena Fermo. Kristoforo (Christopher Fettes, komisiito de UEA pri infankongresetoj) paroladis pri la bezono de UEA kaj la IIK bone kunlabori, kaj programorganizanto Heleno Fantom petis al la kongresanoj produkti pli da Esperanto-parolantaj infanoj. "Ne gravas kiel", ŝi komentis.

(Teksto provizita de *Eventoj* per la Internet.)

RAY ROSS

Verkis Tom Elliott

Lunde la 22an de julio, atingis nin informo ke Ray Ross mortis pro koratako frue tiutage. Ray estis sekretario de AEA, 1988-1995, Fratulo de AEA, verkinto de la historilibro *Esperanto en Aŭstralio*. Li servis kiel inspirfonto en Brisbano kaj la Kvinlanda Federacio. Li organizis nenombreblajn kongresojn kaj konferencojn.

Ne kontenta kun tiu laborego, li aktive partoprenis teatraĵojn kaj kantkonkursojn kiuj ofte gajnis por Brisbano premion.

Karega Ray, kun sia ĉarma edzino Peggy, estis longatampe idealisto streĉe sin dediĉanta al Esperanto. Ni, la postrestantoj, estos ĉiam dankaj pro la helpo kaj gvido de Ray kaj Peggy.

Al Peggy kaj la familio ni esprimas nian kondolencon plej sinceran.

(*Laŭ Telopeo 25/7*
Aŭgusto 1996)

////////////////////

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY

There is a collective feeling of new found confidence and achievement at M.E.S. at this time and it is largely due to the conscientious efforts of our esteemed examiner, Marcel Leereveld.

With a minimum of fuss, he encouraged willing Esperantists to sit for the three hour Basic exam-

ination with a deadline of just two weeks. The exam itself was almost solely based on a list of four hundred words we had been given to learn. The pass mark was eighty percent and because his own example of zeal and enthusiasm inspired us so, we *all* studied hard and succeeded in passing.

Because the entrants came from a variety of Esperanto clubs throughout Melbourne, this in itself has had a very positive, unifying effect on all. The fact also that we were examined as a group and not alone or isolated engendered a great buzz of excitement and a certain camaraderie.

This Basic exam has proved to be a stimulating "stepping stone" that has had the effect of inspiring many to go on to greater achievement in future higher examinations.

In fact, even as I write moves are afoot for the sitting of the Intermediate exam, and nine of the twelve will definitely be participating and some others are possible starters.

Thanks you Marcel and congratulations to the twelve out of twelve who entered and were successful.

Great stuff all round.

Tris Raouf

UK EN ADELAJDO 1997

Korekto: Adreso de Brendan Linnane:
28 Redford Street, Vale Park, SA

5081. Tel: 08 82661384

Adreso de la LKK:
PO Box 68, Rundle Mall, SA 5000.

////////////////////

ESPERANTA TURISMO-SERVO TANZANIA

Ni bonvenigas demandojn aŭ petojn de individuoj aŭ grupaj vizitantoj, turistoj, vojaĝantoj kaj turismaj entreprenoj aŭ firmaoj ĉirkaŭ la mondo, kiuj scivolas pri turismo en Tanzanio. Ni helpas vizitantojn, turistojn kaj vojaĝantojn solvi kaj trovi diversajn aferojn. Ankaŭ ni serĉas kunlaborantojn por investi en turismaj projektoj. Korespondu en Esperanto aŭ la Angla. Alligu 2 IRK por informo. Kontakto:

Sylvester N. Nyinyimbe
PO Box 147
Bunda
Tanzanio

scion de la kandidatoj, ĉar ili kompreneble lernas multe sin preparante por la ekzamenoj.

Mi do urĝe alvokas ĉiujn Esperantistojn anonci sin por unu el la tri ekzamenoj: la "Norma Elementa", kiu estas la unua el la tri, por tiuj kiuj finis kurson; aŭ la "Norma Supera", por tiuj kiuj jam sukcesis en la "Elementa" aŭ similnivela; aŭ la "Norma Klereca", la plej alta ekzameno, por tiuj kiuj jam sukcesis en la "Supera" aŭ similnivela.

Eĉ pli urĝiga estas la stato ĉe la nombro de posedantoj de la "Klereca", ĉar estas tiuj, parto el kiuj kondukadas la ekzamenojn. Dum la jusaĵoj du jaroj ni perdis kvar ekzamenistojn el la ok, kaj tiu duoniĝo danĝere malfortigas la organizadon de la ekzamenoj. Kvankam la "Klereca" estas malfacila pro sia tre alta nivelo, mi esperas ke almenaŭ deko da samideanoj decidus ekzamenati en ĝi ĉi tiun jaron. Ni ja havas en Aŭstralio dudekon da posedantoj de la "Supera".

Por ĉiu el la tri ekzamenoj oni registriĝas ĉe la Sekretario de la Ekzamen-Komitato: S-ino Marj. Ellyard, 5/55 Burkitt Street, Page ACT 2614.

La Libroservo havas vendeblaj la *Studlibro por la Elementa* kaj la *Studlibro por la Supera*, ambaŭ verkitajn de Ken Linton.

Mi deziras al ĉiuj bonan sukceson.

Marcel Leereveld
(Ekzamenestro)

Tel.: (03) 97545173

////////////////////

ALVOKO AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ AŬSTRALIAJ

Speciale nun, unu jaron antaŭ la Universala Kongreso en Aŭstralio, estas tre utile subigi vin al ekzameno. Tio ne nur plimultigos la nun malgrandan nombron de ekzamenitoj en Aŭstralio, sed tio ankaŭ pligrandigos la Esperanto-

REDUOBLIGADO: BAZA LINGVA FENOMENO EN ESPERANTO

De Ralph Harry

En la plejparto de lingvoj, se ne en ĉiuj, oni ripetas vortojn aŭ partojn de vortoj, kelkfoje kun malgrandaj ŝanĝoj por krei konsonantaj rimojn (aliteracio) aŭ vokalajn rimojn, aŭ asonancon por atingi diversajn deziratajn lingvajn efektojn. Oni nomas la fenomenon "reduobligado" (Angle reduplication, France réduplication, Germane Verdoppelung).

Simpla ripetado

La plej simpla kazo estas la ripeto de la tuta vorto. En la Angla lingvo ni faras tion ofte en granda gamo da tradiciaj situacioj. Ekzemple "Hear! Hear!" kaj "Come, come!" Oni parolas al infanoj pri "puff-puff", kaj "tum-tum". En Bahasa-Indonezia/Malajzia ripetado estas la normala metodo formi la pluralon: "Orang orang", "Mata mata".

Ŝanĝo de la unua konsonanto

Kelkfoje oni ŝanĝas la unuan konsonanton aŭ aldonas konsonanton, ekzemple: *argle-bargle*, *arty-crafty*, *bigwig*, *bow-wow*, *Box and Cox*, *boo-hoo*, kaj en la Franca *Brise-bise*, *pê-le-mêle*.

Ŝanĝo de la vokalo

Alia tipo de reduobligado estas ŝanĝo de vokalo, ekzemple: *bric-a-brac*, *belah belay*, *flip-flop*, *tick-tock*. La ŝanĝo kelkfoje estas nur asonanco kun aliteracio: *eager beaver*, *hitch hike*, *busybody*.

Ŝanĝo de tono

En la Vjetnama lingvo troviĝas reduobligado kun ŝanĝo de tono, ekzemple: *dodo* (ruĝeca), *nho nho*, *trang trang* (blankeca) kaj *buom buom* (papilio).

Reduobligado estas vivanta metodo en la Angla

Do, mi kredas ke reduobligo okazas universale, kaj ke ĝi estas vivanta lingvokreilo. En la Angla kreiĝis: *hush-hush*, *hubba hubba*, *hubble bubble*, *blab-blab*, *blah-blah*, *go-go*, *lulu*, *yo-yo* (el la Tagaloga lingvo), *boo-boo*, *putt-putt*, *mumu* aŭ *muu-muu* (el Havajo, komparu *hula hula*), *flip-flop* (sandalo), *wingding*, *superdooper*, *pocket rocket* kaj *Oaresome four-some!*

La efikoj de reduobligo

Preskaŭ universalaj estas la diversaj efikoj de reduobligo. La ĉefaj efikoj de reduobligado estas: plureco (*mata mata*, *orang orang*), intensigo, ŝerceco aŭ blageco, daŭrigo, fantazieteco, eteco, infanparolado (hipokorismo), kaj egeco.

Reduobligo en la lingvoj de Aŭstraliaj Aborigenoj

Reduobligo okazas ankaŭ en la lingvoj de la Aŭstraliaj aborigenoj: "Wagga Wagga" "Mitta Mitta", "Woy Woy", "Nulla Nulla" kaj "Willy Willy". (Vidu Anekson)

Uzado en la Franca/Malagache

En Madagaskaro oni uzas *pousse*

-pousse por jinrikŝo kaj *coup-coup* por maĉeto.

Uzado en la Hispana

En la Hispana oni diras *loco como loco* (freneza kiel lokomotivo).

Uzado en la lingvo de Tongo

En la lingvo de Tongo oni uzas diversajn tipojn de reduobligo (kompletan, unuan parton, finan parton, mezan parton) por krei plurecon, daŭrigon, intensigon aŭ pliintensigon aŭ alian efikon. Vidu Anekson.

Uzado en Hindia

En Hindi kelkaj vortoj povas esti kunigitaj per "Eĥo-vortoj" por plilargigi kaj ĝeneraligi iliajn signifojn: *cay-cay—teo ktp*

bhir—homamaso *bhir-bhr*—puŝigo kaj dismoviĝo (Angle *hustle and bustle*)

Thik—bona *thik-thak*—bonega, ĉio en ordo

pesil—pencil, kraĵono *pesil-vesil*—skribilo

gap—klaĉo *gap-sap* fiklaĉo, Angle *tittle-tattle, chit-chat*

Reduobligo en Esperanto

Frua Esperanto

En frua Esperanto reduobligo ne estis multe uzata. Estas kelkaj duoblaj radikoj, plurfoje uzitaj de Zamenhof, ekzemple *agaragar*, *babao*, *barbaro*, *bombono*, *ĉifĉafo*, *kankano*, *kunkun*, *kuskuso*, *murmuro*, *riĉraĉ* (sono de ŝiriganta ŝtofo), *susuri*, *tamtamo*, *tiktaki*, *ululi*. Sed ili deriviĝis jam duobligitaj, ofte onomatopeaj, ĉefe el radikoj en aliaj lingvoj.

Estis kelkaj fruaj uzoj, ekzemple

finfine kaj *iom post iom*, sed mi ne trovis verajn reduobligojn en la verkaro de Zamenhof.

Zamenhof

L.L. Zamenhof, la verkinto de Esperanto, bone komprenis la valoron de koncizaj esprimoj, modelitaj laŭ la naciaj lingvoj. Li donis vivon al la internacia lingvo tradukante la kolekton de proverboj de sia patro, kaj kreante originalajn proverbojn laŭ la sama modelo. Multaj el ili inkludis la elementon de rimoj aŭ asonancoj en la reciprokaj frazeroj. Jen 8 el la unuaj 16 en la zamenhofs kolekto de 2630 proverboj (Eldonejo Stafeto, La Laguna):

1. Abelujon ne *incitu*, amason ne *spitu*.
2. Afabla vorto pli atingas ol *forto*.
3. Aĝo maljuna ne estas oportuna.
4. Aĝo tro *matura* ne estas *plezura*.
5. Akvo bolas, *murmuras*, sed fine ĝi *kuras*.
6. Akvo kaj *pano* servas al *sano*.
7. Akvo *kura* akvo *pura*.

ktp ktp! Sed tio ne estis reduobligo.

En lia traduko de *Hamleto* de Ŝekspiro estas kelkaj kazoj de simpla ripeto de vortoj, ĉefe uzitaj por emfazo (aŭ eble por helpi konservi la senriman metrikon!). Ili estas preskaŭ ĉiuj tradukoj aŭ eĥoj de la ripetoj de Ŝekspiro mem (Paĝoj donitaj estas tiuj de la 1964-eldono—*Hamleto*, *Regido de Danujo*, Éditions Françaises d'Espéranto, Marmande):

Li mem, li mem p.4

(Tush, tush) Jes, jes pp. 4, 44

Fi, fi p. 17 (Fie on't)

Ne, ne pp. 33, 36, 88 (No, it is struck)

Princo, princo p.43 (My lord, my lord.)

Vortojn, vortojn, vortojn p.65 (Words, words)

Mian vivon, mian vivon p. 66, Akto II
Sceno II (Except my life, except my
life).

Kuraĝe, kuraĝe p. 69 (Come, come)
Vere, vere p. 86 (O, 'tis too true)
Ne, ne! Neniam p.88 (No, not I)
Mi nenion al vi donis (I never gave
you aught)
Ha, ha, ha pp. 89, 107.
Ne, ne pp. 95, 128
Vi pikas, vi pikas p. 99
Lumon, lumon, lumon p. 106 (Lights,
lights, lights)
Efektive, efektive p. 112
Helpon, helpon p. 120 (Help, help ho!)
Sur lin! Sur lin! p. 128 (On him! On
him!)

En sia traduko de la *Malnova Testamento de la Sankta Biblio* Zamenhof ankaŭ ne uzis reduobligon. Mi ne tralegis la tuan Biblion, sed mi legis la Libron Genezo—tio estas 50 paĝoj—kaj mi trovis nur 5 kvazaŭ-reduobligojn:

miĵoj da miĵoj 24:60
pli kaj pli 26:13
vizaĝon kontraŭ vizaĝo 32:30
Jakob, Jakob 46:2
Mi scias, mia filo, mi scias 48:19

Ni trovas similajn ripetojn en la traduko kiun faris Zamenhof de la *Fabeloj de Anderson*. Mi citas el la Eldono de 1965—*Fabeloj*, H.C. Andersen, Heroldo de Esperanto, Bruselo):

Feloj, feloj 20
Ho ve, ho ve 23
Mi timos, mi timos 26
Kvivit, kvivit 40, 54
Nu, nu 49
Adiaŭ, adiaŭ 50, 54
Bonan matenon, bonan matenon 62
Pep-pep 136
Flugu, flugu 140
Ho vojaĝi, vojaĝi 145
Vidu, vidu 155

Jes, jes 155
Haltigu lin, haltigu lin 156

Zamenhof ja uzis en *Fabeloj* alian formon parenca al reduobligado:

Vizaĝo kontraŭ vizaĝo 60
Brakon en brako 104
Brakon sub brako 168
De tempo al tempo 63, 142, 155
De tago al tago 99
Pluen kaj pluen 61
Pli kaj pli 116, 147, 156
Falis gutoj post gutoj 155
Frapon post frap 168
Pasis tagoj post tagoj 160

Tiuj ripetoj kun *kaj* kaj *post* enhavas klaran sugeston de daŭro kaj ripeto. Estas sugesto de duobligo por substreki en la onomatopeaj ripetoj kiaj *Kvivit, kvivit...* Sed mi ne trovis ekzemplojn de la duobligo de radikoj uzata kun unu sola terminajo. Mi ne trovis ĉe Zamenhof *finfine, plenplena*, aŭ duoblan vorton kun ŝanĝo de konsonanto aŭ de vokalo. Zamenhof, laŭ mia enketado, ne ludis la internacian ludon reduobligado.

Kalman Kalocsay, en sia traduko de *La Tempesto* de Ŝekspiro, uzis ripetojn similajn al tiuj de Zamenhof en *Hamleto*, kelkfoje eĉ kiam ne estas ripeto en la originalo:

Arielo: "I do not, Sir" "Ne, ne, Majstro"
I,2 (p.20)
Caliban: "The spirit torments me "La spirito min tormentas, Oh! ve, ve."
II,2 (p.40)
Ariel: "I go, I go" "Jes, mi iras, iras".
IV,1 (p.70)
Prospero: "all, all lost, quite lost"
"vanis, tute vanis,"IV,1 (p.70)
"uglier grows" "pli kaj pli turpigas"
IV,1 (p.70)
"So, so, so, to the king's ship" "bone,

bone, bone...sur la reĝan ŝipon". V,1 (p.82)

Gonzalo: "Be't so, amen". "Tiel estu, amen, amen." V,1 (p.82)

"O look, sir, look, sir. "Ho vidu, vidu,..." V,1 (p.82)

Prospero: "Go to; away!" "For, for, iru!". V,1 (p.86)

Eĉ pli interesa estas la paroloj de Ferdinando (III,48):

"And he's composed of harshness" "Kaj ĉi tiu estas nurnura krudo"

kaj de Stefano III,2 (p.56):

"No, monster, not I" "Nenne", monstro"

Estas noto: * *Nenne* Insista neado:

la nega vorto *ne* estas apogita per la nega prefikso *nene-* de la tabelo (de korelativoj).

Julio Baghy (1891-1967), en *Songe sub pomarbo* ja uzis unu-du reduobligojn:

la gazet'...plenplenas kun novaĵoj p.37

Lampiroj ek-ek-brilegas p.84

Guo stertoras...sorĉe kaj forĝe p.88

"bruo de parenca gastameco zumis longe longe" p.96

Turnodance ringe svinge p.199

Ni migris foje-foje

Paul Thorsen en *Rozoj kaj Urtikoj—La forĝisto kaj la bakisto* diris:

"Verveve" diris la juĝisto, "ide' kun perspektivo"

"Plenplene kulpas laŭ la senc"

Raymond Schwartz

La ĉefa pioniro en la uzado de reduobligado en Esperanto estis Raymond Schwartz. Raymond Schwartz (1894-1975) estis Franca bankdirektoro. Li esperantistiĝis jam antaŭ la Unua Mondmilito. Post 1918 li kontribuis al multaj gazetoj, precipe al *Literatura Mondo*, *Franca Esperantisto* kaj *La*

Nica Literatura Revuo. Li fariĝis redaktoro de la fama spritzgazeto *La Pirato* kaj fondis la esperantistan kabareton "La verda kato" kaj poste la "Tri koboldoj". Li estis humoristo kaj satiristo. Liaj verkoj estis: *Verdkata testamento* (originalaj versaĵoj, 1926, 2-a eldono 1930); *Prozo ridetanta* (noveloj, 1928); *Anni kaj Montmartre* (romano, 1930); *La stranga butikoj* (originalaj versaĵoj, 1931); *La ĝoja podio* (prozo kaj poezio originalaj, 1949).

En la verkaro de Schwartz ni estas en mondo de vortludoj, anagramoj, kontraŭknaĵoj, "preskaŭtrafoj" (ekz. kiel vi farsas?) kaj reduobligoj tra la tuta gamo.

Kiel akvo de l'rivero (Stafeto, La Laguna, 1963):

(a) substantivo—prepozicio—substantivo (simila al tiuj de Zamenhof) brak'-en-brake (110), "brakon sub brako (163), vid'-al-vide (71, 109, 470), de vizaĝo al vizaĝo (157), manon-en-mano (292), hom-al-homo (kontakto de...) (339), iom post iom (166, 176, 188, 205, 340,430), tagon post tago (431), radion post radio (255), jaron post jaro (325), de tempo al tempo (335).

(b) radiko kaj konjunkcio kaj ripetita radiko:

re kaj re (178, foje kaj foje (112), ĉion kaj ĉion (163), pli kaj pli (261, 262, 279, 430, 456), ofte kaj ofte (271), jen kaj jen (182), ĉio kaj ĉio (195), dum horoj kaj horoj (299)

(c) simpla ripetado: ne, ne (72), Jes jes (79), jen, jen (64), antaŭ multaj multaj jaroj (478)

(d) vera reduobligo, tio estas kunmetitaj ripetitaj radikoj:

famfama (64), plenplena (24, 191, 312, 334), finfine (84, 149, 244, 317,

444, 470) kaj la klasika paŭtraf (66), "vagonŝanĝoj flugflug el unu..." (69), kaŝkaŝo, kaŝkaŝludo kaj kaŝkaŝpartiojn (263), ĉjoĉjo nomoj (263), jesjesuloj (357) et-ete (324), vole-nevole (*Angle willy-nilly*) (153, 168, 263), fojfoje (159, 340, 400, (462), frot-frote (231), iam-tiam aŭ iam, tiam (158, 174, 255, 332, 364), tiktakadon, grand-granda (399), le-tie (366) kaj etaj-etaj (399)

Schwartz verŝajne estis de Alzaca origino (mi supozas tion pro la nomo, la rolulo Anni kaj ankaŭ pro la temo de *Kiel akvo de l'rivero*). Ĉiuokaze multaj el liaj reduobligoj havas Germanan stilon:

pli trete ol trote (166), kontraŭ muro kaj maro (245, 263), premo kaj tremo (461), je sprito kaj spirito (229), potejn kaj patojn (395), blovo kaj movo (171).

Kelkaj el liaj ripetoj gajnas efektan per la uzo de esperantaj afiksoj:

bakis, bakadis (205), ekneĝis, neĝis, neĝis (342), kliŝklaĉo (412)

En Anni kaj Montmartre troviĝas rasrasan (39), medio kaj metio (41), zumzumis (42), kaj nigrenigraj (67).

En Vole...Nevole, multaj noveloj kiuj venas el pli frua periodo de la verkado de Schwartz, la reduobligado ne estas tute same riĉa, sed troviĝas ekzemploj:

plenplena, finfine, murmuri, tiktaki.

Estas ankaŭ "Germanaj paroj": papo kaj pipo, kuko kaj koko, inter stufoj kaj pufoj.

Mi trovis unu ekzemplon de reduobligo kun ŝanĝo de la konsonanto: lacpace!

La Gaja podio, eldonita en 1949, havis kelkajn ekzemplojn:

fojfoje, plenplene, nov-nova amo,

zum-zum, bum bum, nunnune, finfine, pif-paf kun pafil, plumm kaj bumm, kun haŭto kaj haroj.

Kun siaspeca spico, (1971) kolekto de verkoj inter 1951 kaj 1971, uzas la plenplenan gamon de reduobligo:

(1) finfine, fojfoje, plenplena, ĉintina, nurnure, plejplejeco

(2) kerno kaj karno, kise kaj kase, ne klubon sed klabon, retoj kaj ritoj

(3) prelate, delikate; senpaŭze kaj ĝis naŭze; leĝe kaj preĝe, pafis kaj trafis, lerta kaj sperta; laste ne haste; pafis kaj trafis; gestojn kaj festojn; nek hufo nek kufo.

(4) krome kaj krone

Ne mankas reduobligoj en niaj nuntempaj aŭtoroj.

Ronroni estas en *PIV*.

En Kantoj kaj romanĉoj de Heine mi notis:

tagtage (170)

En La bona lingvo, de Claude Piron, kiun ni kune studis en 1993, troviĝas:

finfine (64) kaj fojfoje (77) disvolvi plejplej konsekvence (83) sen honto kaj hezito (91) ĝi rezistos, ĝi ekzistos (94)

Australian Esperantist de septembro 1992 p. 16 havis gemon: Por lastlastuloj validas la poŝtstampo sur la koverto (*Informo el Eventaj*).

En Monato de oktobro 1992: pagu vian kotizon escepte frue, prefere tuj-tuj!

kaj en decembro 1993:

384 plenplenajn paĝojn fojfoje iu pro tio tuj ĉesigas sian abonon.

(Finota en la venonta numero)

////////////////////

**RESPONDOJ POR "PROVU
VIAN VORTOSCION"**

1.c; 2.a; 3.a; 4.a; 5.c; 6.b; 7.a; 8.c;
9.a; 10.a; 11.c; 12.c.

Kiel oni nomas tion?: 1. ananaso;
2. anaso; 3. ansero; 4. barelo;
5. pato; 6. ampolo; 7. maleolo;
8. ungo; 9. agariko; 10. reno;
11. testudo.

(Daŭrigo de p.8)

la.

KEP ENDERBY

verkis artikolon "A language for Europe" kiu aperis kiel la ĉef-artikolo en *Business Life: The Magazine for Europe*, julio-aŭgusto 1996, provizata de British Airways al ĉiuj siaj pasaĝeroj inter Eŭropo kaj Aŭstralio. Ĝin akompanis paralele presita artikolo de alia verkinto, pledanta por la Angla lingvo kiel la lingvo de la Eŭropa komunumo.

**La Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda
Esperanto-Asocioj**

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio: Aŭ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj) ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA. PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: NZ\$40 por individuo, \$50 por gedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco: Por membroj, Aŭ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, Aŭ\$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio:
En Usono kaj Kanado: US\$30.
Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50

Ned.Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1996 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile per Power Macintosh 7200. La kompostoprogramo estas Nisus Writer. Alfabetoj uzitaj estas New Century Schoolbook 10 kaj Orion Esperanto 16 (disponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Business Network, 5/25a Oxford St, Bondi Junction NSW 2022.

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 24 [1996/6] — Novembro-Decembero 1996

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la
Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B
Lukin St, Beverley WA 6304,
Aŭstralio. ☎ 096 46 1389. (Faksilo
ne plu estas disponebla.)

e-poŝto: enkidu@perth.dialix.oz.au
Libroservo: Tom Elliott, PO Box
230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Korespondaj kuzoj: D. Lukes &
H. Green, PO Box 1814, Toowoomba
Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi
elkovertigis vian novan ekzempleron
de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni
vere bezonas artikolon pri...? Do sendu
tium amatan eseon, ideon, rakonton,
esprimon de vidpunkto, leteron, de-
segnaĵon, foton. Vi povas sendi vian
kontribuon sur komputila disko (Mac-
intosh aŭ MS-DOS—nur 3.5-cola) aŭ
sur papero. Se vi sendas sur papero,
la teksto devas esti klare tajpita per
fresa rubando. Tajpu sur nur unu
flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco
inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manu-
skriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de
ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti
kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo,
kaj konformigi ĝin al la stilo kaj
kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone
teksto povas esti mallongigita. Ni ne
povas promesi aperigon en la tuj
sekvonta numero, krom se temas pri
io kronologie urĝa. Pri la enhavo de
artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Pho-
ebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Law-
son St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 May-
field Drive, Mt Waverley Vic 3149.

La Nov-Zelanda Esperanto- Asocio:

PO Box 8140, Symonds St, Auckland
1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71
Princes St, Otahuhu, Auckland 1006.
☎ 09-270 3669.

Sekretario: Brad McDonald, PO
Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.
☎ kaj faksoj: 09-579 4767.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140,
Symonds St, Auckland 1035.

Pri abon- kaj membro-kotizoj,
vidu paĝon 27.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

"Catherine kaj Veronica" (Donald Broadribb)-novelo.....	2
Via redaktoro.....	7
Provu vian vortoscion.....	12
U.K. in Adelaide.....	14, 26
Deziras korespondi.....	17
Skribas la legantoj.....	18
Lingva angulo.....	19
NZEA-Kongreso.....	25
Pasporta Servo.....	25
Simpozio: Lingvoj por la 21 jc.....	27
Indekso 1996.....	29

Recenzoj:

La du Turegoj (D.B.).....	8
Tra la Spiegulo (V.P.).....	10

*There is no English Supplement
in this issue.*

Limdato por artikoloj por la januara
numero: 14 decembro

Esperanto sub la Suda Kruco estas
legebla per la Internet. Adreso:

[http://www.emedia.com.au/use-
rs/peterb/esk/](http://www.emedia.com.au/users/peterb/esk/)

CATHERINE KAJ VERONICA

Novelo de Donald Broadribb



um la pasintaj kelkaj monatoj mi estis, kiel bone scias niaj legantoj, grandparte

blinda. Ĉar kutime mi estas tre aktiva leganto, preskaŭ legisto, kaj senĉesa komputilanto, post tre nelonga tempo mi multe enuis, kaj tial agrable surprizis min la vizito de malnova amiko veturinta la 130 kilometrojn de Perto al mia domo en Beverley. Konversaciado kun vizitanto estas granda spiritlevilo por mi.

Mia amiko nomiĝas Louis, kaj kvankam mi lastafoje renkontis lin antaŭ 13 jaroj, mi tuj rekonis lian voĉon kiam mi malfermis la pardonon. Lian vizagon mi ne povis klare vidi, pro mia okulproblemo, sed surbaze de lia voĉo mi invitis lin eniri. Ni intersalutis unu la alian, kaj post kelka tempo li diris:

“Nu, mi ĉefe venis por porti al vi malgrandan historion, kiun vi eble volos publikigi en via gazeto. Mi povus sendi ĝin perpoŝte, sed mi timis ke vi jam tute forgesis min kaj opinius ĝin nur la verko de maniulo.”

Mi ridetis, ĉar efektive ĉiam tiu amiko mia ŝajnis al mi iomete freneza, sed kompreneble mi ĝentile insistis al li ke mi neniel povus havi ian tian ideon, kaj mi petis ke li laŭtleĝu al mi sian “mallongan historion”. Unue li malvolontis, ĉar li diris: “ĝi estas

iom longa kaj komplika, kaj prefere vi tralegu ĝin kaj la detalojn antaŭ ol ride fornei ĝin.”

“Jes,” mi respondis, “mi komprenas tion. Sed mi ne povas legi ĝuste nun, miaj okulooperacioj lasis min provizore pli-malpli blinda.”

“Mi ne kredas tion,” Louis diris. “Mi legis en via *Suda Kruco* ke temas pri kataraktoperacioj, ĉu ne?”

“Jes,” mi agnoskis.

“Nu, mi konas multajn personojn kiuj spertis tian operacion. Ili certigas al mi ke ĝi estas tre simpla; oni jam samtage post la operacio tute bone vidas—nenia ‘problemp periodo postoperacia’ ekzistas.”

“Verŝajne viaj konatoj pravos, rilate al si mem,” mi respondis. “Sed kelkaj komplikaj rilate al miaj okuloj ekzistas. Necesos ankoraŭ du-tri monatoj antaŭ ol miaj okuloj resaniĝos, kaj tiam oni preskribos novajn okulvitrojn por mi. Mi neniam povos vidi egale bone kiel antaŭ la operacioj, sed oni diras ke mi ne blindiĝos, kio estis neevitebla sen la operacioj.”

“Okulvitroj post simpla kataraktoperacio?” li diris. “Mi ne kredas.”

“Kredu aŭ ne, laŭprefere,” mi diris. “Vi havas viajn okulojn, mi havas miajn. Nuntempe mi ne povas eĉ klare vidi vian vizagon. Do bonvolu pervoĉe rakonti al mi vian novelon, kaj mi decidus ĉu inkluzivi ĝin en la gazeto.”

"Novelo ĝi ne estas," li protestis. "Ĝi estas historio—vera evento, nemodifita raporto."

"Nu, kio ajn ĝi estas, bonvolu pervoĉe prezenti ĝin," mi invitis, "kaj bieron vi povos dume trinkadi se vi deziras. Vinon mi mem preferos."

La "historion" li rakontis al mi. Mi skribas ĝin laŭ mia memoro. Helpanto mia bonvolis kompari mian memoron kun lia multpaĝa manuskripto, kaj certigas ke mi ĝuste reproduktas la esencon de lia "historio".

"Eble vi memoras ke mi estas, pli ĝuste, estis, amatora aktoro," Louis diris. "Mi tre ofte ludis en la repertuaro de malgranda aktor-trupo en Booragoon [kvartalo en Perto]."

Mi kapjesis.

"Nia ĉefaktorino estis Catharine, ĉarma juna virino, bibliotek-istino en tiu kvartalo. Ŝi havis tre klaran voĉon, kaj ŝi tre amis la virojn, precipe la aktorvirojn en nia trupo. Mi diras ke ŝi 'amis' ilin, pli precize ŝi amis amori ilin.—Ĉu vi komprenas?"

Denove mi kapjesis. Mi bone konis Catharinen, kvankam neniam min ŝi amaris, eble ĉar mi estas tre malkompetenta aktoro. Ofte dum trankvila rendevuo en alloga restoracieto proksime al la biblioteko en Booragoon ŝi kaj mi vespermanĝetis kaj kaŝtrinkis dum ni priparolis la plej novajn eventojn bibliotekajn, aŭ teatrajn, aŭ diversalispecajn. Mi multe ĝuis ŝiajn voĉon kaj entuziasman parolmanieron, kiel ankaŭ min amuzis rigardi ŝin manĝi kremkuketon

post kremkuketo post kremkuketo, kion ŝi faris sen eĉ unufoje dum pluraj jaroj plipeziĝi je eĉ unu kilogramo.

Denove la rakonto de Louis:

"Tiu ammanio, se mi rajtas tiel nomi ĝin, ne ĉiam plaĉis al ŝiaj viktimoj, kvankam siajn plej sukcesajn rolojn ŝi aktoritis sursceneje dum tiuj periodoj kiam ŝia aktuala amorato estis ankaŭ ŝia kunĉefaktoro.

"Ankaŭ mi, feliĉe-malfeliĉe, estis iama 'viktimo' ŝia. Sed, eble ĉar mi neniam estis ĉefaktoro en la trupo, mi neniam sentis min ŝia plejfavorata amorato. Tamen, mia fianĉino—kiu poste fariĝis mia edzino—Veronica, ne altestimis la rilatojn inter Catharine kaj mi, kaj unu vesperon Veronica decidis preni tranĉilon kaj piki per ĝi Catherinen en ŝia vestoĉambreto malantaŭ la scenejo en la teatro. La afero ne estis silenta. Catherine sukcesis tre laŭte krii dume, kaj Nera, la edzino de la direktoro, enkuris sufiĉatempe por vidi la enpuŝon de la tranĉilo. Eble vi memoras tion."

Mi bone memoras. Veronica sukcesis trafi la koron per sia tranĉilo, kaj la ĉarma voĉo de Catherine neniam reaŭdiĝis. Nek ŝi kaj mi iam denove vespermanĝetis kaj konversaciis en tiu restoracieto.

Mi diris al Louis: "Efektive, la polico petis min helpi identigi la murditan Catherinen. Kaj ili longe pridemandis min kaj Neran pri Catherine, kaj pri Veronica... kaj pri vi."

"Jes, sendube. Veronica kaj mi opiniis ke estos plej saĝe ne plu

resti en Booragoon, nek en Okcidenta Aŭstralio. Enpuŝinte la tranĉilon ŝi kuris kun mi tra la pordon kaj al nia automobilo. Ni veturis rekte al la flug-haveno, kie ni eniris aviadilon kiu flugigis nin al Nov-Zelando. Poste alia aviadilo portis nin al iu urbeto kies nomo ne interesos vin, nek la nomo de la lando en kiu ĝi situas."

"Devas esti, do, ke Veronica antaŭplanis kaj antaŭarangis la murdon kaj forfuĝon," mi diris. "Jam post dek kvin minutoj la polico venis al la teatro, pro telefon Alvoko farita de Nera. Mirigas min ke la polico ne trovis vin, aŭ en la flug-haveno ĉi tie aŭ en Nov-Zelando."

"Eble ĉar Veronica donis falsajn nomojn kiam ŝi antaŭadeti la flugbiletojn," Louis respondis. "Certe ŝi bone antaŭplanis kaj antaŭarangis. Oni ne sukcesas pri murdo sen tio, krom eble pro nekredbla bonfortuno, kaj bonfortunon ni ne havis, kiel vi baldaŭ rekonos."

"Kaj falsajn pasportojn?" mi diris, dubeme. "Por eniri Nov-Zelandon oni nuntempe devas kunhavi pasportojn. Kaj ŝajnas al mi ke vi estus tro ŝokita por ekfuĝi kun ŝi sen momenta pripensado."

"Pri mia rolo mi preferas ne paroli," Louis diris. "Pasportojn Veronica facile antaŭhavigis al si. Sed ne falsajn. Tamen kun aliaj nomoj. Ŝi...nu ŝi 'prunteprenis' ilin de du konatoj niaj. Sen ilia scio, efektive. Verŝajne ili ankoraŭ ne scias ke la pasportoj mankas al ili; ili ne estas tre veturemaj, ne trafus ilin la ideo serĉi siajn mis-

metitajn pasportojn."

"Sed nun vi denove estas ĉi tie," mi konstatis. "Do evidente vi mem revenis en Aŭstralion; kaj eble ankaŭ Veronica?"

"Nu, ne kaj jes," Louis diris. "Nur aŭskultu la historion. En tiu alia urbeto — kaj landeto — Catherine kaj mi luprenis loĝejon en relative altkvalita apartamentaro. En la tria etaĝo. Ni feliĉe kaj agrable loĝis tie dum ĉirkaŭ dek jaroj."

"Nur dek?" mi demandis. "Mankas tri jaroj en via historio, do. Kion vi faris dum tiuj tri jaroj?"

"Estas preferinde ne paroli pri nia ĉeestoloko dum la unuaj tri jaroj post la murdo," li respondis. "Se vi publikigos ĉi tiun historion, mi ne volas tro klare konigi la detalojn de niaj agoj."

"Supozeble vi devis tamen labori, dum tiuj dek tri jaroj," mi pludiris. "Kiel vi akiris sufiĉan monon por via 'feliĉa kaj agrabla' vivado tiam?"

"Ni jam agnoskis ke Veronica tre bone antaŭplanis kaj antaŭarangis," Louis protestis. "Kelkajn sekretojn vi devas permesi al ni."

"Okej. [OK] Do ankaŭ pri tio mi ne postulos detalojn. Sed finu vian rakonton, ĝi komencas tedi min. Pli interesas la demando: kie nun estas Veronica. Se ĉi tie, ĉu la polico kaptis aŭ kaptos ŝin?"

"Ĝuste tion mi intencis priparoli: Nu, kiel mi diris, ni feliĉe kaj agrable loĝis en nia apartamento tie; sed en junio, ĉijare, nin tre alarmis kaj ŝokis trovi novan geedzan paron loĝanta en la apartamentaro. Unu tagon kiam

ni revenis de butikumado, ni ekrimarkis Neran—la edzinon de nia iama direktoro en la amatoraj dramoj en Booragoon. Poste mi sciigis ke Nera kaj ŝia edzo ferias en...nia loĝurbo...kaj luprenis apartamenton sur la dua etaĝo de tiu sama apartamentaro kie ni loĝis. Hazarda koincido tre malagrabla por ni. Nu, kompreneble Veronica ne deziris ke tiu direktoro aŭ lia edzino vidu ŝin, ĉar ja ili bone scias detalojn de la murdo kaj ke la polico serĉas ŝin. Do ni kiel eble plej rapide preterpuŝis nin por plui al nia apartamento, kaj ekde tiam Veronica devis ege zorgi por ne ebligi ke ŝin rimarku Nera kaj ŝia direktoredzo."

"Estus malfacile, ŝajnas al mi," mi komentis.

"Vi plene pravas. Ne nur malfacile, neeble. Jam la sekvan tagon la direktoro ekvidis min dum mi trairis la pordon al la strato, kaj li demandis al mi pri kie mi loĝas. Li baldaŭ informigis ke mi loĝas en la etaĝo tuj super li, kaj plurfoje li kaj lia edzino Nera provis viziti nin en nia apartamento. Do, kia problemoj! Mi sukcesis, pli-malpli sukcese, forsendi lin plurfoje per mensogoj, sed unu vesperon li kaj lia edzino venis al nia pordo, kaj kiam mi malfermis ĝin, ili diris ke ili vidis Veronican eniri, kaj ke ili insistas paroli kun ŝi.

"Nera eĉ diris ke ŝi rekonis Veronican jam kiam ŝi preterpuŝis sin antaŭ kelkaj tagoj. Kaj Veronica, ŝi diris, estas murdistino kaj raportenda al la polico. Mi insistis ke Veronica ne estas murdistino. Sed Nera objektis: 'Ke ŝi murdis

Catherinen mi scias, ĉar mi mem vidis ŝin fari tion,' ŝi diris. Kaj kompreneble ŝi pravis.

"Ili komencis puŝi min iomete, por devigi min enlasi ilin. Nu, dum ili faris tion, mi videtis Veronican, kun mantelo kovranta ŝian kapon, elpaŝi tra la dua pordo de nia apartamento kaj rapidi mal-supren laŭ la ŝtuparo, tre, tre silente. Tion ne rimarkis la du vizitantoj, do kiam mi konstatis ke Veronica jam ne plu estas videbla, mi ekcedis al ili kaj permesis ke ili eniru."

"Kaj ili trovis, kompreneble, en la apartamento neniun," mi komentis, "ĉar Veronica ĵus foriris."

"Jen tre stranga neatenditaĵo: ili ja trovis iun en la apartamento. Pli precize, ili trovis Catherinen; tute viva, tute sana, tute feliĉa, kaj tute familiara kun la interno de la apartamento. Eĉ ŝiajn vestojn kaj aliajn personaĵojn ni vidis disloke en la apartamento, kaj tute nenian personaĵon de Veronica. Kaj do nun, de tri monatoj, mi loĝas kun Catherine. Ankoraŭ nun."

Mi ridis. "Tio ne estas 'historio', tio estas ŝerco," mi diris. "Eĉ la legantoj de sciencfikciaĵoj ne kredus ĝin. 'Ŝerco, aŭ la parolo de frenezulo. Ne gravas; mi ne volas publikigi ĝin.'"

Louis starigis, evidente ĉagrenita. "Mi scias ke vi kredis ŝin morta...," li diris.

"Pli ol kredis," mi diris kolere. "Mi identigis ŝian korpon. Kaj mi ĉeestis la enterigoceremonion, mi vidis ŝian enterigon."

"Tamen, mi diras al vi la veron,"

Louis diris. "Mi povas pravi ĝin."
 "Nenio povas pravi vera ke murdita persono plu vivas."

Ĝuste tiam la pordo de mia domo malfermiĝis, kaj virino eniris. "Louis, ĉu li akceptas vian rakonton?" ŝi demandis.

...
 La voĉon de Catherine mi tre bone kaj klare rekonis.

...
 Kompreneble, la vizaĝon mi ne povis klare vidi. □

korekti la erarojn, kvankam ne tute.

La rezulto estas ke mi nun denove povas vidi, post tri monatoj da parta blindeco, kvankam malpli bone ol antaŭ la operacioj. Tio estas ne vere kontentiga, tamen iama blindiĝo estas evitigita, do tiurilate la operacioj sukcesis.

Mi dankas al ĉiuj bondezirintoj.



////////////////////

VIA REDAKTORO

Ĝisdatigo pri miaj okuloj:

La okulooperaciojn instigis la trovo ke la lenso de la dekstra okulo grave maldiafaniĝis kaj post kelkaj jaroj tiu okulo blindiĝos. La oftalmologo rekomendis kataraktoperacion. Kun escepto de la maldiafaniĝo de la dekstrokula lenso, per tre dikaj okulvitroj mia vidpovo estis kontentiga.

Antaŭ la operacioj detala ekzameno montris ke miaj okulgloboj estas eksterordinare profundaj, t.e. la distanco inter la lensoj kaj la retinoj estas nekutime longa (kaj diferenca en ĉiu okulo).

La unua operacio malsukcesis, parte pro misglito de la nova lenso. La dua operacio sukcesis, kirurgie. Tamen post ambaŭ operacioj oni trovis ke oni erare enmetis malĝustajn lensojn.

Mi, kaj la krirugo, preferas ne esti ekstrapaj operaciojn. Per novaj okulvitroj eblis grandparte



Igorj Sitnikov



LA DU TUREGOJ

recenzas Donald Broadribb



J. R. R. Tolkien: *La Du Turegoj*. Tradukis William Auld. Jekaterinburg (Rusio): Sezonoj, 1996. Serio: Mondliteraturo. Volumo du de *La Mastro de l' Ringoj*. 431p., bind.

Speco: Romano
Literatura kvalito: Teda
Lingvaĵo: Modela
Stilo: Modela

Volumo 1 de ĉi tiu romanego, *La Kunularo de l' Ringo*, aperis pasintjare; recenzo pri ĝi aperis en *ESK* 18, novembro-decembro 1995. La romano origine aperis en la Angla lingvo, en 1954. La aŭtoro estis lingvisto/filologo Brita. Ĉi tiu romano estis modfuroraĵo, kvazaŭ kultverko, kiun preskaŭ ĉiu adoleskulo kaj la plej multaj adoltoj sentis devon legi.

La tradukinto estas eminenta literaturisto Esperanta, plej konata pro sia poezio. Lia literatura stilo estas pura, klara, eleganta sed facile legebla. Se juĝi nur laŭ la lingvaĵo, mi rekomendus ĉi tiun verkon kiel fundamentan ekzemplon de la plej bona literaturo Esperantlingva en nia epoko.

Tion mi ne povas diri pri la romano mem. Kiu volas facile endormiĝi dum sendorma nokto, tiu nur legu ĉi tiun verkon. Mi preskaŭ garantius endormiĝon post nur kelkaj paĝoj.

Tolkien kreis propran mondon, kiun li nomas "Mez-Tero", kaj li priskribas paĝocenton post paĝocento detale ĉiun ĝian stoneron kaj polveron. Enloĝas tiun mondon granda nombro da strangaj uloj: elfoj, gnomoj, hobitoj, orkoj, entoj (kvazaŭarboj), multaj magiaj estaĵoj; kaj eĉ homoj!

La intrigo estas tre simpla: ekzistas naŭ magiaj ringoj, el kiuj Unu estas la mastra ringo kun senlima potenco. Tiu senlima potenco tamen spirite kaj morale koruptas ĉiun ĝian uzanton. Ĝin volas Saŭrono, la Malluma Mastro, kiu estras la Orienton kaj intencas mastri la tutan mondon. Akiris la Ringon ulo nomata Smeagolo, pli ofte konata kiel Golumo, iam verŝajne ordinara ulo sed nun monstrajo spirite kaj korpe distordita de la finfluo de la Unu Ringo.

De Golumo iam sukcesis hobito nomata Bilbo akiri la Ringon, sed li transdonis ĝin al alia hobito nomata Frodo, kies tasko estas reporti ĝin sekrete al ĝia originlando kaj detrui ĝin per jeto en senfundan vulkansimilan monton. Tiu monto situas en la lando de la Malluma Mastro, Saŭrono. Tamen Saŭrono serĉas la Ringon por siaj ficeloj, pro tio la porto al la monto estas danĝeriga.

Pli grava en granda parto de ĉi tiu meza volumo de la romano,

tamen, estas alia potenculo, Sarumano, sorĉisto kiu iam estis honorinda, sed kies spirito kaptis kaj nun estras Saŭrono. Lin Saŭrono uzas por efektiviĝi siajn regokaj venkoplanojn.

Rerigardante la Post-Militan periodon, ni eble povas kompreni kial la romano pri la Ringoj tiom furore sukcesis en sia tempo. La malfruaj 1940'oj kaj la 1950'oj estis epoko kiam unu "Fipotenco" (la Hitlera) venkiĝis, nur tre malfacile, sed—laŭ onia fantazio—minacis la ekziston de la homa spirito kaj eĉ de la civilizacio mem ankoraŭ pli fia Fipotenco (la Stalina). La batalo inter la "La Fiiimperio", kiel poste Prezidento Reagen nomis ĝin, kaj la Koalicio de Libero okupis la mensojn de multmilionoj da homoj. La "Unu Ringo" estis, simbole, la kapablo uzi Atoman Energion, kiun, "se ĝuste regata" oni kredis valorega rimedo por plenumi la bezonojn de la homaro, sed kiu minacis esti la detruilo kiu finos la homaron.

En tiu apokalipsa koŝmaro *La Mastro de l' Ringoj* estis alegorio kiu kaptis kaj ligis la fantazion de la leganta publiko. Ĝin sekvis—kaj plusekvas—senfina serio da imitaj verkegoj, de granda nombro da aŭtoroj, el kiuj neniu tamen sukcesis tiom entuziasmigi la legantaron ĝeneralan. Estas neverŝajne ke Tolkien mem komprenis la aktualan naturon de sia alegoria fantaziaĵo; pli verŝajne li

kredis verki epopean moralverkon laŭ klasikaj modeloj (*Gilgameŝ*, *Paradizo Perdita*, *Faŭsto*, kaj kompreneble la Ringopertrio de Wagner; sed, kontraste kun tiuj, ĉi tiu romano estas proza), unue por distri siajn junajn infanojn, poste por riĉigi la literaturon.

Ĉu, tamen, ĉi tiuj 1500 paĝoj da tedo meritas la talenton de William Auld? Mi malfacile kredus tion. Tamen, *de gustibus non est disputandum*. La traduko estas tre zorge preparita, legiĝas kvazaŭ originalaĵo, estas lingve kaj stile senpeka, ĉiel admirinda. La teksto estas tre zorge kompostita, kaj tre, tre zorge korektita. Pri la papero, bindo, kaj teknika karaktero de la presado—nu, ili estas tipe nuntempe Rusaj. □



GRANDA OPORTUNO

Venu por helpi prizorgi infanojn dum la UK 1997 en Adelajdo. Ni tre amuziĝos. Ni ekskursos, ludos, kantos, ridos, piknikos, biciklos, parolos, promenados...

Ni limigos la grupgrandecon, do la tasko ne estos tro granda. Ni ĉiuj loĝos kune kaj vizitos la UK-on mem kelkfoje. Bonvolu kontakti Barbara Bruer, RSD Strathalbyn, SA 5255. ☎ (085) 370203. □



TRA LA SPEGULO

recenzas Vera Payne



Tra la Spegulo, de Lewis Carroll, tr. Donald Broadribb. Beverley: Bookleaf Publishing, 1996. 100p., bind. \$30.00 en Aŭstralazio, US\$40 ekster Aŭstralazio. La prezoj inkluzivas poŝtsendon. Mendebila nur ĉe Donald Broadribb, 59B Lukin St., Beverley WA 6304.

En *Alico en Mirlando* la knabino lernas supervivi la nekomprenoblajn agojn, dirojn kaj kutimojn de la plenkreskuloj. Ŝi restas infano, sed sekura, trankvile atende ante la estontecon.

Tra la Spegulo montriĝas ŝakludo. La ŝakludiloj portas kun si vivo-problemojn kaj obstaklojn. Alico celas fariĝi, kaj ja fariĝas, reĝino! Ŝi moviĝas de kvadrato al kvadrato ĝis ŝi atingas la supron de la socio. Lewis Carroll (Charles Dodgson), kiu tiom amis la infanojn, precipe knabinetojn, kaj plejprecipe Alicon Liddell, imagis sin la plumpa, nekapabla, ridigecca, Blanka Kavaliro, malbela kaj maljuniganta, dum por li Alico estis la neatingebla princino. Lewis vidas en la koron de fraŭlino Alico kaj komprenas ke ŝi volas esti afabla al la plendemaj, plumpaj pliaĝuloj, sed ke vere ŝi deziras eniri sian novan, ekscitan junulinan vivon, sen la balasto de maljunuloj. Post kiam ŝi flirtigas la mantukon por adiaŭi la Kavaliron, ŝi troviĝas ĉe la bordo de rivereto.



"Finfine la Oka Kvadrato!" ŝi kriis saltante, kaj ŝi jetis sin... "kaj sin trovas kronita per ora krono. Charles sentas ke la vivo jam finiĝas; por Alico la vera aventuro nun ekkomenciĝas.

Spegulo komenciĝas mole kaj bele, multe pli sekurige ol *Mirlando* kiu okazas en kuniklo-truo. "Ĉu vi aŭdas la neĝon frapi la fenestrojn, Kanjo? Kiom agrable kaj mole ĝi sonas! Tute kvazaŭ iu kisas la fenestron deekstere. Ĉu la neĝo amas la arbojn kaj kampojn, kaj tial ĝi kisas ilin tiom karese? Kaj poste ĝi sekurige kovras ilin, komprenu, per blanka kovrilo; kaj eble ĝi diras 'dormu karuloj, ĝis revenos la somero'. Kaj

kiam ili vekigas somere, Kanjo, ili vestas sin per verdajoj kaj ĉirkaŭdancas..." (p4).

Eble la knab(in?)oj preferus: "Do ĉar respondi mi ne povis/Lian kapon mi nur batis/Kaj kriis laŭte, pugnon movis,/Lin ja mi ne kompatis." (p98). Troviĝas multaj ekzemploj de tipaj infanesprimoj nekomplimentaj, ekz. "Mi neniam vidis ulon pli stultaspektan" (p19).

Kvankam la rakonto plenas je songecaj sekvencoj, alilandecaj, aliepokecaj, tamen troviĝas maltrankvilige modernaj pripensopecoj, ekz. "Nu, en nia lando...oni kutime atingas alian lokon—se oni kuras tre rapide dum tre longe, kiel ni." "Nu, ĉi tie, sciu, oni bezonas laŭeble plej kuri por resti samloke." (p24).

Ĉar temas pri spegula loko, ĉio



estas retroa. Do, "Mi ĉiam kredis ke ili estas fabelaj monstroj!" diris la Unukornulo, vidante la infanon, Alico. "Ĉu ĝi vivas?" (p83). La spegulkukojn oni disdonas unue, kaj tranĉas poste!

Viaopinie, ĉu traduki pli facilas ol originale verki? Provu mem traduki, kaj poste kontrolu: snug (p4), a little peep (p5), was screaming herself into a fit (p9), Jabberwocky (p12), It could bark...it says bough-wough...that's why its branches are called boughs!" (p18), Tweedledum and Tweedledee (25), "Am I addressing the White Queen?" k.c. (p.52), "It won't take long to see him off" (I101). Purajn Broadribismojn vi trovos en la klarigo pri la "Rosge, dum la ŝlipaj tovoj"-versaro (p71) kiun vi nepre komparu kun la originalo. "Take some flour." "Where do you pick the flower?" (p107). Tiaj duoblaj signifoj tute ne perturbas la petol-eman sed eksterordinaran Don. Li precipe fortas en poemtradukado. Vidu p.101; trafis min la kresĉendo de sonoj ĉe la fino de tiu versaro. Donald ne malpli majstre kreis!

Jen belega ĝemelo al *Alico en Mirlando*. Ambaŭ libroj sidos alloge sur via breto, post la traĝuo. Mi ja konsilas duan tralegon, kune kun la versio en via patrinlingvo, por eĉ pli ĝui la meti/arton de la tradukisto/ eldonisto. Feliĉan Novjaron Legadon! □



PROVU VIAN VORTOSCION

kompilis Donald Broadribb



OFICIALAJ VORTOJ

La sekvantaj vortoj ĉiuj estas oficialaj. Provu elekti la signifon por ĉiu el ili. (Respondoj sur paĝo 27.)

1. azoto

- (a) arkaika vorto signifanta nitrogeno
- (b) punkto en la ĉielo, plej supra super onia kapo
- (c) malsukcesa serĉo

2. bulko

- (a) plenigaĵo, kutime el katuno
- (b) malgranda bakajo el delikata faruno
- (c) antaŭa parto de ŝipo aŭ boato

3. cisterno

- (a) forta terno, indikanta malsanon
- (b) rezervujo por likvaĵo
- (c) specio de marbirdoj

4. ĉikani

- (a) dispecigi paperfolion
- (b) vage veturadi en rulĉaro
- (c) intence ĝeni iun, per agoj aŭ paroloj

5. duŝo

- (a) speco de bano, dum kiu oni ŝprucas akvon sur sin
- (b) purigo de la seksorganoj
- (c) antikva rusa ĉaro

6. zono

- (a) laŭta bruo farata de abelo
- (b) parto de floro
- (c) leda strio ĉirkaŭ la talio

7. volumeno

- (a) kvanto da spaco okupata de objekto
- (b) bindita aro da presitaj paperfolioj
- (c) speco de ŝtofo el delikata silko

8. urogalo

- (a) specio de birdo
- (b) hormono produktata de la pankreataj glandoj
- (c) speco de najtingalo

9. turniro

- (a) Malgranda aparato por teni pordon fermita
- (b) ĉirkaŭirejo (por aŭto)
- (c) ludo-konkurso, ekz. de briĝo, ŝako

10. ŝvebi

- (a) sekigi per peceto de katuna ŝtofo
- (b) resti pendanta en la aero
- (c) kudri per kudromaŝino

11. sveni

- (a) perdi konscion
- (b) senmove kuŝi sur akvo
- (c) rosti viandon en karbopecetoj

KIEL ONI NOMAS TION?

(Respondoj sur paĝo 27)

1.



2.



3.



4.



5.



6.



7.



8.



9.



10.



11.



12.



13.



14.



ENROLMENTS RUSH IN

by Max Wearing

Six weeks after enrolments opened for the 82nd World Esperanto Congress to be held in the Adelaide Convention Centre in July, 1997, 523 enrolments had already been received from 50 different countries

Among this initial group of enrolments, 97 are from Japan, 47 from France, 37 from Germany, 24 from Netherlands, 24 from Korea.

Kep Enderby, President of the Australian Esperanto Association, said that with 9 months still to go, there was good reason to expect attendance of more than 1500 delegates. The largest World Esperanto Congress had 6,000 in Warsaw, 1987. The highest number of countries represented was 70 in Tampere (Finland) in 1995.

He said the Congress theme "Tolerance and justice in a multi-cultural world," was a very appropriate one for Australia.

Director of SATOUR, Ms Jill Lambert, whose firm Conventions Worldwide has been chosen to arrange the accommodation and excursions for this 8-day congress, said the congress provided an excellent opportunity to show off Adelaide as an attractive compact congress destination and an ideal entry point for visiting Australia.

PREPAROJ POR ADELAJDO

de Kep Enderby

La sekvanta listo de la proponata LKK por Adelajdo estas transdonita al UEA:

Kep. Enderby, Prezidanto kun respondeco pri ĉ. tio.

Max. Wearing, Vicprezidanto kiu havos precipan respondecon kunordigi la laborojn de la LKK en Adelajdo kaj rilati al SATOUR pri ekskursoj kaj loĝado.

Brendan Linnane, Vicprezidanto havanta repondecon pri ĉiĉeronoj kaj aliaj helpantoj.

Peter Bird, Sekretario.

Rochelle Jaquier, Kasistino.

Jennifer Bishop, respondeca pri la gazetaro kaj edukaj servoj.

Bob kaj Audrey Felby, respondecaj pri informoj, novaj-dissendoj, ĝis la Kongreso, al Aŭstraliaj Esperanto-jurnaloj.

Audrey Felby, pri salonoj kaj ĝiĉetoj.

Gay Phillips pri kantlibroj, ks.

Jay Grant pri komputilaj aferoj.

Dianne Lukes pri fondusoj

Joseph Wearing, Bernard Wechner kaj Nick Nicholas pri junularaj aranĝoj.

Barbara Bruer, pri Infana Kongreso.

Donald Broadribb, kiel lingva konsilanto, kaj, helpate de Bob Felby, respondeca pri eksterlanda informado kaj la *Kongresa Kuriero*.

Tiu ĉi listo ne estas kompleta

aŭ fina, ĉar ni ankoraŭ ne ricevis la aprobon de UEA, kaj povos esti ŝanĝata. Ni devos aldoni almenaŭ la nomojn Tom Elliott, Paul Desailly, Vera Payne kaj Trevor Steele. Krome, Haidi kaj John McLeod informis min ke ili esperas veni al Adelajdo por helpi.

Nikola Raŝiĉ, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, venos al la Somerlernejo en Adelajdo por prelegi kaj fari kontaktojn kun niaj LKK-anoj kaj la anoj de la firmao SATOUR, kiu estas nia profesia helpanto por nia kongreso.

Ege gravas ke tiuj kiuj intencas helplabori kiel ĉiĉeronoj aŭ alimaniere dum la kongreso, kaj espereble dum la antaŭa semajno, frue donu siajn nomojn al Brendan Linnane. Ankaŭ gravas, tiom kiom eblas, ĉeesti tiun Somerlernejon por lerni, de Nikola Raŝiĉ, kio okazos kaj kion ni devos fari. La adreso de Brendan estas 28 Redford St, Vale Park SA 5081 kaj lia telefon-numero estas 08 266 1384.

Ĉirkaŭ 3000 partoprenis la Kongreson en Prago. Ili venis el 66 landoj. La Kongresejo similis al tuta urbanaro kiu subite kolektiĝis kune.

En Prago, la lokaj organizantoj konsistis el 15 LKK-anoj kune kun preskaŭ cent helpantoj! Tie la precipaj budoj kaj giĉetoj provizis servojn temantajn pri ĝenerala informado, loĝado, la bankedo, ekskursoj, venontjaraj kongresoj, la kasisto de la Kongreso, TEJO,

LJK, ILEI, Afrika Agado, Faka kaj Scienca agadoj, la kasisto de UEA, kaj la UEA stando. Aldone al tiuj estis giĉetoj poŝtaj, telefonaj kaj por perditaj kaj trovitaj objektoj. Aliaj respondecis pri la Taga Kuriero kaj la provizo de ligoj al la amaskomunikiloj, elektronika poŝto, radio, ktp.

Ni respondecos pri similaĵoj en Adelajdo.

Unu ero inter niaj diversaj respondecoj estos la sekurprizorgo en la libro-servejo. UEA-respondeculoj prizorgos pri la ricevo de pagoj kaj la donado de kvitancoj, sed insistas ke estu forta kaj strikta sekuriga sistemo por malebligi ŝteladon de libroj. Por tion fari ĉiu eniranto devos deponi sian saketon al sekurigantoj. Ni devos provizi tian servon kaj tio signifas ke ĉiam devos esti almenaŭ du sekurigantoj ĉeestantaj en la librovendejo.

Unu inter niaj fruaj baldaŭaj urĝaj fariĝontaj taskoj estos la preparo de la Dua Bulteno. Tiu ĉi kutime aperas januare kaj ni devos baldaŭ sendi la proponotan Esperantan tekston al la UEA-CO.

La Dua Bulteno donas informojn pri vizaj bezonoj, la Oficiala Antaŭkongresa Ekskurso, loĝado en Adelajdo, haveblaj hoteloj ktp, Dumkongresaj kaj Postkongresaj Ekskursoj, la Bankedo, aliaj Kongresaj aranĝoj kaj aliaj utilaj informoj por ke mendoj povu esti facile faritaj.

SATOUR nun kolektas informojn pri ekskursoj kaj loĝado, Angle, sed tio devos prezentiĝi laŭ la maniero de la Dua Bulteno kaj tradukiĝi en Esperanton.

Ilustre: Prago proponis 7 Tuttagajn Ekskursojn, ĉiuj okazantaj je merkredo; ĉiutage okazis 3 en-Pragaj duontagaj ekskursoj, 3 ekster-Pragaj duontagaj ekskursoj, 5 vesperaj ekskursoj kaj aldone al tiuj estis iuj surloke mendeblaj ekskursoj. Ĉiuj havis siajn proprajn Esperantajn ĉiĉeronojn!

Vizoj ofte kaŭzas problemojn por multaj, kaj pro tio la Dua Bulteno donas konsilon pri la vizaj postuloj de la gastiganta lando. Eblas ke ne multaj scias ke, kvankam multaj aliaj landoj ne plu postulas vizojn, Aŭstralio ja ankoraŭ postulas ilin por ĉiuj eksterlandanoj escepte de Nov-Zelandanoj.

Rezulte de tiu viza situacio, lastatempe mi havis kunvenon en Kanbero kun la respondeca Ministro, la Hon. Phillip Ruddock MHR, penante glatigi la procedurojn necesajn. Sekve de tio, mi nun havas ege helpeman oficistinon kiel rektan kontaktopersonon en la Departemento kaj kiu ekinteresiĝas pri Esperanto.

Nepre nia plej grava respondeco, estos la Kongresa Nacia Vespero. Tiu estas sole nia Aŭstralia respondeco kaj por bone prezenti ĝin ni bezonos monon. Ĝis nun miaj unuaj penoj gajni helpon de la Aŭstralia Konsilio (Australia

Council) ne produktis favorajn rezultojn sed mi ne estas senespera kaj daŭrigos miajn klopodojn. Tamen donacoj aŭ pruntedonoj fare de nia Esperantistaro estos bonvenaj kaj estos repagitaj el nia parto de la profito de la Kongreso se profito okazos. Bonvolu helpi!

La Internacia Kongresa Universitato funkcios dum la Kongreso kaj la Centra Oficejo de UEA konsilas ke la Rektoro estu Profesoro Ron Gates. Certas ke eminentaj eksterlandanoj prelegos sed inter ni ĉi tie en la tiel nomataj antipodoj estas taŭgaj prelegantoj kaj mi mencias nur Brian Fox en NZ., Alan Bishop, Donald Broadribb, Ron Gates, Margaret Furness, Marcel Leereveld, Vera Payne, Trevor Steele, kaj Alan Towsey, en Aŭstralio. Sendube estas aliaj.

Tiuj kiuj interesiĝas pri prelegantigo devus kandidatiĝi, unue, ĉe Prof. Gates, kaj rekte kaj formale ĉe la Sekretario de la Universitata Komisiono, Profesoro H.M. Maitzen, Endmanngasse 6-18/124M, 1230, Wien, Aŭstrio. Tiu Komisiono faras la rekomendojn al la Estraro de UEA kiu faros la finajn decidojn. Kandidatoj sendu personajn detalojn kaj mallongan resumon pri siaj proponotaj temoj al Prof. Maitzen.

Por pliaj informoj, bonvolu sendi viajn demandojn al nia LKK-sekretario Peter Bird ĉe Flat 3, No. 8, Romney Rd., Heathpool, SA 5068, Aŭstralio. □



Deziraj Korespondi



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisube listigitaj personoj estas haveblaj ĉe tiu adreso. Se vi deziras aperigi korespondpeton en ĉi tiu rubriko, bonvolu kontakti Betty Aulsebrook.

/ **COSTE Sorina**, c/o Roman Felicia Magdalena, Str Cantenir Cio ET 11 Ap 47, 3700 Oradea, Rumanio. Inĝeniero mekanika. Naskiĝdato 1970. Parolas ankaŭ la Anglan. Hobioj: turismo, geografio, literaturo, sporto, muziko.

/ **COSTE Alina**, adreso kiel supre. Modelistino, kosmetikistino. Naskiĝdato 1967.

/ **ČERNÁ Irma**, Obrancov mieru 1154, 02001 Púchov, Slovakio. Instrukistino 54-jara. Deziras koni vivmanierojn de aliaj landoj. Interesiĝas pri piedturismo, literaturo, manlaboro (trikado, kroĉetado).

KAJ ANKAŬ

per la Internet venis la ĉisekva komunikajo:

Mi konstatas (pro mia astronomia hobia) ke miaj geografiaj koodinatoj (latitudo kaj longitudo) estas antipodaj al iu loko de la koralrifo apud Aŭstralio. Mi loĝas tre proksime de:

Latitudo: 28° 28' 28" N
Longitudo: 16° 16' 16" W

Krome, ĉi tie troviĝas la Observatorio de LC (Astronomia Observatorio de Kanarioj) kun du gravaj observaj centroj en la norda hemisfero: unu en mia insulo Tenerife (Observatorio de monto Teide) kaj alia en insulo La Palma (dediĉita al profundobjektaj observoj).

Se iu samideano en via ĉirkaŭa geografio deziras kontakti spertulojn, volonte mi konatigos interesitojn.

Samideanan saluton,
Antonio Suárez Rodríguez

Retadreso:

<asuarez@arrakis.es>

Poŝtadreso:

Poŝtkesto 435

38080 Santa Cruz de Tenerife
Hispanio



Nova Bulteno: La restarigita Gunnedah Esperanto Club komencis eldoni novan bultenon en septembro, kun la titolo Blankaj Ŝtonoj. (La vorto Gunnedah estas indigena vorto kiu signifas "La loko de la blankaj ŝtonoj".) La prezidento de la Klubo estas Peter Clarke, la sekretario estas Joyce Rordan, redaktas la bultenon Jackie Turvey.



SKRIBAS LA LEGANTOJ

**De Gwenda Sutton:**

1. Richard Roberts ĉefo de la lingva fako de la Nov-Zelanda Koresponda Lernejo verkis artikolon titolitan "Esperanto de kie kaj kien?" kiu okupis la dek centrajn paĝojn de *New Zealand Language Teacher* vol.22, septembro 1996, organo de la Nov-Zelanda Asocio de Lingvaj Instruistoj.

2. **Skrablo** Mi strebas eltrovi kiel samideanoj tra la mondo adaptas la bone konatan ludon, kaj pretas fari raporton. Mi jam scias pri la valoro kaj distribuo de la ludpecoj laŭ sistemoj elpensitaj en Bolivio de Jaime Echiverría Uribe, de iu Franco laŭ informo de Angela Tellier, kaj Dr-o Donald Rogers en Nov-Zelando.

Via sincere

Gwenda Sutton

12c Herbert Gardens

186 The Terrace

Wellington 6001, Nov-Zelando

e-poŝte:

100235.3407@compuserve.com

De Miranda Lutz

Antaŭ kelkaj monatoj mi revenis hejmen post tre interesa vojaĝo. Dum du monatoj mi estis for, vizitante Usonon. Mia ĉefa celo estis partopreni Somerkursaron de Esperanto ĉe Ŝtata Universitato, San Francisco. Tiu ĉi kursaro estas

arangata ĉiujare. En 1996 la instruistoj estis el Hungario, Japanio kaj Usono. La kurso konsistis el tri semajnoj da intensa mergado en Esperantujo. La studentaro venis el 9 landoj de 5 kontinentoj.

La instruistoj estis Dered Roff el Albuquerque, New Mexico, Hisasi Kitagawa el Japanio kaj Katelin Smideliusz el Hungario. Kalelin instruis ankaŭ en la Adelajda Somerkurso en 1996. Estis tre bone ke mi renkontis ŝin en Usono. Dorothy Stermer organizis plej parte la vesperajn okazojn.

Mi ekkonatigis kun multaj interesaj personoj, iuj jam intencas partopreni la UKon en Adelajdeo en julio de 1997, kaj iujn mi esperable instigis. Kien ajn mi iris, ŝajnis ke mi estis la nura Aŭstraliano vizitinta. Mi volas danki ĉiujn kiuj gastigis min dum mia vojaĝo. Ĉefe mi dankas Esperantistojn kaj iliajn familiojn kies hejmojn mi vizitis.

La bazan usonan ekzamenon de Esperanto mi sukcesis, do mi nun deziras subiri la Aŭstraliajn ekzamenojn. Mi tre ĝoje ricevis subvencion de la Melburna Esperanto-Societo, kiu multe helpis pri mia vojaĝo tra Esperantio. Dankon al la membroj. □



LINGVA ANGULO

de Alan Towsey



PO

I am writing this in English because most English-speakers, and indeed most speakers of West-European languages, find the use of this word confusing, and so, rarely, if ever, use it—and when they do, often use it incorrectly. Even our textbooks treat it inadequately, and Butler (*Step by Step in Esperanto*, para. 812) disagrees in one point with *Plena Analiza Gramatiko*.

Speakers of East-European languages have less trouble, because it is common to several of them. It is a preposition used with the dative, accusative and locative cases in Russian, and with the accusative and locative in Polish (with different meanings for each case, of course), though only one of its uses in these languages corresponds to its use in Esperanto.

There is no precisely corresponding preposition in English, French etc., and it is an interesting thought that, if Zamenhof had been a German, Frenchman or Englishman, instead of a Pole, the word might never have entered the Esperanto lexicon!

Some quite eminent Esperantists have misused it, some avoid it altogether, and it has even been

suggested that it could be dispensed with. Maybe—but I doubt it, because with its use some ideas can be expressed more concisely and neatly than would otherwise be possible, thus avoiding longer circumlocutions.

Now, what has brought all this on? Well, not long ago I read somewhere an expression which went, so far as my memory serves me, something like: *La aŭtomobilo veturis je pli ol 150 kilometroj pohore*. I meant to note it down at the time, with a view to commenting on it later on in these pages, but for some reason I did not. I was, however, reminded of it a couple of days ago when I received from my correspondence friend Akademiano André Cherpillod a little booklet of 20 pages he had compiled devoted entirely to just this one word: *PO : La Diabla Vorto*.

André's treatment is, of course, exhaustive, though I think perhaps he could have made his points in rather less space, as I propose to do in what follows.

First of all, what does it actually mean? Butler (*Step by Step in Esperanto*, para. 812) says it means "apiece, at the rate of, @" and quotes as examples: *Mi donis al ili po ses pecoj = 6d apiece. Ni legas la libron po dek paĝoj en ĉiu*

leciono. He adds: "PO is never followed by the accusative." More on that later!

In para. 1044 he compares: *Duope ili supreniris la aron, po du ŝtupoj ĉiupaŝe* = Two abreast they went up the stairs, two steps at a time.

Cox's *Esperanto Grammar and Commentary* (para. 259 [22]) defines *po* as "at the rate of", and goes on to say: "*Po* has a distributive sense, and is used generally before numerals. Do not confuse *po* with *por*."

Distribution = at the rate of, in the proportion of, at.

EXAMPLES.—*Mi aĉetis kvar pomojn po du pencoj* = I bought four apples at the rate of twopence (each). "*Por du pencoj*" would mean "for twopence" (all four for twopence)

Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn: tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj = This book has 60 pages; therefore, if I (shall) read (in) each day at the rate of 15 pages, I shall finish the whole book in 4 days.

Silko po 5 ŝilingoj por ulno = Silk at 5 shillings a (for a) yard (ell)."

(This last example corresponds to an example in my Polish dictionary: *po szylinga sztuka*—one shilling apiece, and in my Russian dictionary: *po rublju s kajdovo*—a rouble from each person.)

Cox continues: "As a prefix. *Poduone* = By half, or, by halves. *Pogrande* = Wholesale."

Butler's Dictionary offers: "©, apiece, at (the rate of). *Mi donis al ili po ses pencoj, 6d apiece*. *Mi aĉetis pomojn po du pencoj* (at 2d each). (Cp. *por du pencoj*, for 2d). *Li veturis po dek mejloj (ĉiu)horo* = dek mejlojn en ĉiu horo, 10 miles an hour. DO NOT say 'Li iris dek mejlojn pohoro' = at the rate of an hour a mile! This is a common misuse of *po*, and a bad one. *Vendi po funto (-funte)*, by the pound, a pound at a time. *pagi popece*, by the piece. *Aĉeti pomalgrande (-detale)*, retail. NEVER use the accusative after *po*. *Elektu po tri homoj el ĉiu tribo*."

Now, in this last case Butler parts company with *PAG* and even Zamenhof himself to some extent. But first, let us see what meaning Zamenhof gave to the word.

In *Lingvaj Respondoj*, No. 137 (dated 1908), he wrote (and I translate):

"The word 'po' before any expression of measure means that the measure refers, not to all the persons or things taken together, but to each *separately*; for example: *ili ricevis po kvin pomoj* = not the whole group received 5, but each of them *separately* received five apples; *la drapo kostas po 2 spesmiloj por metro* = each metre (not the whole cloth) costs 2 spesmiloj; *ili vendas pogrande* = each sepa-

rate portion they sell is large (i.e., they sell only large portions). One cannot say 'je 80 centimoj po funto' or '30 mejlojn po horo', but one should say 'po 80 centimoj por (ĉiu) funto', 'po 30 mejloj en horo'.

So now you can see why "pohore" above is wrong!

Now to the question of the case after *po*. Zamenhof, in *Lingvaj Respondejoj* No. 79 (1891), wrote:

"Between the expressions 'doni po 2 pecojn' kaj 'doni po 2 pecoj' it is still hard to say which is the better, and therefore both expressions are acceptable and correct. However, in view of the fact that, thanks to the intervention of the word 'po', the 'pieces' no longer depend directly on the 'give', we recommend using after 'po' (just as after 'da') the nominative ('doni po 2 pecoj'). Another reason for this advice is also the circumstance that in our opinion 'wherever there is doubt as to the use of the nominative or accusative, the nominative should be used.'"

In line with this ruling, it is apparent also from Zamenhof's own usage that he favoured the nominative after *po* in these circumstances, and we have only one example of his using the accusative (*Al ĉiu li donis po kvin dolarojn*). He was probably instinctively following his native Polish, which in this sense uses the locative case, not the accusative, and as you can see by his use of "still difficult",

he left it to subsequent usage to finally settle the matter. But, of course, it has not.

Although *po* is a preposition, in some cases it mainly governs the numeral, rather than the noun following. But can a preposition govern a numeral? Of course it can—what about "I saw between 30 and 40 people there" (*Mi vidis tie inter 30 kaj 40 homojn*) "The project will cost around/about 1000 dollars" (*La projekto kostos ĉirkaŭ mil dolarojn*), "The enemy massacred all the inhabitants except three" (*La malamika soldataro masakris ĉiujn enloĝantojn krom tri*)? The prepositions here function as what the authors of *ABC Gramatiko de Esperanto* call "pseŭdo-adverbaj prepozicioj".

The authors of *PAG* argue that logic requires the accusative in these cases. Cherpillod personally agrees, but in view of Zamenhof's ruling and the fact that several prominent Esperantists regularly use the nominative, he makes no recommendation, but leaves the choice up to the individual. However, since the main purpose of this series is to offer guidance on points of Esperanto usage, I myself will take the plunge, and recommend the use of the accusative where the phrase is the direct object of the verb, on the principle that where usage varies, let logic prevail. So I would say:

Ili ricevis po kvin pomojn—They

each got five apples.

As ABC points out, however, if you don't feel comfortable with this, you can always rephrase the sentence:

Ĉiu (infano) ricevis kvin pomojn.

Ili ricevis pomojn po kvin (which more or less proves the point anyway!).

or use **po** as a prefix: *Ili ricevis pokvin pomojn.*

I do not recommend the last one—in speech you wouldn't hear any difference from the original sentence.

Can a phrase introduced by **po** be the subject of a sentence? Yes. It is not a far cry from:

La lernantoj venis po kvar (four at a time) (ABC)

to

Po du soldatoj pafis el la tri fenestroj (PAG) (=Three pairs of soldiers, each pair firing out of one of the three windows).

Po tri gastoj sidis apud la tabloj (PAG) (There were three guests seated at each table).

This is a clear indication that here **po** governs only the numeral: *du soldatoj pafis ...*, *tri gastoj sidis ...* makes sense; *po soldatoj pafis...*; *po gastoj sidis...* does not.

Of course, once again, you can get out of it by using *ĉiu*:

Tri gastoj sidis ĉe ĉiu tablo.

That is clear enough, because the same three guests could not be seated simultaneously at each table. But *Du soldatoj pafis el ĉiu*

el la tri fenestroj is still open to another interpretation: the same two soldiers could run from window to window and fire, to give the impression that there were more of them! You would need something like *Du soldatoj staris pafante ĉe ĉiu el la tri fenestroj.*

Po may also be preceded by another preposition. PAG gives the following examples:

Oni sidigis la dikegajn geedzojn sur po du seĝojn (= They put two chairs under each corpulent member of the pair).

La studentoj estis ekzamenataj pri po du tezoj (= Each student was asked questions on two subjects).

In this connection PAG offers:

Mi ricevis po mil frankojn de po du membroj (= *mil frankojn de ĉiu membro-duopo*), but goes on to say: "Oni povas ellasi *po ĉe la rekta objekto: Mi ricevis kvin frankojn de po du membroj.* Sed kun la *duobla po la kompreno estas pli facila.*" Cherpillod strongly disagrees that leaving out the first *po* in such cases does not change the meaning. Of course he is right—in the first case, neither the total number of francs received is mentioned or calculable, nor the number of members; in the second case, the total number of francs received is five; if each group of two members gave one franc (i.e., 50 centimes from each of the two), there were ten members in all.

Along the same lines, Cherpillod interprets: "doni kvin frankojn al po du personoj" to mean giving one franc to each group of two, ten persons in all, only five francs in all. To give 5 francs to each group of two would then have to be:

doni po kvin frankojn al po du personoj.

Do you follow that? Subtle, isn't it?!

Well, those are the basic principles. Here are a few more examples from *PAG, PIV, ABC* and Cherpillod to illustrate further:

Po du ĉambroj havas unu fornon (= one stove to every two rooms).

Po du boteloj staris sur la tabloj (= sur ĉiu tablo staris du boteloj).

Ili trinkis vinon po du glasoj (Ĉiu trinkis du glasojn da vino).

Se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj. (Here you could just as easily leave out *po* and say *Se mi legos dek kvin paĝojn ĉiutage...* without changing the meaning.)

Elektu el vi po tri homoj el ĉiu tribo (Joshua 18:4). (This could just as well be "Elektu al vi tri homojn..."—the English "Appoint three men from each tribe" is perfectly clear.)

El la aliaj, tri havis po aŭtomobilon (= tri havis ĉiu unu aŭtomobilon).

La publiko de la teatro aŭdis nur po unu vorton el du. (*Po* could normally be omitted without loss

of clarity, although it could also be argued that without *po* only two words were necessarily said! But I feel that would be splitting hairs.)

En kelkaj librejoj, mi aĉetis po plurajn librojn. (= I bought more than one book / a few books in each of several bookshops. If *po* is omitted, the meaning could be that I bought only a few books altogether, perhaps only one in each shop. Again, *ĉiu* could be used: *En ĉiu el kelkaj librejoj, mi aĉetis plurajn librojn.*)

El la gajnitaj cent dolaroj, li donis al siaj infanoj po dudek. (= li donis dudek al ĉiu el siaj infanoj).

Mia kotizo al diversaj Esperanto-asocioj estas po ducent frankoj ĉiujare. (= Ĉiujare mi pagas kotizon de ducent dolaroj al ĉiu el diversaj Esperanto-asocioj).

trupoj po cent soldatoj (each troupe consists of 100 soldiers). (You could also say *trupoj de po cent soldatoj*).

du premioj po cent frankoj (200 francs altogether — 100 to each prize).

Kvin pecoj da drapo po tri metroj (each of the five pieces of cloth is three metres long).

Mi fumis cigaredojn po dudek kopekoj (the price of each cigarette was 20 kopecks).

du bareloj da vino po cent litroj (200 litres altogether).

dek bankbiletoj po cent florenoj (= ten 100-florin notes).

You can see from the above that *po* is sometimes equal to English "of ... each": two prizes of 100 francs each.

veluro kostanta po tri guldenoj(n) por ulno (costing 3 guilders a yard).

Ŝi kudradis po dek horojn ĉiutage por dek frankoj. ("horojn" is used because (*dum* has been omitted (*dum po dek horoj*). *Po* could be omitted without changing the meaning. But the sentence as it stands could also mean that she received only a total of 10 francs for all her days of work; inserting *po* before *dek* (*por po dek frankoj*) would then specify that she got 10 francs every day.)

Kvin el la apartamentoj konsistas el po tro ĉambroj. (Not all of the apartments have the same number of rooms but five of them have three rooms each—15 rooms divided equally between 5 flats.)

Mi fumadis cigaredojn po dudek kvin rubloj por cento. (I used to smoke cigarettes costing 25 roubles a hundred.)

Oni povas nokti po ses frankoj. (= Overnight accommodation is available at six francs a night).

La drapo kostas po du dolaroj(n) por metro. (Ĉiu metro da drapo kostas du dolarojn.)

Mi aĉetis tri librojn por po mil frankoj. (Each book cost 1000 francs. PAG recommends using *por* before *po* with expressions of buying and selling.)

La ekskursantoj devis disiĝi por

la nokto kaj loĝis po 2 aŭ 3 en diversaj hoteloj. (two or three to each of various hotels).

Li kunŝtelis sian bibliotekon po libro. (= He got his library together by stealing a book at a time. A splendid example of the concision which *po* makes possible!)

Oni vendas tiujn cigaredojn nur po cent (by the hundred).

po 20 pecoj por skatolo (in packets of 20).

po skatolo (by the box).

verŝi vinon po guto (pour drop by drop. Polish: *po kropli*.)

preni lernantojn po du el ĉiu klaso kaj aranĝi ilin po kvar en vico. (= *preni du lernantojn el ĉiu klaso kaj aranĝi kvar en ĉiu vico*.)

Neniam faru ion poduone (Never do anything by halves).

pobotele—by the bottle.

politre—by the litre.

posepĵare—every seven years.

pograndisto—wholesaler.

pomalgrandisto—retailer.

pomalgrandisto—retailer

pogranda fruktistino — wholesale fruiterer.

enmiksi po unu kuleron en litron (mix one spoonful per litre; *Not: unu kuleron po litro!*)

PAG also quotes the derivatives: *poa* and *poe*, giving the following examples:

La du bankieroj gajnis poan milionon da dolaroj.

La knabinoj ricevis poe du pomojn kaj duonan.

Avoid these. Use instead:

Ĉiu el la du bankieroj gajnis milionon da dolaroj.

Ĉiu knabino ricevis du pomojn kaj duonan.

Finally, back to the expression which started all this. You should now be able to see the difference between:

veturi kvardek kilometrojn en horo (= travel 40 km in an hour) and

veturi po kvardek kilometrojn en horo (= travel [at the rate of] 40 km an hour. (Russian: po soroka kilometrov v čas).

If you have any questions don't hesitate to write to me at 19 Market St, Tahmoor NSW 2573. ☐



NZEA-KONGRESO

NZEA ne okazigos kongreson en 1997, sed NZEA ja okazigos jar-kunsidon en Masterton la 7an kaj 8an de februaro: ni inventas "Semajnfino Waitangi". Krom la oficialajn kunsidojn, la Masterton-Klubo aranĝos distran programon, kaj kune rezultos "Semajnfina Renkontiĝo".

Ni uzos la ĉambrojn de la Ruga Kruco, kaj provizos tagmanĝon kaj ĉefmanĝon kontraŭ taga kosto de \$45 por ĉiu persono. Tamen vi devos mem aranĝi loĝadon en unu el la hoteloj.

Por pli da informo turnu vin al Lydia Greig, 21 Kaka St, Masterton 5901. ☎ 06 378 6575. ☐

Pasporta Servo

Pasporta Servo estas servo por Esperanto-parolantoj. Ĝiaj membroj povas ricevi senpagan gastadon. Ĉiu kiu posedas propran ekzempleron de la listo de gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastigon. Gastigado laŭ PS ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormosako ĝis la rajto je utiligo de tuta domo.

1. Oni aĉetas la liston de la gastigantoj, kaj skribas sian nomon sur la kovrilon (La listo kutime estas aĉetebla ĉe AEA-Libroservo, PO Box 230, Matraville, NSW 2036 aŭ rekte de Pasporta Servo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando); aŭ

2. Oni farigas gastiganto. Ĉiu kiu mem aperas en la listo kiel gastiganto ricevas propran ekzempleron senpage, kaj tiel farigas membro. La gastiganto devas realigi por ĉiu nova eldono de la listo. Oni farigas gastiganto per plenigo de aligilo, kiun oni sendas al Pasporta Servo. La limdato por la 1998a eldono estas la unua de oktobro, 1997. Max Wearing havas kelkajn ekzemplerojn de la aligilo.

Ĉiuj membroj de PS (gastoj kaj gastigantoj) devas scipovi Esperanton. La listo estas persona kaj validas por nur unu persono. Por ke la listo validu, ĝi devas havi la nomon de la posedanto sur la fronta paĝo.

Bonajn vojaĝojn kaj tranoktojn!
MAX WEARING
 organizanto de PS por Aŭstralio.

ESPERANTISTS! YOU'LL BE IN HEAVEN IN 1997!

by Jennifer Bishop



As you know, this will be a very special year for the future of the Esperanto Movement in Australia. The success of the 82nd *Universala Kongreso de Esperanto* (the UK) and the 31st ILEI Conference for teachers is the responsibility of all Australian Esperantists.

Having taken advantage of the discount for early registration for the UK, now is the time to register for the Summer School in Adelaide with a discount of \$10 before November 21st. For those intending to play a full part in working for the success of the Congress and the ILEI (*Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*) conference, the Summer School will provide the necessary training, not only in the Esperanto language through expert instruction from internationally known Stefan McGill but also in the details of administration and hospitality with the UEA Congress Secretary, Nicola Rašić.

Immediately after the UK, the important ILEI Conference for teachers of Esperanto will take place at Avalon Conference Centre near Geelong, Victoria, at which 60 participants are expected, including as many Australians as possible. If you join ILEI now,

you will benefit not only from receiving the December issue of *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) with details of the early registration discount, but you will also contribute significantly to the foundation of an Australian Section of ILEI. The annual subscription to ILEI is only 20NLG or 100 SEK (Swedish Crowns), payable as follows:

1. To UEA by credit card, UEA code: ilek-a; or to UEA's post office giro account 37 89 64 (Den Haag) for ILEI. (Same UEA code)
2. To the ILEI post office giro account no. 682117-7 Stockholm, address of the ILEI treasurer: Bertil Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Sweden.
3. By bank cheque to the address above but including NGL 10 (SEK50) for bank charges.



Igorj Sitnikov



LINGVOJ POR LA 21-A JARCENTO SIMPOZIO

11-14 oktobro, en Monash-Universitato, Melburno

La unua ero de la programo estis vizito al elementa lernejo en North Clayton. Ekde la eniro, tekstoj en Esperanto ilustritaj per desegnaĵoj atestas la entuziasmon de la infanoj pri la internacia lingvo. La dissemado de la vizitantoj inter la lerneĵanoj, laŭ plano de la instruistino, ebligis interkonatigon en grupetoj. La infanoj volonte kaj trafe kontentigis la scivolemon de la plenkreskuloj. Venontan januaron ili forlasos la lernejon por eniri gimnazion, kie ili studos aŭ la japanan aŭ la germanan aŭ... Estus domaĝe se ili forlasus ankaŭ Esperanton. Kiel malhelpi tion?

Sekve de tiu vizito Alan Bishop informis la aŭskultantojn pri kiel naskiĝis la projekto Ekparoli kaj la Esperanta versio de *Mazi en Gondolando*. Poste Trevor Steele parolis pri sia instruado de Esperanto en Pollando, en la infana centro *Bona Espero* en Brazilo kaj en Montessori-lernejoj en Perto. En Pollando li instruis al studentoj cele turismon. Lia sperto evidentigis ke ili lernas la internacian lingvon multe pli rapide ol aliajn lingvojn. Ĉu estontece pli kaj pli da homoj rekonos tiun fakton kaj rifuzos plu perdi tempon, energion kaj monon? →



Alan Bishop raportas




Trevor Steele informas

La tago finiĝis ĝoje en la restoracio Casa Mia, kie Kep Enderby priskribis sian vivon kiel Esperanisto, SATano kaj UEAano kaj esprimis sian kontenton esti kun la simpozii-partoprenantoj.

La sabata programo ebligis elekton inter konversacirondoj, gramatikajoj, ludoj, anekdotskribado, tio kio plej allogas lin/sin. Post kunigo dimanĉmatene en kiu Haeng Cho klarigis la totemojn de la Aborigenoj kaj ties gravan sistemon de familiaj interrilatoj, oni karavane veturis al la montareto Dandenong. Dum barbekuo ĉiuj partoprenantoj ĝissate babilis kaj ŝercis unu kun alia ĝis ili disiĝis kun la intenco interrenkontiĝi denove en la somera lernejo at/kaj la U. K.

Raportis Franciska Toubale



Ruth Tumman kun atestilo

INDEKSO 1996

- 19 = Januaro-februaro 1996
 20 = Marto-aprilo 1996
 21 = Majo-junio 1996
 22 = Julio-aŭgusto 1996
 23 = Septembro-oktobro 1996
 24 = Novembro-decembro 1996
- Deziras korespondi: 19/12, 20/19, 21/11, 22/15, 23/13, 24/17
- Edukado:
- Aŭstraliaj instruistoj de Esperanto (Jennifer Bishop) 20/9
 - ILEI-konferenco 1996 en Tabor, Ĉeĥa Respubliko (Jennifer Bishop) 23/9-10
 - Unuaj analizrezultoj de Ekparoli 22/7,18
 - v. English Supplement
- Ĝeneralaj artikoloj:
- 3 ZZZ Esperanto 22/26
 - Alvoko al ĉiuj Esperantistoj Aŭstraliaj (pri ekzamenoj) 23/21
 - Du kantoj el Kubo 20/20-23, 21-23-24
 - La Ŝvarcaj analogoj de 1995 (Diplodoko) 20/10-12
 - Memoroj pri Nov-Zelando (Alan kaj Jenny Bishop) 21/8-9
 - Pasporta Servo (Max Wearing) 24/25
 - Pri publika parolado (Bill & Betty Aulsebrook) 19/13-15
 - Pseŭdonimoj (Ralph Harry) 21/15-16
 - Trans kvar oceanoj (NikSt) 23/18
 - Internet 19/22,23 21/19; v. English Supplement
- Kiu Estas Kiu en la Aŭstralia Esperanto-Movado?
- Donald Broadribb 21/20-21
 - Ellen Meadem 22/11
 - Kep Enderby 20/18
- Komputiloj:
- Alfabetoj: 22/23-24
 - La programo *Supersigno* (Brian Currie) 20/7-8
- Kongreso de AEA/NZEA decembro 1995 (Kep Enderby) 20/2-4
- Konkurso pri kantoj el Kubo: 21/22-23
- Konkurso pri pseŭdonimoj 22/10
- Lokaj societoj:
- Esperanto-Federacio de Kvinslando, Seminario kaj Konferenco 21/25-26
 - Hoŝida Acuŝi vizitis Novzelandon 21/24
 - Manly Esperanto Club 21/24-25
 - Masterton 19/25-26
 - Melburno 20/25-26, 21/25, 22/24-25, 23/20, 24/27-28
 - Perto 20/26, 22/25-26
 - Seminario de la Sidneja Esperanto-Societo en oktobro 1995 19/24-25
 - Sidnejo: 20/25
- Noveloj:
- Donald Broadribb:
 - "Catherine kaj Veronica" 24/2-7
 - "Falsa pasporto" 19/3-7
 - "Profesia Konvertato" 22/3-7
- Odlo Bokserp:
- Odlo en Antarktiko! 21/16,27
 - Piedlibro pri Juralismo* 23/8
- Personoj:
- Alan Turvey 19/23-24
 - Brian Currie 19/24
 - Brian Fox 20/19
 - Donald Broadribb (okuloj de) 22/15, 23/13, 24/7
 - Edmund Hearne (morto de) 22/24
 - Jeanie Wilson (nekrologo) 22/24
 - Kep Enderby 23/27
 - Paul Desailly 19/26-27, 22/27
 - Ray Ross (nekrologo) 23/20
 - v. ankaŭ Kiu Estas Kiu

Prilingvaĵoj:

- "Ambaŭ" (Marcel Leereveld) 23/17-18
- La skriba formo de propraj nomoj (David Rockell) 20/24
- La vorto "foje" (Donald Broadribb) 22/11
- Lingva Angulo (Alan Towsey) 19/15-17, 20/13-16, 21/17-19, 22/16-18, 23/14-16, 24/19-25
- Participado (Marcel Leereveld) 19/18-20
- Pri la mortigo de Esperanto (Ronald Gates) 19/10-12
- Provu vian vortoscion (Donald Broadribb) 22/12-13, 23/11-12, 24/12-13
- Reduobligado: Baza lingva fenomeno en Esperanto (Ralph Harry) 23/22-26
- Respondo al la artikoloj de Ron Gates kaj Donald Broadribb (Marcel Leereveld) 21/12-14
- Rikolto de strangaj vortoj (Donald Broadribb) 19/21-22
- Transitiveco kaj netransitiveco de verboj (Marcel Leereveld) 22/19-23

Rakontoj v. Noveloj

Recenzoj:

- Aldono al la librokatalogo 22/23-24
- Alico en Mirlando* (Vera Payne) 23/3-5
- Bibliografio de Tradukoj el la Angla Lingvo* (Donald Broadribb) 22/8
- La Du Turegoj* (Donald Broadribb) 24/8-9
- La Floroj de l' Krepusko* (Donald Broadribb) 19/9
- La Mirinda Sorĉisto de Oz* (Vera Payne) 21/3-4
- La programo *Supersigno* (Brian Currie) 20/7-8
- Morto de Sciencisto* (Vera Payne) 19/8
- Peter Jameson's Secret Language*

- (Donald Broadribb) 23/6-7
- Stokita Vino* (Trevor Steele) 22/8-9
- Survoje al Universala Civilizacio* (Kep Enderby) 21/5-7
- Tra la Spegulo* (Vera Payne) 24/10-11
- Tria Kolekto da Krimnoveloj* (Donald Broadribb) 22/8
- Veneno Kara* (Elvie Rowe) 19/7-8 ankaŭ v. Odlo Bokserp
- Skribas la Legantoj:**
 - Gonçalo Neves 21/10
 - Gwenda Sutton 24/18
 - Katalin Smideliusz 21/10-11, 21/14
 - Miranca Lutz 24/18
- Somerlernejo januaro 1996 (Terry Manley) 20/5-7
- Universala Kongreso de Esperanto en Prago 1996 23/19
 - en Adelajdo 1997: 19/24, 20/16-17, 21-26, 22/14-15, 23/20-21, 24/14-16, 26

ENGLISH SUPPLEMENT

- Ekparoli in Victoria (Jennifer Bishop) 22
- Esperanto in W.A. Schools 1996 19
- Home thoughts from abroad (Max Wearing) 23
- Project Ekparoli: Esperanto in the Primary School Progress Report (Alan Bishop et al.) 20
- Report on Esperanto as a compulsory language course in a primary school (Karakán Kočárđy) 19
- Report on teaching of Esperanto in schools in Perth (Trevor Steele) 22
- United Nations jubilee (Ralph Harry) 19
- Where problems lie (English in the Internet) (Donald Broadribb) 21
- ////////////////////
- La fino de la artikolo de Ralph Harry pri "Reduobligado" aperos en la venonta numero.

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

Oficialaj vortoj: 1.a; 2.b; 3.b; 4.c;
5.a; 6.c; 7.a; 8.a; 9.c; 10.b; 11.a.

Bildoj: 1. porko*; 2. strigo*; 3.
dinosaturo; 4. Budho; 5. Viŝnuo;
6. policano* aŭ policisto*; 7. ŝar-
ko*; 8. kukumo*; 9. vitberoj* aŭ
vinberoj*; 10. papilio*; 11. ska-
rabo*; 12. rano*; 13. baletistino*;
14. observatorio*.

* Oficiala vorto

////////////////////

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV- ZELANDA ESPERANTO- ASOCIOJ

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:
AŬD \$30 por individuo aŭ klubo
(+\$5 por familiano(j) de la sama
adreso); \$20 por studento aŭ
pensiulo; asocia membreco: \$10.
Bonvolu sendi vian kotizon al
Libroservo de AEA. PO Box 230,
Matrville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
NZ\$40 por individuo, \$50 por
geedza paro, \$10 por studento aŭ
junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por

ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon
al la kasisto: Jackie Fox, PO Box
8140, Symonds St, Auckland
1035.

**Unuopaj ekzempleroj de Espe-
ranto sub la Suda Kruco:** Por mem-
broj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por
nemembroj, \$4.25 + poŝtsend-
kosto. Mendu de la Libroservo de
AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En
Usono kaj Kanado: US\$30. Mendu
ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.
Gld., pagu al la konto aal-w de
la Libroservo de la Aŭstralia
Esperanto-Asocio ĉe UEA. Oni
ankaŭ povas pagi 34 I.R.K. rekte
al la Libroservo de la Aŭstralia
Esperanto-Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas
© 1996 de la respektivaj aŭtoroj.
Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Espe-
ranto sub la Suda Kruco* estas ©
1996 de la Aŭstralia kaj la Nov-
Zelanda Esperanto-Asocioj. Repre-
so de enhavaĵo estas permesata,
kondiĉe ke la fonto estas nomita.
Ĉi tiu numero de ESK estas per-
komputile kompostita de Donald
Broadribb per Power Macintosh
7200/90, la kompostoprogramo
estas Nisus Writer. Alfabetoj uz-
itaj estas New Century Schoolbook
10 kaj Orion Esperanto 16 (dispon-
igita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by
Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley
WA 6304. Printed by Business Network,
5/25a Oxford St, Bondi Junction NSW
2022.